

ESPERANTOLOGIO

ESPERANTO STUDIES

ĖĖĴ

Kajero 7

2015

Issue No. 7

Redaktas Editor

Christer Kiselman

Redakta komitato

Detlev Blanke
Probal Dasgupta
Michel Duc Goninaz
Sabine Fiedler
Gotoo Hitosi
Wim Jansen
Ilona Koutny
Erich-Dieter Krause

Editorial Board

Sergej Kuznecov
Haitao Liu
Ingrid Maier
Marc van Oostendorp
Humphrey Tonkin
John C. Wells
Yamasaki Seikō

KAVA-PECH Dobřichovice (Prago/Prague)

Uppsala universitato

Uppsala University

KAVA-PECH

Anglická 878, CZ-25229 Dobřichovice (Praha)
info@kava-pech.cz www.kava.pech.cz

ISBN 978-80-87169-54-4 (p) ISSN 1404-4749 (e)

Produktita en Ĉeĥio / Produced in Czechia
2015

Esperantologio / Esperanto Studies

estas internacia revuo pri ĉiuj fenomenoj rilatantaj al esperanto. Ĝi aperigas artikolojn bazitajn sur originalaj studoj pri lingvosciencaj, historiaj, literatursciencaj, psikologiaj, sociologiaj kaj politikaj aspektoj de esperanto, same kiel recenzojn.

La revuo estas publikigata en du formoj, tamen enhave identaj: presita sur papero kaj rete alirebla.

La paperan version publikigas la eldonejo KAVA-PECH, Anglická 878, CZ-25229 Dobřichovice (Prago), Ĉeĥio.

La komputilreta versio estas publikigata de Upsala universitato sub la respondeco de profesoro Ingrid Maier. Ĝi estas alirebla ĉe la retadreso

www.cb.uu.se/esperanto/ .

Ĉiu aŭtoro rajtas verki aldonajn notojn al sia jam publikigita artikolo. Tiuj aldonoj povos enhavi korektojn, komentojn kaj novajn referencojn.

Pri prezoj kaj sendokostoj bonvolu informiĝi ĉe www.kava-pech.cz/ aŭ kontaktu info@kava-pech.cz .

Esperantologio / Esperanto Studies

is an international journal on all phenomena relating to Esperanto. It publishes articles based on original studies of the linguistic, historical, literary, psychological, sociological, and political aspects of Esperanto, as well as reviews.

The journal is published in two versions, which are identical in content: a print version and an electronic version.

The print version is published by KAVA-PECH, Anglická 878, CZ-25229 Dobřichovice (Prague), Czechia.

The electronic version is published by Uppsala University under the responsibility of Professor Ingrid Maier. It is available at the URL

www.cb.uu.se/esperanto/ .

Every author may add an appendix to her or his published paper. Such appendices may contain corrections, comments, and new references.

For prices and postage please consult www.kava-pech.cz or contact info@kava-pech.cz .

Konsiloj al aŭtoroj

Manuskriptojn verkitajn cele al publikigo en EES oni sendu al la redaktoro per komputilreta poŝto, prefere kiel $\text{\LaTeX}$ -dosieron, ĉe `kiselman@it.uu.se`.

Se tio ne eblas, sendu la tekston kiel retpoŝtan leteron aŭ surpapere al

Christer Kiselman
Uppsala universitato, Poŝtkesto 337
SE-751 05 Uppsala, Svedio.

Ĉiu artikolo estos submetita al juĝado de du spertuloj, kiuj restos nekonataj de la verkinto.

La bibliografio estu je la fino, kaj entekstaj referencoj al ĝi laŭ nomo, jaro kaj paĝnumero: Zamenhof (1983:365) aŭ (Zamenhof 1983:365) depende de la kunteksto. Bonvolu sekvi almenaŭ grandparte la *Unified style sheet for linguistics*, kiu estas facile trovebla en la reto. Inkludu la plenan individuan nomon kaj indiku la eldonejon.

La donitaĵoj aperu en la bibliografio tiel:

Waringhien, Gaston. 1989. *Lingvo kaj vivo. Esperantologiaj eseoj*. Dua eldono kun Apendico. Roterdamo: Universala Esperanto-Asocio. (Unua eldono 1959, La Laguna: J[uan] Régulo.)

Wüster, Eugen. 1955. La terminoj “esperantologio” kaj “interlingvistiko”. *Esperantologio* 1(4), 209–214.

Guidelines for authors

Manuscripts intended for publication in EES should be sent to the editor by e-mail, preferably as a $\text{\LaTeX}$ file, at `kiselman@it.uu.se`.

If this is not possible, then please send the text as a regular e-mail letter or a manuscript on paper to

Christer Kiselman
Uppsala University, P. O. Box 337
SE-751 05 Uppsala, Sweden.

The journal applies a refereeing system: every contribution is sent to two referees, whose identities will remain unknown to the author.

Put the bibliography at the end and refer to it in the text by name, year, and page number: Zamenhof (1983:365) or (Zamenhof 1983:365) depending on the context. Please give bibliographical details according to the *Unified style sheet for linguistics*, which is easy to locate on the web. Include the full individual name and indicate the editing company.

Bibliographical information should appear as follows in the list of references.

Waringhien, Gaston. 1989. *Lingvo kaj vivo. Esperantologiaj eseoj*. Second edition with an appendix. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio. (First edition 1959, La Laguna: J[uan] Régulo.)

Wüster, Eugen. 1955. La terminoj “esperantologio” kaj “interlingvistiko”. *Esperantologio* 1(4), 209–214.

ESPERANTOLOGIO

ESPERANTO STUDIES

EEI

Kajero 7 2015 Issue No. 7

Enhavo / Contents

Christer Kiselman: Salutvorto de la redaktoro	3–4
Christer Kiselman: A word from the editor	5–6
Věra Barandovská-Frank: Grava verko de la kreinto de Novial. Recenzo de la verko de Otto Jespersen, <i>Meine Arbeit für eine internationale Sprache</i>	7–9
Bernd Krause: „Vi vidis antaŭe la venkon de l’ vero!“ Leon Zamenhofs Nachrufgedicht auf Leopold Einstein von 1922	11–15
Wim Jansen: Kelkaj aspektoj de Esperanto laŭ Funkcia Diskurs-Gramatiko	17–40
Leif Nordenstorm: Views on Esperanto in the Bahá’í faith: A revised subchapter in <i>Bahá’u’lláh and the New Era</i>	41–60
Natalia Dankova: Future participles in the writings of Zamenhof	61–72
Christer Kiselman: Kombineblo de vortelementoj en esperanto – rigardoj malantaŭen kaj antaŭen	73–125
Christer Kiselman: Geraldo Mattos (1931–2014).....	126
Pri la revuo <i>Esperantologio</i> / <i>Esperanto Studies</i> 1999–2015	127

La paperan version publikigas

KAVA-PECH, Dobřichovice

Print version published by

La elektronikan version publikigas

Uppsala universitato

Electronic version published by

Uppsala University

Redaktoro / Editor

Christer KISELMAN, Uppsala University, Department of Information Technology,
P. O. Box 337, SE-751 05 Uppsala, Sweden. kiselman@it.uu.se

Redakta komitato / Editorial Board

Detlev BLANKE, Otto-Nagel-Straße 110, DE-12683 Berlin, Germany.
detlev@blanke-info.de

Probal DASGUPTA, Linguistic Research Unit, Indian Statistical Institute,
203 B. T. Road, IN-700108 Kolkata, India. probal53@gmail.com

Sabine FIEDLER, Universität Leipzig, Geisteswissenschaftliches Zentrum,
Beethovenstraße 15, DE-04107 Leipzig, Germany.
sfiedler@rz.uni-leipzig.de

Michel DUC GONINAZ, Chemin de l'Échelle 105,
FR-13100 AIX EN PROVENCE, France. michel.ducgoninaz@sfr.fr

GOTOO Hitosi, Tohoku University, Faculty of Arts and Letters, Department of
Linguistics, Sendai, JP-981 Japan. gothit@sal.tohoku.ac.jp

Wim JANSEN, Emmaplein 17A, NL-2225 BK Katwijk, The Netherlands.
wimjansen@casema.nl

Iłona KOUTNY, Uniwersitato Adam Mickiewicz, Interlingvistikaj studoj,
al. Niepodległości 4, PL-61-874 Poznań, Poland. ikoutny@amu.edu.pl

Erich-Dieter KRAUSE, Semmelweisstraße 7, DE-04103 Leipzig, Germany.
edklexik@t-online.de

Sergej KUZNECOV, Russian Federation, RU-125009 Moskva, Tverskaja 19-67.
univer1755@yandex.ru

Haitao LIU, Zhejiang University, School of International Studies, No. 866 Yuhang-
tang Road, CN-310058, Hangzhou, P. R. China. lhtzju@gmail.com

Ingrid MAIER, Uppsala University, Department of Modern Languages,
P. O. Box 636, SE-751 26 Uppsala, Sweden. ingrid.maier@moderna.uu.se

Marc VAN OOSTENDORP, Meertens Instituut, Joan Muyskenweg 25,
NL-1096 CJ Amsterdam, The Netherlands. Marc@vanOostendorp.nl

Humphrey TONKIN, University of Hartford, Office of the President Emeritus,
Mortensen Library, West Hartford, CT 06117-1599, USA.
tonkin@mail.hartford.edu

John C. WELLS, 5 Poplar Road, Merton Park, London SW19 3JR, UK.
j.wells@ucl.ac.uk

YAMASAKI Seikô, JP-185-0014 Tōkyō, Kokubunzi, Higasi Koigakubo 3-18-12, Japan.
syama@qf6.so-net.ne.jp

Salutvorto de la redaktoro

KARA LEGANTO

Estas ĝojo prezenti al vi la sepan kajeron de *Esperantologio*! Ĝi enhavas kvin originalajn studojn, el kiuj du en esperanto, du en la angla kaj unu en la germana. Krome aperas unu recenzo en esperanto.

★

Věra Barandovská-Frank verkis recenzon de membiografiaj materialoj el 1937/38 de la kreinto de Novial, Otto Jespersen. Aperis traduko el Novial en la germanan (2013), kaj Věra zorge prezentas kaj komentas la libron.

★

Bernd Krause memorigas nin pri poemo verkita de Leon Zamenhof (1875–1935; frato de L. L. Zamenhof) al la memoro de Leopold Einstein (1834–1890).

★

Wim Jansen, kiu publikigis du artikolojn en EES 6, prezentas en sia nuna artikolo la Funkcian Diskurs-Gramatikon, kiu estas la plej nova evoluo en la funkcia gramatiko iniciatita de Simon Dik (1940–1995). Wim klarigas la strukturon de FDG, inklude de ĝiaj helpaj komponantoj koncepta kaj kunteksta, per laŭorda konstruado de frazo.

★

Leif Nordenstorm prezentas la diskutojn pri universala lingvo ene de la Bahaa komunumo. En pluraj eldonoj de la grava verko *Bahá'u'lláh kaj la nova epoko* oni malsammaniere pledas por Universala lingvo, kiu iam helpas al unuigo de la homaro — iam klare por esperanto; iam ne same klare.

★

Natalia Dankova, kiu verkis pri verbaj formoj en esperanto en EES 4, nun revenas kun studo pri la uzado de kompleksaj tensoj kiuj enhavas aktivajn kaj pasivajn participojn, *-onta* kaj *-ota*, en la *Originala Verkaro* de Zamenhof. La jida, rusa kaj pola lingvoj ne havas similajn participojn kaj ne povis helpi lin ellabori regulojn, eĉ ne implicitajn, pri la uzado de tiuj participoj.

Natalia substrekas ke la rusa kaj pola emfazas aspektojn pli ol tempojn (paĝo 71). Tio estas grava konstato, kaj mi ŝatus aldoni ke ankaŭ orientaj

variantoj de la jida zorge distingas aspektojn, ĝuste kiel la rusa kaj pola, kvankam per aliaj rimedoj (Weinreich 1980:528; Kiselman 2011:89–90).

★

Christer Kiselman prezentas studon pri la kombineblo de vortelementoj en esperanto — kaj ties limigoj. Unue temas pri priskribo de la kombineblo en la Unua libro (1887) kaj *Fundamento de Esperanto* (1905); poste pri demandoj kiel pluri kun la principoj de kombineblo.

★

Geraldo Mattos estis membro de la Redakto komitato ekde la komenco en 1999. Mallonga notico aperas en tiu ĉi kajero.

★

Pri la aperiga politiko de la revuo bonvolu legi en la *Notico de la redaktoro* en kajero 1 (1999:3–4).

★

La revuo estas ia daŭrigo de la revuo *Esperantologio*, kiun Paul Neergaard (1907–1987) redaktis kaj eldonis dum la jaroj 1949–1961. Aperis ses kajeroj ampleksantaj entute 424 paĝojn. Pli pri Paul vi povos legi en mia artikolo (2012).

Tamen en la nuna revuo ni komprenas per la termino *esperantologio* pli vastan sciokampon ol oni faris en tiu de Neergaard.

★

Mi esperas ke vi ĝuos la legadon!

Christer Kiselman

Referencoj

- Kiselman, Christer. 2011. Variantoj de esperanto iniciatitaj de Zamenhof. *Esperantologio / Esperanto Studies* **5**, 79–149.
- Kiselman, Christer. 2012. Paul Neergaard: sempatologo kaj esperantologo. **En:** Blanke, Detlev (red.), *Pioniroj de la Internacia Lingvo. Aktoj de la 34-a Esperantologia Konferenco en la 96-a Universala Kongreso de Esperanto, Kopenhago 2011*, pp. 19–33. Roterdamo: Universala Esperanto-Asocio. ISBN 978-92-9017-117-1.
- Weinreich, Max. 1980. *History of the Yiddish Language*. Tradukita de Shlomo Noble kun la helpo de Joshua A. Fishman. Chicago; Londono: The University of Chicago Press.

A word from the Editor

DEAR READER:

It is a pleasure to present to you the seventh issue of *Esperanto Studies*! It contains five original studies, of which two are in Esperanto, two in English, and one in German. There is one review, in Esperanto.

★

Věra Barandovská-Frank has written a review of biographical writings from 1937/38 by the creator of Novial, Otto Jespersen. A translation from Novial into German appeared in 2013, and Věra carefully presents and comments on the book.

★

Bernd Krause reminds us about a poem written by Leon Zamenhof (1875–1935; brother of L. L. Zamenhof) to the memory of Leopold Einstein (1834–1890).

★

Wim Jansen, who published two articles in EES 6, now presents Functional Discourse-Grammar, which is the latest development in the functional grammar that was initiated by Simon Dik (1940–1995). Wim describes the FDG architecture, including the role of the extra-grammatical conceptual and contextual components. A simple clause is used to illustrate how a linguistic expression is built up.

★

Leif Nordenstorm presents discussions on a universal language in the Bahá'í community. In several editions of the important book *Bahá'u'lláh and the New Era*, one finds proposals on a Universal Language—sometimes clearly advocating Esperanto; sometimes less clearly indicating Esperanto.

★

Natalia Dankova, who wrote about temporality in Esperanto in EES 4, now returns with a study on the use of compound tenses containing active and passive future participles in the original writings of Zamenhof. Since Yiddish, Russian and Polish do not have future participles, they offered no guidance for him to set rules, not even implicit ones, about the use of future participles in compound tenses.

Natalia writes (page 71): “It is important to remember that Russian and Polish favour the expression of aspect over time. While Zamenhof does not speak of aspect in Esperanto, this influence manifests itself in the use of verbal forms in Esperanto, especially in the case of participles.” This is an important observation, and I would like to add that Eastern variants of Yiddish carefully distinguish aspects just like Russian and Polish, although with other means (Weinreich 1980:528; Kiselman 2011:89–90).

★

Christer Kiselman presents a study of the principle of combining word elements in Esperanto—and its limitations. First the methods of combination used in the First Book (1887) and the *Fundamento de Esperanto* (1905) are described; then questions are raised on how to proceed, if possible, with the idea of combining.

★

Geraldo Mattos was a member of the Editorial Board right from the start in 1999. A short note appears in the present issue.

★

For the editorial policy of the journal, please see the Editorial Statement in the first issue (1999:5–6).

★

The journal is a kind of continuation of the journal *Esperantologio*, which Paul Neergaard (1907–1987) edited and published during the years 1949–1961. Six issues were published, comprising a total of 424 pages. You can read more about Paul in my article (2012).

However, in the present journal, we use the term *esperantologio* ‘Esperanto Studies’ in a wider sense than one did in Neergaard’s journal.

★

I hope you will enjoy reading these articles!

Christer Kiselman

References

- Kiselman, Christer. 2011. Variantoj de esperanto iniciatitaj de Zamenhof. *Esperantologio / Esperanto Studies* 5, 79–149.
- Kiselman, Christer. 2012. Paul Neergaard: sempatologo kaj esperantologo. **In:** Blanke, Detlev (Ed.), *Pioniroj de la Internacia Lingvo. Aktoj de la 34-a Esperantologia Konferenco en la 96-a Universala Kongreso de Esperanto, Kopenhago 2011*, pp. 19–33. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio. ISBN 978-92-9017-117-1.
- Weinreich, Max. 1980. *History of the Yiddish Language*. Translated by Shlomo Noble with the assistance of Joshua A. Fishman. Chicago; London: The University of Chicago Press.

Grava verko de la kreinto de Novial

Věra BARANDOVSKÁ-FRANK

Recenzo de la verko

Otto Jespersen. 1937/38; 2013. *Meine Arbeit für eine internationale Sprache*. (Membiografiaj materialoj de la kreinto de Novial.) El Novial tradukis Kurt Neumann. Reprilaboris, komentis kaj kun bibliografio eldonis Reinhard Haupenthal. Bad Bellingen: Edition Itis. ISBN 978-3-943341-03-4, ISSN 1866-0622. 64 pp., broŝurita fotokopiaĵo, 14,5 × 21 cm.

Profesoro Otto Jespersen (1860–1943) estis famkonata dana lingvisto. Li estis membro de la Dana Akademio de la Sciencoj kaj de pluraj akademioj kaj sciencaj asocioj tra la mondo, honora profesoro de kelkaj usonaj kaj eŭropaj universitatoj. Lia bibliografio entenas 825 publikaĵojn. Liaj verkoj *A Modern English Grammar on Historical Principles* (unue eldonita en 1922) kaj *Growth and Structure of the English Language* (unue eldonita en 1905) estas ĝis nun mondvaste konsultataj. Respektata estas ankaŭ lia holisma teorio pri la ekesto de la homa lingvo. Al la ĝenerala lingvistiko Jespersen plue kontribuis per la teorio pri rango kaj plektaĵo kaj la koncepto de kunteksto. Krome li famiĝis kiel kunfondinto de la *International Phonetics Association*.

Ne malpli interesa estas lia interlingvistika laboro. Li lanĉis en 1930 la unuan difinon de interlingvistiko kaj tiel efektivigis la proponon starigitan en 1911 de Jules Meysmans. Jespersen engaĝiĝis en pluraj internaciaj lingvistikaj organizaĵoj: en *Academia pro Interlingua*, en la *Délégation pour l'adoption de la langue auxiliaire internationale*, en la Akademio de Ido kaj en *International Auxiliary Language Association* (IALA). Sian propran projekton Novial li publikigis en 1928. En 1934 la Ido-revuo *Mondo* transiris al Novial kaj renomiĝis *Novialiste*, aperante sub la redakto de Per Ahlberg (1864–1945) en Stokholmo.

La verko *Meine Arbeit für eine internationale Sprache*, kies danan origin-alon Per Ahlberg tradukis al Novial kun la titolo *Men labore por un international lingue* publikiĝis en du partoj: *Ante li mondemilitie* en *Novialiste* 18 (decembro 1937), pp. 297–318, kaj *Pos li monde-guere* en *Novialiste* 20–21

(junio 1938), pp. 322–336. En 1938 Jespersen mem uzis malpli longan danan version en sia propra biografio *En sprogmands levned* ‘La vivo de lingvemulo’ en la 9-a kaj 14-a ĉapitroj. Tiu ĉi biografio siavice aperis en 1995 en angla traduko, kun komentoj, fotoj kaj bibliografio. La nun prezentata germana traduko de Kurt Neumann estis jam publikigita kun komentoj kaj postparolo de Detlev Blanke en 1977 en Berlino (Zentraler Arbeitskreis Esperanto im Kulturbund der DDR). Observema leganto trovas tiun ĉi fakton en la bibliografia parto de la verko, ĉar Reinhard Haupenthal ne mencias ĝin en sia enkonduko, kvankam li tie dankas i.a. al Detlev Blanke pro “valoraj informoj kaj indikoj”.

Jespersen unue esprimas sian intereson pri artefaritaj lingvoj kaj sian engaĝiĝon ĉikampe. Li emfazas la rolon de Louis Couturat (1868–1914) kaj detale priskribas la laboron de la “Delegitaro por alpreno de internacia helpanta lingvo”, inklude de siaj personaj pritaksoj de unuopaj membroj, siajn kontaktojn kun ili, kaj kompreneble sian propran kontribuon al la ekesto de Ido. Ne mankas mencioj pri reago de esperantistoj kaj precipe de Zamenhof mem.

El la ĉapitro 1.6 oni ekscias pri origino de la mito longe ekzistinta inter la esperantistaro, nome ke la aŭtoro de Ido estas Louis Beaufront (1855–1935). Jespersen mem opiniis tion ĝis sia morto, nesciante, ke li estis miskompreninta erare adresitan leteron de Couturat.¹ Detale estas priskribata ankaŭ la persona renkontiĝo de Jespersen kun Zamenhof, streboj de parizaj esperantistoj atingi kunlaboron kun Jespersen, kaj la unua jardeko de la Ido-movado.

La dua parto komence mencias la aktivecon de la Ligo de Nacioj kaj la fondon de IALA, precipe personajn rilatojn de ties fondintino Alice Vanderbilt Morris (1874–1950) al Jespersen. Multe da loko estas kompreneble dediĉita al la projekto Novial. Tre gravaj estas informoj pri IALA-konferenco en 1930, kiu analizis ses internaciajn lingvojn inklude de Esperanto kaj Ido, kaj la Internacia Kongreso de Lingvistoj en 1931, dum kiu Jespersen sukcesis interesigi mondfamajn lingvistojn pri la graveco de internacia lingvo.

La lasta, koncize priskribita grava evento estas renkontiĝo de Jespersen kun Edgar de (von) Wahl (1867–1948), aŭtoro de *Occidental*. Detala dulingva raporto aperis en la aparta numero de *Novialiste* en junio 1935. La titolpaĝa foto el tiu ĉi eldono troviĝas ankaŭ sur la kovrilpaĝo de la prezentata verko.

Reinhard Haupenthal per tiu ĉi reldono evidente celas denove alirigi al germanlingvaj legantoj historian materialon pri la interlingvistika agado de Jespersen. Ni rememoru, ke la libro pri la projekto Novial aperis en 1928 en germana traduko de Siegfried Auerbach kaj ke Haupenthal mem estas eldoninta en 1976 germanan tradukon de la artikolo de Jespersen el la jaro

¹El priesploro de leteroj de Louis Couturat klaras, ke li estis la aŭtoro de Ido. Vidu ekzemple Blanke (1998:16).

1930 “A new science: interlinguistics” (mire, ĝuste tiun ĉi gravan artikolon mi vane serĉas en la bibliografia parto de la broŝuro). Lia merito konsistas, kiel li diras en la antaŭparolo, en zorgeme faritaj piednotaj komentoj pri personoj, okazaĵoj kaj publikaĵoj menciitaj en la prezentata teksto de Jespersen (tiaj piednotoj grandparte troviĝas ankaŭ en la angla traduko de la propra biografio de Jespersen), kaj aldono de ĝisdatigita bibliografio.

La broŝuro estas certe utila por germane legantaj interlingvistoj-historiemuloj. Nur ĝia kovrilo el ordinara 80-grama senbrila papero kun algluita slipeto de erarkorektoj vekas iom modestan impreson (la kajero de *Novialiste* el 1935, el kiu estas transprenita la kovrilpaĝa foto, estas aperinta sur bonkvalita duonbrila papero). Kiel stud- kaj labormaterialo ĝi estas nepre taŭga.

Referenco

Blanke, Detlev. 1998. Wilhelm Ostwald, Ido und die Interlinguistik. **En:** Becker, Ulrich; Wollenberg, Fritz (red.), *Eine Sprache für die Wissenschaft? Beiträge des Interlinguistik-Gedenkkolloquiums für Wilhelm Ostwald am 9. November 1996, an der Wirtschaftswissenschaftlichen Fakultät der Humboldt-Universität zu Berlin*, pp. 13–31. Interlinguistische Informationen, Beiheft 3. Berlino: Gesellschaft für Interlinguistik, 120 pp.

Věra Barandovská-Frank (n. 1952) studis klasikajn kaj modernajn lingvojn, doktoriĝis pri historio de antikva literaturo (PhDr.) kaj pri klasika filologio (Dr.). Habilitiĝis 1994 pri interlingvistiko ĉe Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) San Marino, kie ŝi estas profesorino. Instruis en Teknika Universitato Ostrava (CZ) kaj Universitato Paderborn (DE), estas honora profesoro de Blaga-Universitato Sibiu (RO), ekstera instruanto de Konstantin-Universitato Nitra (SK) kaj de la Interlingvistikaj Studoj ĉe Mickiewicz-Universitato Poznań (PL). Ŝi estas aktiva membro de la germana societo pri interlingvistiko (Gesellschaft für Interlinguistik) kaj krome engaĝiĝas en la movado por la viva Latina. Ŝi laboras en Instituto por Kibernetiko en Paderborn kiel eldonistino kaj redaktoro de la revuo *Grundlagenstudien aus Kybernetik und Geisteswissenschaft* kaj verkis centon da publikaĵoj.

Adreso: Kleinenberger Weg 16 a, DE-33100 Paderborn, Germanio

Retpoŝta adreso: <barandov@mail.uni-paderborn.de>

Ricevita 2013-08-04

Akceptita por publikigo 2013-08-06

„Vi vidis antaŭe la venkon de l’ vero!“

Leon Zamenhofs Nachrufgedicht auf Leopold Einstein von 1922

Bernd KRAUSE

Der Nürnberger Lehrer und Schriftsteller Leopold Einstein (1833–1890) war zweifellos einer der prägenden Persönlichkeiten in den ersten Jahren der Esperanto-Bewegung. Er war derjenige, der 1888, nur ein Jahr nach der Veröffentlichung von Ludwik Lejzer Zamenhofs Plansprachenprojekt, dafür sorgte, dass der bereits 1885 gegründete Nürnberger Weltspracheverein sich fortan als weltweit quasi erste Esperanto-Ortsgruppe der Pflege dieser „Lingvo internacia“ verschrieb.² Im gleichen Jahr erschien auch seine für die weitere Verbreitung des Esperanto maßgebliche Schrift *La lingvo internacia als beste Lösung des internationalen Weltspracheproblem — Lehrbuch und Propagandaschrift für Esperanto zugleich*. Einstein, der sich zuvor, vorbehaltlich des Erscheinens eines besseren Projektes, für Volapük stark gemacht hatte,³ war von der Wirksamkeit des Esperanto so überzeugt, dass er an dessen Schöpfer Zamenhof schrieb: „La demando de lingvo tutmonda estas fine absolute solvita!“⁴ (Die Frage einer universellen Sprache ist endlich umfassend gelöst!)

In Nürnberg erinnert noch heute ein unscheinbares Denkmal an die Verdienste Einsteins: An seinem letzten Wohnhaus, Weinmarkt 14, findet man eine Gedenktafel, angebracht 1990, genau hundert Jahre nach dem viel zu frühen Tod des Nürnberger Esperanto-Pioniers am 9. September 1890. Die

²Vgl. hierzu ausführlich vom Verf., „125 Jahre Esperanto in Nürnberg. Interessantes und Wissenswertes aus den frühen Jahren“, in: *90a Germana Esperanto-Kongreso, Nürnberg, 17.–20.05.2013*, Kongreslibro, [hrsg. von der Esperanto-Gruppe Nürnberg und vom Deutschen Esperanto-Bund], [Nürnberg 2013], S. 31–51.

³Anlässlich einer Besprechung von Peter Steiners 1885 veröffentlichtem Plansprachenprojekt *Pasilingua* äußerte Einstein: „Sollte einmal etwas besseres als Volapük erscheinen, so werde ich es als erster proklamieren, denn das bessere ist immer der Widersacher des guten.“ Diese Aussage zitiert Einstein drei Jahre später selbst in: *La lingvo internacia als beste Lösung des internationalen Weltspracheproblems: Vorwort, Grammatik und Styl nebst Stammwörter-Verzeichniß nach dem Entwurf des Pseudonymen Dr. Esperanto*, zum ersten Male methodisch geordnet und ausgearbeitet, Nürnberg 1888, S. 3.

⁴Zit. nach Zamenhofs Nachruf „Leopoldo Einstein“ in: *La Esperantisto*, Jahrgang 1, Nr. 10, Oktober 1890, S. 49–50, hier S. 50, linke Spalte.

Nürnberger Esperantisten kamen damit einer Aufforderung Zamenhofs nach, der postuliert hatte, dass man seinen Namen in goldenen Lettern festhalten müsse: „[...] lia nomo devas esti enskribata per oraj literoj en la historio de E.“⁵ Die Inschrift war ursprünglich tatsächlich in Gold gefasst.⁶ Zamenhof selbst war es auch, der ohne Angabe seiner Autorschaft unmittelbar nach dem Tod Einsteins in *La Esperantisto*, dem weltweit ersten Esperanto-Periodikum (Erscheinungsdauer 1889 bis 1895), einen Nachruf veröffentlichte;⁷ er schließt mit den Worten: „Paco al Via cindro, nia kara frato kaj kunbatalanto!“ Die Bedeutung, die Zamenhof dem Verstorbenen darin zumisst, lässt sich auch daran ablesen, dass der Nachruf noch Jahre später im französischen Journal *L’Esperantiste* (1903)⁸ sowie, dieser unwesentlich gekürzten Fassung folgend, auch im *Germana Esperantisto* (1906)⁹ erneut abgedruckt wurde.

Es soll schließlich nicht unerwähnt bleiben, dass es noch eine weitere zeitnahe schriftliche Würdigung der Leistungen Einsteins gibt: Die Nürnberger Stadtchronik, eine über mehrere Jahrhunderte geführte Auflistung der wichtigsten Ereignisse der Stadtgeschichte, beschreibt Einstein anlässlich seines Todes als anfänglich begeisterten Anhänger, später aber entschiedenen Gegner des Volapük, „da er sich zu einer anderen, noch ‚besseren‘ [sic!] Weltsprache (Esperanto) bekehrt hatte.“¹⁰

Nicht in goldenen, sondern „nur“ in schlichten schwarzen Druckbuchstaben zu lesen ist ein weiteres „Denkmal“, das an die Leistungen Einsteins erinnern soll. Es handelt sich dabei um ein Nachrufgedicht, zu finden in der Beilage *Revuo*, Numero 1, November 1922 (Seite 4), die als „Monata Aldono“ dem Kölner Blatt *Esperanto Triumfonta* (später geführt als *Heroldo de Esperanto*) beigegeben ist. Hierbei handelt es sich um ein Periodikum und Mitteilungsorgan, das in jenen Jahren neben dem *Germana Esperantisto* für die Esperanto-Bewegung in Deutschland zentrale Bedeutung hatte; das Gedicht dürfte also einen breiten Leserkreis erreicht haben. Sein Verfasser ist Leon Zamenhof (1875–1935), der Bruder des Esperanto-Schöpfers, und es lautet wie folgt:¹¹

⁵Zit. nach *Enciklopedio de Esperanto*, redaktis L[a]jos Kókény kaj V[ilmos] Bleier, Budapest 1933, Art. „Einstein“.

⁶Ein Foto der Tafel in heutigem Zustand findet sich u. a. auf der Archivseite der Nürnberger Esperanto-Gruppe, <http://esperanto-nuernberg.wikispaces.com/Geschichte> (Aufruf: 13.9.2013).

⁷Siehe Anm. 3.

⁸6e Année, No. 70, 31 Octobre 1903, S. 141–144, mit französischer Übersetzung.

⁹3-a Jaro, 1906, No. 2 (Februaro), S. 13–14 u. No. 3 (Marto), S. 25–26, mit deutscher Übersetzung.

¹⁰Stadtchronik, Bd. 1890, S. 777, hier zit. nach einer überprüften Abschrift des Eintrages aus dem im Stadtarchiv Nürnberg aufbewahrten Original, wiedergegeben im Begleitblatt zum Festakt der Enthüllung der Gedenktafel am Haus Weinmarkt 14 (in Kopie enthalten in der Akte Esperantoclub Nürnberg, Nr. 7, 1990, Stadtarchiv Nürnberg, Sign. E 6/1199).

¹¹Die Anordnung der Strophen folgt dem Originaldruck.

Al la rememoro de L. Einstein.

Al ni Vi profetis el mond' forirante *)	Standardon nun tenas la nova idaro.
Triumfon de nia komuna afero.	Certec', ne espero ĝin gvidas al celo
Profete estonton anime sentante,	Sur voj' kvankam staras nun ankaŭ la baro,
Vi vidis antaŭe la venkon de l' vero!	Haveno ridetas al ĝi tra malhelo!

Forflugis jararo, hodiaŭ la kvaran	Kaj jen en momento de venko proksima
Travivas jardekon ni en batalado,	Ariĝas en muroj de via naskloko
La mort' maldensigis la vicon anaran	La samideana kongreso kutima,
De Viaj amikoj en kunlaborado.	Sed ne laŭ hazardo — laŭ kora alvoko!

Metinte sur nian altaron komunan	De ĉiuj mokito iama junulo
De siaj penadoj plej noblan oferon,	De Vi la unue al kor' alpremita,
La unuj ĝisvivis realon pli sunan,	Hodiaŭ ekstaros altkreska fortulo
Aliaj forportis kun si nur esperon ...	Por meti la florojn sur tombo merita.

Do estu proksima kongreso modesta
 Al Via memor' destinita soleno,
 Ĝi estos la signo — la plej manifesta
 Por Vi varmiginta al venka elteno!

D-ro Leono Zamenhof.

*) L. Einstein mortante skribis al Dr. L. L. Zamenhof jenajn vortojn: „Mi jam ne vidos la triumfon de nia sankta afero, sed Vi ne perdu esperon kaj laboru; diversaj malhelpoj povas malfruigi ĝian progreson, sed nenio povas malhelpi ĝian finan venkon.“

Formal bietet diese „Rück Erinnerung“ keinerlei Schwierigkeiten: Sieben Strophen (im Folgenden mit römischen Zahlen bezeichnet) zu je vier Versen (arabische Ziffern), die in gewöhnlichen Kreuzreimen angeordnet sind. Nicht ganz einfach zu verstehen ist aus heutiger Sicht jedoch der Inhalt, wofür nicht nur der zeitliche Abstand verantwortlich ist.

Wie der originalen Anmerkung zu entnehmen ist, wird zunächst Bezug auf einen Brief des Gewürdigten genommen, den dieser, bereits im Sterben liegend („el mond' forirante“, I, 1), auf seinem Totenbett verfasst hatte. In seinem bereits erwähnten Nachruf auf Einstein gibt der Empfänger des Briefes die hier zitierte Passage abweichend so wieder: „Mi estas maljuna kaj malsana kaj ne vidos jam la venkon de nia sankta bela afero, sed Vi ĝin vidos baldaŭ, baldaŭ en ĝia tuta beleco. Se eĉ pasos kelka nombro da jaroj en malfacila batalado, ne perdu la kuraĝon kaj laboru. Antaŭ ol nia centjaro finiĝos, nia afero venkos, kaj la kuraĝaj konstantaj batalantoj havos dolĉan rekompencan.“¹² Und weiter, in metaphorischer, aber eindeutiger Sprache:

¹²Wie Anm. 3, hier: S. 50, rechte Spalte.

„La vintro ne volas foriri kaj obstine batalas kontraŭ la alvenanta somero; sed malgraŭ la nuboj kaj la frostoj la somero baldaŭ venkos. Tiel ankaŭ pasantaj malfacilaĵoj povos malrapidigi por kelka tempo la iradon de nia afero, sed neniam nuboj kaj frostoj povos reteni ĝian finan venkon.“ Auffällig an dieser Version ist vor allem, dass Einstein den „Sieg unserer heiligen schönen Sache“ („la venkon de nia sankta bela afero“) — gemeint ist natürlich die Durchsetzung des Esperanto als Weltsprache — bereits für das Ende des ausgehenden Jahrhunderts prophezeit; ein Detail, das in Leon Zamenhofs Rememorero aus guten Gründen fehlt. Einstein konnte ja nicht vorausahnen, dass die Probleme, die er in seiner bildhaften jahreszeitenbezogenen Vision andeutet, die Esperanto-Bewegung noch bis weit in das nachfolgende Jahrhundert hinein begleiten sollten. Leon Zamenhof fasst hier großzügig zusammen zu „diversaj malhelpoj“ und legt Einstein diese Phrase sozusagen posthum in den Mund, so dass dessen Worte dadurch noch prophetischer wirken, als sie es ohnehin schon tun.

Der Würdigung der Vision Einsteins schließt sich ein allgemein gehaltener, jedoch ausgesprochen pathetische Züge tragender Rückblick auf die vergangenen Jahrzehnte des Kampfes an — man befinde sich nun bereits im vierten, so heißt es in der zweiten Strophe. Fast schon verächtlich wirkt dabei die natürlich auf die Gegnerschaft des Esperanto bezogene Feststellung, dass diese nur Hoffnung davontrage (III, 4), wohingegen innerhalb der Esperanto-Bewegung nun Gewissheit („certeco“) an die Stelle der Hoffnung getreten sei (IV, 2) — zumindest die Gewissheit des nahen („proksima“) Sieges (V, 1).

Dieser Sieg wird nun genau lokalisiert, er fällt nämlich zusammen mit dem bevorstehenden Esperanto-Weltkongress, der 1923 in Nürnberg stattfinden sollte. Dieses Ereignis war natürlich auch der wahre Anlass für die Entstehung des Gedichtes, worauf übrigens auch der Kontext hinweist, in dem seine Veröffentlichung erfolgte: Die gesamte Revuo vom November 1922 ist der Kongressstadt Nürnberg gewidmet. Zusätzlich wird hier ein konkreter Bezug zu Einstein hergestellt, indem explizit auf seinen Geburtsort („via naskloko“, V, 2) hingewiesen wird. Der war zwar keineswegs Nürnberg, doch kann man Leon Zamenhof diesen kleinen Fauxpas mit gutem Gewissen nachsehen, zum Einen, da der wahre Geburtsort Einsteins, Roth, nicht weit von Nürnberg entfernt ist (Geburtsdatum war übrigens der 28. November 1833), zum Anderen, weil Nürnberg die Stadt war, in der der Weltsprachler Einstein gelebt und maßgeblich gewirkt hat. Man könnte aber auch auf den Gedanken kommen, dass an dieser Stelle gar nicht Einstein, sondern die Sprache Esperanto angesprochen ist. Das wiederum ginge konform mit der Überschrift des Beitrags von Richard Lehmann, der die Revuo eröffnet: „Nürnberg, la lulilo de la Esp. movado.“ Ähnlich rätselhaft liest sich auch der Beginn der sechsten Strophe, denn mit dem einst von allen verspotteten Jüngling („mokito iama junulo“, VI, 1) könnte erneut die Sprache Esperanto gemeint sein, der sich Einstein

dann annahm und sie als Erster („la unue“) an sein Herz drückte (VI, 2). Belohnung für diese Tat — hier erfolgt nun ein Sprung in die nahe Zukunft — werde die Belegung seines Grabes („tombo merita“, VI, 4) mit Blumen sein. Schließlich wird ganz explizit dazu aufgefordert, den anstehenden Kongress auch zu einer Feier der Erinnerung an Einstein werden zu lassen (VII).

Es bleibt noch die Frage nach einer Bewertung dieses Nachrufs, die aber nicht ganz einfach zu beantworten ist: Soll hier wirklich an Leopold Einstein erinnert werden? Angesichts der Tatsache, dass dessen Leistungen — Vermittlung des Esperanto an den Nürnberger Weltspracheverein, der sich als erste ortsgebundene Gruppe dessen Pflege widmete, sowie Verfassen des einflussreichen Lehrbuchs von 1888, *La lingvo internacia*, und weiterer Schriften — in Leon Zamenhofs Gedicht nicht einmal ansatzweise Erwähnung finden, lässt Zweifel daran aufkommen. Im Vordergrund steht vielmehr eine hochpathetische, fast schon beschwörende Züge tragende Verherrlichung eines nahen Sieges, der am Ende eines mühevollen Kampfes um die Weltsprachenherrschaft steht — ein Kampf freilich, der weder in Einsteins Sinn gewesen sein dürfte noch von ihm initiiert wurde. Im Gegenteil: Aufgrund seines frühen Todes hat er all die Auseinandersetzungen um die am besten geeignete Weltsprache, die die ersten Jahrzehnte des 20. Jahrhunderts geprägt haben, überhaupt nicht mitbekommen. Eine wirkliche Erinnerung an Einstein liegt allerdings insofern vor, als das Gedicht als realen „Aufhänger“ die in der ersten Strophe paraphrasierte Vision des Nürnberger Esperantisten benutzt, wenn auch in leicht verfälschter Form. Und auch die abschließende Aufforderung, den bevorstehenden Kongress zur Erinnerungsveranstaltung an Einstein werden zu lassen, hat durchaus Berechtigung, denn ohne ihn wäre es möglicherweise gar nicht zu einer weiteren Verbreitung des Esperanto gekommen.

Bernd Krause (n. 1963) studis muziksciencon, filozofion kaj historion en Münster (Westfalio) kaj doktoriĝis pri la esprimo “con brio”, precipe en la verkoj de Beethoven. Hodiaŭ li loĝas en Forchheim (Frankonio, Germanio) kaj laboras kiel liberprofesia historiisto. Kampoj de esploro estas i.a. muzikhistorio kaj muzikteorio (precipe de la 18-a kaj 19-a jarcentoj), orgenscienco, paleografio, onomastiko kaj historio de planlingvoj. De 2009 ĝis 2012 li estis prezidanto de la Bavara Esperanto-Ligo (BELO). Listo de publikaĵoj kaj pliaj informoj troviĝas sur lia retejo.

Adreso: Stauffenbergstraße 8, DE-91301 Forchheim

Retpoŝta adreso: <bernd.krause@geschichtswissenschaften.com>

Persona retejo: www.geschichtswissenschaften.com

Eingegangen am 2013-10-01

Zur Veröffentlichung angenommen am 2014-01-21

Kelkaj aspektoj de Esperanto laŭ Funkcia Diskurs-Gramatiko

Wim JANSEN

Enhavo

1. Enkonduko
2. Funkcia Diskurs-Gramatiko
 - 2.1. La ĝenerala arkitekturo
 - 2.2. La koncepta komponanto
 - 2.3. La kunteksta komponanto
 - 2.4. Neglekto de la kunteksta komponanto
3. La gramatika strukturo
 - 3.1. La kvar niveloj de la gramatiko
 - 3.2. Semantika hipotezo en la leksiko
 - 3.3. Truo inter la semantika kaj morfosintaksa niveloj
4. Konkludo
Glosoj
Bibliografio

Resumo. Funkcia Diskurs-Gramatiko aŭ FDG estas la plej nova evoluo en la funkcia gramatiko iniciatita de la nederlanda lingvisto Simon Dik (1940–1995). En tiu ĉi artikolo la strukturo de FDG estas priskribita, inkluzive de ĝiaj helpaj komponantoj koncepta kaj kunteksta. Simpla demanda frazo estas uzata por bildigi la konstruon de lingva esprimo ekde la (pragmatika) intenco ĝis la artikulacio kaj la interagon inter la diversaj gramatikaj kaj la koncepta kaj kunteksta komponantoj. Al ĉi-lastaj la artikolo donas relative multan atenton, ĝuste tial, ke pli tradiciaj priskriboj de Esperanto ilin neglektas kaj sekve ne kapablas kontentige klarigi kelkajn malfacilaĵojn, kiujn la lingvo prezentas. Laŭ la sama perspektivo la artikolo pritraktas kelkajn (ne)kontinuaĵojn en la gramatika strukturo mem, kiuj obstaklas la lernfacilecon de la lingvo.

Abstract.

Some aspects of Esperanto according to Functional Discourse-Grammar

Functional Discourse-Grammar or FDG is the latest development in the functional grammar that was initiated by the Dutch linguist Simon Dik (1940–1995). In this paper, the FDG architecture is described, including the role of the extra-grammatical conceptual and contextual components. A simple interrogative clause is used to illustrate how a linguistic expression

is built up from the formulation of its (pragmatic) intention to its articulation, and to show the interaction between the different grammatical and the conceptual and contextual components. Relatively much attention is paid to the latter two just because conventional descriptions of Esperanto tend to neglect them and, as a result of this, fail to clarify certain difficulties in the language satisfactorily. In the same vein, the paper deals with a number of (dis)continuities in the grammatical structure itself, which go against the ease of learning the language.

Noto. Praformo de tiu ĉi teksto estis prezentita dum la Malferma Tago en la Centra Oficejo de UEA en Roterdamo, la 10-an de majo 2014. Mi dankas Christer Kiselman, kiu, en la sekva diskuto, donis al mi la okazon pliklarigi, ke figuro 1 modelas ne la mekanismon, kiu ebligas al ni produkti parolatan lingvaĵon, sed la gramatikon de la homa lingvo ĝenerale. Mi dankas Rob Moerbeek pro liaj komentoj pri la (poseda) refleksivo, kio donis al mi la okazon ree substreki, ke la demando pri la “bezono” je certaj elementoj en la Esperanta gramatiko ne estu interpretata absolute kiel ‘neceso kontraŭ superflueco’, sed ke ĝi pivotas ĉirkaŭ la relativa “redundeco” de tiaj elementoj. Mi speciale dankas Angela Tellier, kiu atentigis min pri kelkaj eraroj en la sagostrukturo de figuro 1, kiujn mi korektis por tiu ĉi definitiva teksto. Mi tre aprezas la saĝajn komentojn, kiujn mi ricevis de anonima provleginto, kaj kiuj kondukis al kelkaj gravaj plibonigoj en la ĉi tie prezentata rezulto.

Mallongigoj

A	adjekto	PL	plural-operatoro
AG	aganto	PN	pragmatika nivelo
DEM	demand-operatoro	PRZ	prezenc-operatoro
FN	fonologia nivelo	S	subjekto
MN	morfosintaksa nivelo	SN	semantika nivelo
NTR	netransitiva	TR	transitiva
O	objekto	V	verbo
P	priagato		

1. Enkonduko

Sub la kapvorto *gramatiko* ni trovas en PIV plurajn difinojn. Temas unue pri la “scienco pri la lingvaj reguloj”; ene de tio, ĝenerala gramatiko estas nomata la “scienco pri la reguloj komunaj al ĉiuj lingvoj”. Laŭ la dua perspektivo en PIV temas pri la “tuto de la reguloj kiujn oni devas observi por ĝuste paroli aŭ skribi difinitan lingvon”. Tiun difinon ni plej bone konas en rekta kombino kun la sekvanta tria perspektivo, kiu estas la “libro klariganta tiujn regulojn”. La tri cititajn perspektivojn mi volas trakti en tiu ĉi artikolo, komencante ĉe la gramatiko kiel scienca disciplino, por fine dediĉi kelkajn vortojn al la plej aŭtoritataj regularoj aŭ preskribaj gramatikaj verkoj pri nia lingvo.

La artikolo estas strukturita jene. En sekcio 2.1 mi mallonge prilumas Funkcian Diskurs-Gramatikon¹ aŭ FDG, kiu estas la teoria kadro elektita por la studo. En la sekcioj 2.2 kaj 2.3 mi pritraktos laŭvice la konceptan kaj la kuntekstan komponantojn de FDG, kiuj estas ĝiaj nemalhaveblaj ekstergramatikaj akompanantoj. En sekcio 2.4 mi pristudas elementon en la Esperanta gramatiko kies neglekto de la funkciado de la kunteksta komponanto povas klarigi ĝian malfacilecon en la praktiko. Temas pri la poseda refleksivo.

En sekcio 3.1 ni transiras en la gramatikon mem. La tuta stratuma konstruaĵo kun siaj kvar niveloj (pragmatika, semantika, morfosintaksa kaj fonologia) estos traktata, sekvante unu modelan, ekzemplan frazon en Esperanto tra ĉiuj niveloj. Analoge al tio kion mi prezentis en 2.4, mi analizos en la sekcioj 3.2 kaj 3.3 du aspektojn de la Esperanta gramatiko kiujn lernantoj ofte trovas malfacilaj. Uzante instrumentojn de FDG mi traktos en 3.2 la sufiksojn *-ig* kaj *-iĝ*, kaj en 3.3 la pluralakordon. En sekcio 4 mi prezentas mian konkludon el tiu ĉi studo.

2. Funkcia Diskurs-Gramatiko

2.1. La ĝenerala arkitekturo

Laŭ la unua perspektivo de PIV, Funkcia Diskurs-Gramatiko (FDG) — rekta daŭrigo de Funkcia Gramatiko kreita de la nederlanda lingvisto Simon Dik (1940–1995) — estas tia ĝenerala gramatiko.² Temas pri teorio kiu estas funkcia, tiusence ke ĝi eliras de la supozo ke la proprajoj de lingvaj esprimoj sekvas el la komunikaj celoj kiujn la lingvouzanto klopodas por plenumi en sia interagado kun aliaj uzantoj. En sia plej ekstrema formo la funkciismo eĉ neas la kognan realecon de lingvaj strukturoj kaj konsideras ĉiujn lingvajn formojn efemeraj manifestaĵoj por atingi iun komunikan celon.

La funkciismo en la lingvistiko kontrastas kun la formismo, kiu estas forte ligita al la hipotezo ke en ĉiu homo ekzistas kunnaskita mensa strukturo kiu stiras la homan lingvon kaj kies subkuŝantaj proprajoj estas konsiderataj neklarigeblaj el rekte observataj lingvaj fenomenoj. En sia plej radikala esprimo, la formismo okupiĝas sole pri la subkuŝanta lingvostrukturo, sen konsideri ĝian uzatecon en la praktiko.

FDG, kiu proklamas sin mem funkcia sed form-orientita, situas inter la ekstremoj de funkciismo kaj formismo. Ĝi provas doni eksplicitan kaj formalan priskribon de la kono, kiu estas antaŭkondiĉo por la perlingva komunika

¹Mi ripetas ĉi tie mian pliampleksigon de la PIV-a difino de diskurso, t.e. ‘kohera teksto [parola, skriba aŭ gesta] kiu reprezentas sencohavan komunikon kaj kies amplekso povas iri de unu vorto ĝis tuta frazaro’ (vidu EES 6:10).

²La plej kompletan priskribon de FDG oni trovas en Hengeveld & Mackenzie (2008). Tiu ĉi resumo multe profitis de ĝia ĉapitro 1.


potencialo kiun la homo posedas. Ĝi atribuas al la lingvouzanto la konon pri lingvaj elementoj (leksikaj, sintaksaj, fonologiaj, k.s.) kaj la konon pri ilia aplikeblo (por krei diskursagojn[°],³ frazojn[°], intonaciajn grupojn, k.s.). Laŭ FDG estas konstatebla relative granda interlingva stabileco de tiuj konoj, kio pravigas komparajn studojn, sed skolanoj de FDG konsideras tiujn konojn la rezulto de longa historia evoluo, kiu restigis taŭgajn formojn kaj eliminis malpli sukcesajn el la repertuaro de sinsekvaj generacioj de lingvouzantoj tra la jarcentoj. La strukturoj kiujn lingvouzantoj en iu periodo elektas por enkodigi siajn funkciajn dezirojn povas vari de unu lingvo al alia, sed ilia variivo ne estas senlima. Ilin limigas antaŭ ĉio la varieco de la funkciaj deziroj mem (eventuale granda, sed ne senfina) kaj limigoj de la homa kognosistemo. Por ilustru tion: interlingve regas forta prefero por diskursagoj kun unu sola fokuso[°]. Nur en specifaj cirkonstancoj, ekzemple en demandoj enkondukitaj per korelativo, *Kiu diris tion al kiu?*, oni povas havi du (ĉu eĉ pli?). La detaloj de tiu licenco varias de lingvo al lingvo, kaj ekzistas lingvoj kiuj entute malhavas tiun eblon, kvankam multobla fokuso ŝajnas tiel alloge ekonomia. Por studi tiajn diferencojn kaj similaĵojn, tipologiaj studoj ludas gravan rolon en FDG. Ilia celo estas malkovri kaj sistemece, interlingve priskribi la limojn de la variivo, pli bone konatajn sub la nomoj de lingvaj universalaĵoj[°] kaj de universale validaj implicaj hierarkioj[°].

Devus esti klare por ĉiu leganto ke, se oni volas enkadrigi la studon pri Esperanto en iun teorion pri la homa lingvo, la funkciismo prezentas sin kiel bona kandidato. Ĝi eliras de ni homoj kiel observeblaj kaj aŭtoritataj lingvouzantoj, heredantoj de historie evoluinta konsistemo pri lingvaj elementoj kaj ilia aplikado, demonstreble kapablaj interkomunikiĝi perlingve. Se parolantoj de Esperanto plenumas siajn komunikajn dezirojn per la lingvo kiun ili uzas, tiu lingvo estas do studinda kaj komparinda kun aliaj lingvoj.

La submeto de Esperanto al analizo laŭ iu teoria kadro de la ĝenerala lingvistiko ebligas al ni malkovri aspektojn de Esperanto kiuj sen ia ajn dubo restus kaŝitaj, se la esperantologio limigus sin al la pristudo de lingvaj fenomenoj el la vidpunkto de ilia ekzisto kaj funkciado laŭ la mezuriloj de FdE kaj ĝiaj idoj PAG kaj PMEG. Tio estus kvazaŭ voli esprimi objektivan juĝon pri la prestado⁴ de aŭtomobilo surbaze de la teknika broŝuro de ĝia produktinto. (Kiel kadron mi elektis FDG pro persona ŝato kaj apogate de la fakto ke mia katedro pri Interlingvistiko kaj Esperanto en Amsterdamo rezidis en medio mergita en funkciismon; per tio mi esprimas nenian juĝon pri la valoro de aliaj gramatikaj skoloj). La submeto de Esperanto al FDG iusence signifas

³Vortoj kiujn sekvas la gradosigno [°] estas klarigitaj en la Glosoj ĉe la fino; paĝoj 37–39.

⁴Mi uzas la netransitivan radikon *prest-* kaj ĝian verban formon *presti* kun la signifo de la angla ‘to perform’, t. e. ‘kondukti aŭ funkcii en rilato kun iu atendo, prognozo aŭ preskribo’.



Figuro 1. La ĝenerala arkitekturo de FDG.

la submeton de FDG al Esperanto, kiu en tiu ĉi rolo ja funkcias kiel kontrol-lingvo de la teorio. Kaj ĝuste Esperanto kun sia unika strukturo povus havi ion por kontribui al la pluevoluigo de la FDG-instrumentaro.

Laŭ sia nomo FDG estas gramatiko, sed pli ĝuste dirite ĝi estas la gramatika komponanto de pli ampleksa teorio de homa perlingva interkomunikado, akompanata de aliaj, helpaj komponantoj. FDG (vidu figuron 1) estas stratuma konstruaĵo en kiu, stratumon post stratumo, formiĝas ĉiu lingva mesaĝo. La sinsekve trairataj stratumoj estas la **pragmatika**, la **semantika**, la **morfosintaksa**^o kaj la **fonologia** niveloj. Super la gramatiko staras la **koncepta komponanto**. Flanke ĝi estas apogata de la **kunteksta komponanto**, kaj ĝin finas la **produkta komponanto**. Antaŭ ol eniri en la gramatikon mem, mi priparolos la du helpajn komponantojn unu post la alia en la sekcioj 2.2 kaj 2.3. Pro pure praktikaj kialoj mi volas nomi unue la produktan komponanton, ĉar en la kadro de tiu ĉi artikolo mi limigos min al tiu ĉi tre konciza mencio. La produkta komponanto estas la teknika konvertilo de la gramatike jam kompleta lingva esprimo al perceptebla realigo, t.e. aŭdebla sonrealigo (fonetika realigo), aŭ videbla gesta realigo, aŭ videbla aŭ palpebla skriba realigo. En tiu ĉi teksto mi do ne okupiĝos pri la artikulado de fonologiaj strukturoj kaj, sekve, ne traktos la produktan komponanton.

Malgraŭ tio ke la procezoj en FDG finiĝas en la produkta komponanto kaj ke kutime oni konsideras la parolan mesaĝon aŭ ĝian skriban version la finprodukto por plua studo, gravas substreki ke FDG celas modeli ne la parolprocezon, sed la gramatikan strukturon de homa lingvo. FDG baziĝas sur la elirpunkto ke gramatika modelo estas des pli efika ju pli ĝi similas al la procezado tiel, kiel ĝi disvolviĝas en la homa menso. En tiu kampo, la psikolingvistika laboro de Levelt (1991 [1989]) klare montras, ke tiu mensa procezado fontas en intencoj kaj finiĝas en la artikulacia produktado de lingvaj esprimoj.

2.2. La koncepta komponanto

Ne en la gramatiko mem, sed en la koncepta komponanto naskiĝas la komunika intenco de la parolanto kaj konturiĝas la strategioj kiujn oni planas eluzi por efektivi tiun intencon. La koncepta komponanto (tute supre en figuro 1) konsistas el tiuj elementoj, kiuj estas nemalhaveblaj por la celata lingva interkomunikado kaj kiuj apartenas al la kono de la mondo kiu nin ĉirkaŭas. Kiel parto de la homa kognosistemo ĝi estas superlingva kaj universala, kaj la lingva esprimebleco aŭ neesprimebleco de certaj komunikaj intencoj povas dependi de ĉiu aparta lingvo, tia kia ĝi estas lernata de ĉiu homo en ties propra lingvomedio. Estas la koncepta komponanto, kiu aktivigas la lingvospecifan gramatikon, por ke ĝi ellaboru la lingvan mesaĝon kun la intencata komunika intenco.

Ni prenu ekzemplon: ĉiuj interhomaj rilatoj estas karakterizataj de iu nivelo de formaleco, t.e. interhomaj hierarkioj ekzistas tra la tuta mondo. Ili ekzistas eksterlingve kaj okupas skalon kiu povas iri de kompleta neformaleco, amikeco aŭ intimeco al severa formaleco aŭ interdistanco. En Esperanto, tiu aspekto ne ludas rolon en la elekto de la alparola pronomo, kiu restas *vi* en ĉiuj cirkonstancoj, kiel *you* restas *you* en la angla. Esperanto simple ne havas alternativon, se ni akceptas ignori la apenaŭ uzatan *ci*. Sed en la nederlanda oni devas elekti inter la neformala *jij* kaj la formala *u*, en la franca inter *tu* kaj *vous*, k.t.p. Eĉ se ni imagas la skalon de formalecoj reduktita al nur duelekta, *jij/u*, *tu/vous*, la limoj inter la uzokampoj de la formala kaj neformala formoj tute ne bezonas koincidi inter la nederlanda, franca kaj aliaj lingvoj, kaj devas esti lernataj por ĉiu lingvo en ĝia socia kunteksto aparte. Nu, se mi volus intence ofendi personon kies aŭtoritato aŭ socia stato estas multe pli alta ol mia, mi povus alparoli lin aŭ ŝin nederlandlingve per la familiara *jij*; kaj inverse, se mi volus alparoli mian okjaran nepon ironie aŭ riproĉe, mi povus uzi la formalan *u*. Temas pri strategiaj decidoj por direkti la komunikan intencon laŭ iu linio, kiun mi elektis.

Alia ekzemplo: en la nederlanda lingvo, la persona pronomo *ik* ‘mi’ ne devus okupi (en mia generacio) la unuan lokon en kunordigo kun alia elemento (laŭ la modelo *A kaj B*). Ekzemple, estus neĝentile se mi esprimus la kunecon kun mia edzino, retradukite, kiel *mi kaj mia edzino*. La koncepta komponanto, kiu dum mia infaneco estis ligita al la nederlanda lingvo, enhavas kognan informon, kiu devige malprioritigas la unuan personon en lingve esprimita kunordigo. Nederlandlingve mi devus diri nur (en mia retraduko): *mia edzino kaj mi*. Male, koncepta komponanto kiu estas ligita al la itala, ne enhavas tian malprioritigon, kaj mia edzino povus senĝene diri, retradukite el sia itala: *mi kaj mia edzo*. La diferenco kun la kunteksta komponanto, kiun ni poste vidos, estas ke ĉi tie la gramatiko mem nenion preskribas aŭ postulas. Kio koncernas nin esperantistojn estas la demando, kian liberon Esperanto donas al ni. La psikolingvistika demando kiu falas ekster la kadron de tiu ĉi artikolo kaj kiun mi certe ne povus respondi, estas ĉu — kaj se jes, ĝis kiu grado — ies koncepta komponanto estas influata de lingvoj (kaj kulturoj) lernitaj post la unua.

Tre bela kolekto de esplorr rezultoj pri Esperanto, ankoraŭ nun bone uz-eblaj, estas la diplomverkaĵo *Pardonu min* (Krijnen 2008), per kiu mia iama studentino Lotte Krijnen bakalaŭriĝis en la fako Lingvo kaj Komunikado en 2008. En *Pardonu min* ŝi priskribas kiel esperantistoj (plej multaj el ili denaske nederlandlingvaj) traktas Esperanton por vortumi petojn. Kiu bezonas ion, aŭ iun servon aŭ favoron, de alia persono, ofte uzas iun celkonscian strategion. En multaj okazoj, la apliko de tiu aŭ alia strategio konsiderinde suferigas la klarecon de la mesaĝo, kaŝas ĝin, kamuflas ĝin, kaj ĝuste tio principe konfliktas kun la celo de Esperanto, kiu estis kreita por plisimpligi aŭ entute

ebliĝi la interhoman komunikadon, kio siavice supozigas absolute prioritatan rolon por la klareco de la mesaĝoj. Ĉu, do, Esperanto allasas la elekteblon de diversaj ĝentilecostrategioj en la formulado de petoj, petetoj kaj petegoj? Jen la esplordemando, kiun starigis al si la bakalaŭra kandidato, kaj kiu perdis neniom da aktualeco. La lingvistoj Penelope Brown kaj Stephen Levinson (1987) dividas siajn petostrategiojn en kvin ĉefkategoriojn, kiuj estas:

1. Oni petas rekte, senpere.
2. Oni petas per la helpo de solidarigaj konvinkiloj.
3. Oni petas per la helpo de respektesprimaj konvinkiloj.
4. Oni petas nerekte.
5. Oni petas senparole.

Sur tiu bazo, la studentino kreis kolekton de interhomaj situacioj aŭ “skeĉoj”, pli aŭ malpli ĉiutagaj aŭ komunaj, facile imageblaj kaj kondukantaj al la tasko ke la enketata esperantisto, kiel rolulo en la skeĉo, elpensu la plej konvenan vortumon por la peto pri la koncerna servo aŭ favoro en la skeĉo. La skeĉojn la studentino kunmetis en buntan enketilon, uzante tri diversajn situaciajn faktorojn, kiuj estis:

1. La socia distanco inter la parolanto kaj alparolato.
2. La hierarkia rilato inter ili.
3. La ĝenonivelo de la peto mem.

La celo estis provoki laŭeble — kaj: se eble — vastan spektron da strategioj. La enketo estis dissendita al centoj da esperantistoj en Nederlando, el kiuj pli ol triono resendis ĝin kune kun proponoj de petformuloj, kiujn ŝi poste asignis al iu el la kvin kategorioj kaj klasifikis surbaze de la tri situaciaj faktoroj. El la analizo montriĝis, ke en Esperanto manifestiĝas ĉiuj kvin kategorioj:

1. La intencon de rekta, senpera peto oni esprimis plej simple per la imperativo, la ordona verboformo, kiu finiĝas per *-u*: *donu al mi!*, k.t.p.
2. En certaj pli tiklaj situacioj, solidarigaj konvinkiloj estis uzataj abunde, ekzemple la neatendita vivigo de la malofta, arkaika *ci* en la alparolo; la uzo de kvalifiko kiel *amiko* kaj *kara*; la provoko de konsento per la kontroldemando *ĉu ne?*, sed jam sciante ke la alparolato ne povas malkonsenti; la enkonduko per *vi scias, ke ...*, jam sciante ke la alparolato ja scias, kaj ke tiel oni kreas komunan bazon.

3. En aliaj delikataj situacioj, respekt esprimaj konvinkiloj estis volvitaj ĉirkaŭ la fakta peto, t.e. anstataŭ uzi la imperativon oni uzis formulojn kiel *ĉu vi povas ...*, *ĉu vi volas ...*, *ĉu mi rajtas ...* k.s. Tre interesa estis la kreo de la nekutima formo *doneti* en *ĉu vi povas doneti ...*, en kiu la diminutiva sufikso, foje jam uzata kun karesa signifo (*patreto* anstataŭ *paĉjo*), estis uzata kiel mildiga sufikso.
4. Ankaŭ nerektaj petoj abundis, ekzemple la murmurado antaŭ kafaŭtomato *mankas al mi dek cendoj*, por ke la apudstaranto donu, aŭ minime pruntedonu, tiun monsumon al la murmurinto kiu tiom deziras sian kafon. Alia ekzemplo estis ies sopiro *mi devas laĉi la ŝuon* kun samtempa, invita etendo de sakon portanta brako, por ke la apudulo transprenu la sakon.
5. La enketo antaŭvidis ankaŭ la eblon rezigni entute je perlingva peto. Ankaŭ tiu opcio — silenti en Esperanto — estis efektive elektita en certa nombro de okazoj.

Resume kaj konklude: la respondaro klare montris, ke Esperanto forme respegulas ĉiujn kvin kategoriojn, akceptante kelkfoje tre nebulajn mesaĝojn, kiuj certe ne harmonias kun la devizo pri klareco, kiu ornamas nian lingvon. Tio kio evidente ne povis esti esplortemo sur la bakalaŭra nivelo, estis la demando, ĝis kiu grado la respondintoj simple transprenis sian nederlande formitan konceptan komponanton kaj aktivigis per ĝi sian Esperantan gramatikon. Internaciigo de la eksperimento estus la unua paŝo cele al pli bona kompreno de la mekanismo, kiu respondas al ies komunika intenco kaj aktivigas la unuan ŝtupon de la Esperanta gramatiko en Esperanta diskurso.

2.3. La kunteksta komponanto

La alia helpa komponanto, la kunteksta komponanto (la dekstra kolono en figuro 1), enhavas nombron da pli aŭ malpli longdaŭraj informoj el la komunika situacio kiuj koncernas tiujn distingojn, kiuj *necese* kaj *postulate* de la gramatiko esprimiĝas en la uzata lingvaĵo. Ekzemploj de tiaj informoj povas esti la nombro kaj la sekso de la partoprenantoj, kaj iliaj sociaj rilatoj. En Esperanto oni alparolas unu personon aŭ pli da personoj per la uzo de unu sola persona pronomo *vi*, sed en multaj lingvoj du malsamaj formoj estas preskribitaj. Diri al knabo ke li estas bela, aŭ al knabino ke ŝi estas bela, eblas en Esperanto per la uzo de unu sola adjektivo *bela*, sed denove en multaj lingvoj estas postulataj du specifaj formoj, kiuj respondas al la sekso de la belulo. Ne temas en tiuj ĉi okazoj pri strategia elekto, sed pri devo. Fine,

la kunteksta komponanto gastigas ankaŭ gramatikajn informojn pri la ĵus pasinta diskurso kiuj povas esti relevaj⁵ por la tuj sekvonta diskurso.

La kunteksta komponanto povas interagi kun ĉiuj niveloj de la gramatiko. Mi donos po du ekzemplojn de longdaŭraj informoj kaj po du de anaforaj referencoj al la ĵus antaŭa diskurso.⁶ Ekzemplo de longdaŭra pragmatika informo estas la jam menciita sekso de la partoprenantoj aŭ ilia aparteno al la viva aŭ senviva subkategorio inter la entoj: al patro necesas referenci per *li*, al patrino per *ŝi* kaj al libro per *ĝi*. El la semantiko mi rememorigu la leganton pri esplorrezulto mia laŭ kiu en kunordigo de la tipo *A kaj B* en kiu rolas unu pozitive juĝata kaj unu negative juĝata elemento, por *A* estas preferi elektata la pozitiva (aŭ la pli bela, la pli altranga) elemento, k.t.p. Tiu prefero estis klare demonstrita en mia laboro inter diverslandaj esperantistoj (Jansen 2007), kaj ĝia eventuala sistemeco tra la lingvo estus ekzemplo de longdaŭra informo en la kunteksta komponanto.

Mi nomis la informojn en la kunteksta komponanto pli aŭ malpli longdaŭraj. Ekzemple la informo pri la sociaj rilatoj inter la partoprenantoj (en lingvo en kiu tia informo ludas rolon) restas esenca nur tiel longe, kiel partoprenas en la komunika situacio la parolanto kaj pli ol unu alparolato kaj eventuale priparolato. Tuj kiam la nombro falos al unu parolanto kaj ekzemple unu alparolato, kiuj parolas inter si, restos en la kunteksta komponanto nur la avizo pri la rilato inter la parolanto kaj la alparolato.

La aliaj du ekzemploj temas pri anaforaj referencoj. Kiam iu diras al mi *Mi manĝis spaghetti hieraŭ vespere*, kaj mi respondas per *Ĉu tiel vi nomas spagetojn en la itala?* mi referencas al la (sintaksa) rekta objekto en la aŭdita aserto. Sed, kiam tiu sama persono diras al mi *Mi manĝis /spa'ĥeti/ hieraŭ vespere*, kaj mi respondas per *Ĉu tio ne devus esti /spa'geti/?*, mi referencas al la fonologia vorto.

Konserviĝas do en la kunteksta komponanto ankaŭ informoj el la ĵus pasinta diskurso, kaj pro tio ĝi ludas tiel klavan rolon en la uzo de anaforaj referencoj kaj en la refleksivo, pri kiu mi volas nun iom diskuti kun vi. Ni prenu niajn Esperantajn pronomojn kaj dividu ilin en du grupojn: unue *mi*, *vi* kaj *ni*, kiuj unusence nomas la parolanto(j)n aŭ la alparolato(j)n en la komunika situacio. La dua grupo konsistas el *li*, *ŝi*, *ĝi* kaj *ili*, kies rolo povas esti: montri aŭ nomi iun priparolaton, sed ofte ĝia alia rolo estas referenci en la lingva kunteksto al iu jam antaŭe menciita priparolato. Mi montru la diferencojn en diskurso pri tiu ĉi artikolo en (1)–(4):

- (1) **Mi** estas la aŭtoro.

Mi nomas la parolanton/skribanton en la komunika situacio.

⁵Mi ripetas ĉi tie mian uzon de la radiko *rilev-*, kun ĝiaj sintaksaj aplikoj *rileva* (angle *relevant*), *rileveco* (angle *relevance*), k.t.p. (vidu EES 6:22).

⁶Pri anaforoj vidu ankaŭ la postan tekston lige kun (4).

- (2) **Vi** estas la leganto.
Vi nomas la alparolaton/adresaton en la komunika situacio.
- (3) **Ĝi** estas revuo.
Ĝi nomas unu priparolaton (revuo), kiu devas esti konebla en la komunika situacio.
- (4) *Mi montras al vi **revuon**. Ĉu ĝi estas leginda?*
Ĝi referencas al *revuo[n]* en la lingva kunteksto; siavice, *revuo[n]* nomas priparolaton en la komunika situacio. Tian entekstan referencon malantaŭen (maldekstren) oni nomas anafora referenco.

Estas klare ke en komunika situacio en kiu mi alparolas iun alian, kaj tiu alia persono aŭskultas min, *mi* kaj *vi* estas senpere koneblaj. Sed ofte oni forgesas ke ankaŭ la tria frazo, *ĝi estas revuo*, nepre bezonas la kuntekstan komponanton, en kiu *ĝi* estu konebla por ke la esprimo estu komunike senchava. Kaj, simile, en la kvara frazo, *ĝi* estus nekomprenebla se ĝia referencato *revuo[n]* ne estus konebla helpe de la kunteksta komponanto. Vi legantoj estas ĉiuj submetitaj al la funkciado de tiu kunteksta komponanto, dank' al kiu koncizaj esprimoj kiel *ĝi estas revuo* kaj *mi montras al vi revuon*; *ĉu ĝi estas leginda?* estas tuj kompreneblaj. Imagu, ke vi ne legus tiujn frazojn ene de tiu ĉi diskurso, kiu liveras al vi buntan kolekton da avizoj en via kunteksta komponanto por ke ni komprenu unu la alian, sed ke vi legus ilin izolitaj aŭ ĉirkaŭataj de alilingva, nekomprenebla teksto, kiel en (5):

- (5) a. *Munduan den gizon orok behar luke pensatu.*
b. *Ĝi estas revuo.*
c. *Iangoikoak nola duien batbedera formatu.*
d. *Mi montras al vi revuon. Ĉu ĝi estas leginda?*

La frazoj (5a) kaj (5c) estas aldonitaj al la jam konataj (5b) kaj (5d) por pretendi la ekziston de iu kunteksto, tamen enigma por la plej multaj legantoj. La frazoj (5b) kaj (5d) restas korektaj, sed peras al vi nenian sencon: kiu *ĝi* estas indikata en la nuna kunteksto de (5b), kaj ĉu temas pri dubo pri ties revueco? Ĉu (5d) celas emfazi, ke mi montras ne libron, sed revuon? Kaj kial dubi pri ĝia leĝindeco? Kaj tiel senfine plu. Sen interpretebla kunteksta komponanto oni estus perdita.⁷ Tiu ĉi diskuto instruas al ni, ke ŝajne tute korekta frazo povas mistrafi aŭ maltrafi sian komunikan celon, aŭ trafi absolute nenion, se ĝi estas legata aŭ aŭdata sen apogo de interpretebla kunteksta komponanto. Ni nun turnu nin al la refleksivo.

⁷La unua kaj tria frazoj estas la komencaj versoj de la unua presita libro en la eŭska lingvo (Etxepare 1545:11); ili ludas ĉi tie ekskluzive misgvidan rolon.

2.4. Neglekto de la kunteksta komponanto

En refleksiva konstruo la anafora referencanto kaj la referencato resendas al la sama partoprenanto en la komunika situacio. Ni povus nomi tion kunreferencado. Tipaj lernolibraj ekzemploj estas *mi lavas min* kaj *vi lavas vin*, en kiuj *mi*[*n*] kaj *vi*[*n*] estas unusence difinitaj. Estas nenio dubo pri tio, kiu lavas kiun. La lavanto kaj la lavato estas la sama persono. Alia estas la situacio en *ŝi lavas ŝin*, ĉar povas ĉeesti pli ol unu femala partoprenanto en la komunika situacio, kaj kiel distingi inter kunreferencado (unu *ŝi*-o) kaj disreferencado, se vi akceptas ĉi tiun terminon (du *ŝi*-oj), se mankas aparta distingilo? La respondo estas konata: *ŝi lavas ŝin* implicas du malsamajn *ŝi*-ojn, ĉar Zamenhof enkondukis la specialan formon *si* por kunreferencado (al la subjekto): *ŝi lavas sin*. Kaj similan diferencon ni trovas inter *ŝi lavas ŝian bebon* kaj *ŝi lavas sian bebon*.

La uzo de la refleksiva pronomo *si* estas sendube pli utila ol tiu de *sia*. *Si* rekte celas unu jam menciitan el pli da elekteblaj partoprenantoj (en la plej vasta senco) en la komunika situacio, kaj ekskludas la aliajn. Se *S* estas la subjekto, *V* la verba predikato kaj (*O/A*) objekto aŭ adjekto kun elektebla *sin*, *pri si*, *por si*, k.t.p., la uzo de formo kun *si* anstataŭ formo kun *li*, *ŝi* aŭ *ĝi* kontribuas al fundamenta malambiguigo inter (6) kaj (7), eĉ se la kunteksto helpas ankaŭ ĉi-okaze:

(6) $S \ V \ (O/A) \neq S$, ekzemple: *Ŝi lavas ŝin. Ŝi parolas pri ŝi.*

(7) $S \ V \ (O/A) = S$, ekzemple: *Ŝi lavas sin. Ŝi parolas pri si.*

Sed, se (*O/A*) estas plennoma (ne pronomo) konebla objekto/adjekto, la malambiguigo inter (8) kaj (9) devus esti eĉ malpli grava:

(8) $S \ V \ (O/A) \ (ne \ de \ S)$, ekzemple: *Ŝi lavas ŝian bebon (= ne de si).*

(9) $S \ V \ (O/A) \ (de \ S)$, ekzemple: *Ŝi lavas sian bebon (= de si).*

Kompare kun (6) ja aldoniĝis en (8) la plennoma partoprenanto *bebo*[*n*], kiu estas grava plia klavo por malambiguigi la signifon de la kompleta esprimo el la kunteksto. En la kunteksta komponanto ne nur la partoprenantoj estas rekte koneblaj (kaj en (8) unu pli ol en (6)), sed ankaŭ la sociaj rilatoj inter ili (pli en (8) ol en (6)), kaj la tuj pasinta diskurso.

La limigitan utilecon de gramatika regulo kun aparta distingilo por la poseda refleksivo elstarigas la fakto, ke en la praktiko ĝia korekta uzo estas ebla nur en simplaj aktivaj ĉeffrazoj sen subfrazoj aŭ aliaj komplikaĵoj, kiel en (10):

(10) *Ŝi vidas sian patrinon.* (Wennergren 2005:108)

Legante (10), ni konstatas la kunreferencadon de *ŝi* kaj *sian* al unu sama virino, kies patrino estas vidata. Ofte lernolibroj provas pravigi la uzon de la poseda refleksivo, asertante ke la alternativo *ŝi vidas ŝian patrinon* estas dusenca: laŭ ili, ne estus klare kies patrino estas vidata. Tiu pravigo tamen baziĝas sur la prikonsidero de ambaŭ frazoj kiel komplete izolitaj sintaksaj konstruoj, sen apogo de la komponantoj kiujn mi detale diskutis supre. Estas tre probable, ke en reala komunika situacio surbaze de la nombro de virinaj partoprenantoj, de nia scio pri iliaj interrilatoj, pri iliaj roloj en la tuj antaŭa teksto kaj pri la intenco de la parolanto, la alternativa frazo *ŝi vidas ŝian patrinon* enhavus precize tiun saman unusencan mesaĝon, kiun *ŝi vidas sian patrinon* pretendas enhavi sola.

Prefere, do, lernolibroj ne *pravigu* la ekzistorajton de la poseda refleksivo, sed nur *klarigu* ĝin, kaj tiu tasko estas jam peza en si mem se ni konsideras ke la referencato de iu *sia* devas nepre esti la subjekto de la sama frazo aŭ subfrazo, en kiu ĝi aperas. Pro tiu detalo (11), malgraŭ sia natura ŝajno, devus esti nekorekta:

- (11) *Petro aŭskultis la plendadon de Karlo pri ĉiuj siaj problemoj.* (Wennergren 2005:112)

La plendoj kaj la problemoj estas tiuj de Karlo, sed ĉu la koncerna gramatika regulo de Esperanto ne preskribas, ke la referencato de *siaj* povas esti nur la subjekto de la frazo, kiu estas ne Karlo sed Petro? La tubero en la afero estas, ke *plendado[n]* estas ago, kiu subkomprenigas subfrazon kun propra subjekto, ekzemple laŭ la modelo de (12):

- (12) *Petro aŭskultis, kiel Karlo plendas pri ĉiuj siaj problemoj.*

Oni pli facile rimarkos la dilemon, se mi metas du samstrukturajn frazojn unu tuj sub la alian en (13a) kaj (13b):

- (13a) *Petro aŭskultis la plendadon de Karlo pri ĉiuj **siaj** problemoj.* (*siaj* = de Karlo)
 (13b) *Petro aŭskultis la diskon de Karlo per **siaj** oreloj.* (*siaj* = de Petro)

Sed mia intenco ne estas diskuti pri la malfacileco serĉi la taŭgan subjekton por trovi la veran referencaton de refleksiva pronomo (vidu pri tio mian artikolon en EES 6: Jansen 2013b). Mia celo estis demonstri ke la komunikan intencon de lingva mesaĝo — se vi volas: la korektecon de la mesaĝo — oni ne povas trovi en la izolita sintaksa strukturo de unuopaj frazoj. Ĉiu homa lingvo, do ankaŭ Esperanto, estas kompleksa sistemo, kaj la interpreto de lingva mesaĝo postulas la prikonsideron de ĉiuj eventualaj kontribuoj de ĉiuj subsistemoj.

3. La gramatika strukturo

3.1. La kvar niveloj de la gramatiko

Ni jam estas meze en la gramatiko mem, kiu en FDG konsistas el tri sinsekvaj procezoj (la ovaloj en la gramatika komponanto de figuro 1). En la unua procezo, kiu nomiĝas **formulado**, oni kreas unue la pragmatikan priskribonivelon de la intencata lingva komuniko. Sur ĉi tiu nivelo la parolanto, gvidata de la koncepta komponanto esprimas sian intencon plenumi ekzemple iun aserton, iun demandon aŭ iun ordonon; donas strukturon al sia intenco, ekzemple per emfazoj aŭ malemfazoj; kaj metas la bazon por krei predikaton^o.

Grava problemo en la traktado de la pragmatika nivelo (PN) estas, ke por klarigi ĝin mi devas uzi kompreneblan lingvaĵon, kiu sur tiu ĉi nivelo ankoraŭ ne ekzistas. Ekzemple, se mi volas sen ia emfazo produkti la demandon *Ĉu Esperanto estas lingvo?*, mi povas priskribi la pragmatikan starton de la tri procezoj, kiuj finfine kondukos al tiu esprimo, per la diskursago en (14):

(14) **PN:** DEM / al iu referencato / estas alskribata iu propraĵo

En (14), DEM estas la demandinstrukcio⁸ per kiu la parolanto provokas respondon ĉe la alparolato. La resto de la diskursago estas ĝia komunika kerno, kiu konsistas el referencato kaj la alskribo al ĝi de iu propraĵo. La leganto tuj konsentos kun mi ke sen mia antaŭa malkaŝo de la intencata finrezulto (*Ĉu Esperanto estas lingvo?*) estus malfacile akcepti ke, komencinte ĉe PN en (14), post du pliaj procezoj kaj korekta artikulacio ni atingos precize tiun rezulton. La priskribo en (14) estas rekonstruo el konata rezulto, kiu uzas tiujn instrumentojn kiujn FDG deklaras funkciaj sur PN kaj kies validecon konfirmas tiel la interna kohereco en PN, kiel tiu kun la sube sekvantaj priskriboniveloj. FDG, kiel ĉiu alia gramatika teorio, estas *modelo* de la homa lingvo, kaj la valideco de la modelo dependas de la valideco de ĝiaj konsistigaj elementoj kaj de ilia sumo. Dank' al la pli facila testebleco kaj validigo de la aliaj priskriboniveloj (15)–(17), plifirmiĝas samtempe la valideco de la plej abstrakta PN de kiu mi donis ekzemplon en (14). Por ne deturni la atenton de la ĉefa linio tra la procezoj kaj niveloj de FDG mi prefere ne provu trakti (14) pli detale.

La dua priskribonivelo, kiun oni kreas dum la formulado estas la **semantika**, (SN), kiu venas tamen post la pragmatika ĉar la semantika povas esti nutrata de la pragmatika kaj ne inverse. Ĉi tie la aferoj komencas iom klariĝi. Oni donas signifoplenan enhavon al la intencata mesaĝo, ĉerpante radikojn kaj stamojn^o el la leksika stokejo kaj difinante tiujn semantikajn kategoriojn

⁸Laŭ la pragmatika terminologio DEM estas unu el la ilokucioj^o, kiuj ekzistas en Esperanto.

kiuj validas en la lingvo per kiu mi volas esprimi mian intencon (ĉi tie Esperanto). Por nomi la referencaton al kiu mi volis alskribi iun proprajon en (14) mi ĉerpas el la leksika stokejo la stamon *esperant-* kiun mi antaŭe kombinis en la mensa leksiko el la radiko *esper-* kaj la sufikso *-ant-*. Por nomi la proprajon kiun mi volis alskribi mi ĉerpas el la leksikejo la radikon *lingv-*. La alskribo de la propraĵo de *lingv-* pragmatike, estas nenio alia ol tio kion ni efektivigas sur la semantika nivelo per la predikato (aserti ion pri io, t.e. aserti lingvecon pri Esperanto). La semantika priskribonivelo aspektas do kiel la predikataĵo^o en (15):

(15) **SN**: ↓ / pri *esperant-p* / ag-PRZ la predikato kun bazo *lingv-*

La sago malsupren direktita ĉe la komenco de (15) signifas, ke la demand-instrukcio DEM estas simple pludonata, ĉar ĝi jam pretiĝis sur la pragmatika nivelo. Ĝi forme reaperos en (16). La derivaĵo *esperant-* kaj la radiko *lingv-* ankoraŭ ne portas siajn finaĵojn, kiuj respondos al iliaj sintaksaj roloj en la frazo. Krome, restas ellaborenda la esprimo ‘ag-PRZ la predikato’ en kiu mi uzas la gloson -PRZ (prezenco) ĉar sur tiu ĉi nivelo oni difinas la tension de la predikato kiu, laŭ mia intenco, ja devas esti la prezenco (*Ĉu Esperanto estas lingvo?*). La indico ‘P’ ĉe *esperant-* signifas ke la koncerna derivaĵo funkcias en unuargumenta^o predikato en kiu *esperant-* rolas kiel priagato^o.

La semantika nivelo estas certe pli travidebla ol la pragmatika, sed ĝi ankoraŭ ne enhavas pretan lingvan esprimon. Por alproksimiĝi al tio ni bezonas la duan procezon, kiu nomiĝas la **morfosintaksa enkodigo**. Ĝi kondukas al la **morfosintaksa nivelo** (MN), kiu jam tre similas al la definitiva rezulto kiun ni aŭdas aŭ legas. La demandinstrukcio DEM reaperas ĉi tie kiel la gramatika vorto *ĉu*. Ĉar la derivaĵo *esperant-* ĉefrolas en referencgrupo^o (fakte, ĝi rolas en ĝi sola), ĝi ricevas la finaĵon *-o* kaj fariĝas la substantivo *esperanto*. En Esperanto la predikato estas verbo, kio kaŭzas la verbigon *lingvas* el *lingv-*, kun la aldono de la jam antaŭe prognoziata prezenca finaĵo *-as*, kies formo venas el la stokejo de gramatikaj finaĵoj kiuj nutras la morfosintaksan enkodigon kaj el kiu estis ĉerpita ankaŭ *ĉu*. Pro la unuargumenteco de la predikato la sola argumento (subjekto) *esperanto* ne ricevas la finaĵon *-n*. La priskribo en (16) montras la kompletiĝon de nia intencata esprimo ĝis la morfosintaksa priskribonivelo:

(16) **MN**: ĉu / *esper-ant-o* / *lingv-as*

En (16) mi videbligas per streketoj ankaŭ la morfeman disdividon. Eble oni miras, ĉar la formo *lingvas* ne respondas al la plejmulto de niaj denasklingvaj kutimoj. Tamen, ĉi tiuj kutimoj ne devas decidi pri la laŭgramatikeco aŭ kontraŭgramatikeco de la vorto *lingvas*, kiu estas tiel bona kiel *redaktoras* en la

frazo *Christer redaktoras* kaj plene kongrua kun mia hipotezo pri la senkategoria prakaraktero de la Esperantaj radikoj (vidu mian artikolon Jansen (2013a)). Estas vero ke la vortuzado de la radikoj estas forte influata de la semantika kategorio al kiu ili apartenas. *Lingv-* difinas enton, ne tuŝeblan aŭ palpeblan, sed tamen ekzistantan, lokeblan en la spaco kaj aŭdeblan aŭ videblan. *Lingv-* do difinas ion, kaj io inklinas manifesti sin en sia substantiva vortformo *lingvo*, malpli ofte en la adjektiva *lingva* aŭ la adverba *lingve* kaj malofte en iu verba formo *lingvi*, *lingvas*, k.s. La regulan esprimon *Esperanto lingvas* la parolantaro tamen preferas anstataŭigi per *Esperanto estas lingvo*, sendube ĉar la uzo de la kopulo *esti* akompanata de predikativa substantivo estas la normo por la parolantoj de ekzemple la influhavaj lingvoj angla, franca kaj germana.

Tra la tria procezo, la **fonologia enkodigo**, oni atingas la kvaran nivelon de la gramatiko, kiu estas la **fonologia nivelo** (FN). Tie ĉi la morfosintaksa produkto ricevas fonologian formon kiu estas preta por esti prononcata aŭ skribata. Vortoj aperas en ĝi en la formo de kunkatenitaj silaboj kiujn la gramatiko tiras el la inventaro de la realigeblaj silaboj en Esperanto. Krome, individuaj vortoj ricevas ĉi tie sian akcenton, kiun determinas tre simpla regulo: ĝi falas senescepte sur la antaŭlastan silabon de ĉiu vorto. Alveninte ĉi tie, mi jam povas aldoni la kvaran nivelon en (17):

(17) **FN**: ĉu / es-pe-'ran-to / 'lin-gvas

Oni notu la malsaman aranĝon de streketoj ene de la fonologiaj vortoj kompare kun la morfosintaksaj vortoj kaj krome la aldonon de vertikalaj streketoj, laŭkutime tuj antaŭ la akcentaj silaboj. Escepte de tio, mi uzas la samajn simbolojn kiel sur la morfosintaksa nivelo. La uzo de specialaj fonologiaj simboloj ne estas bezonata ĉar ĉiu skribita signo en Esperanto respondas al unu distinga sonunuo (fonemo) kaj inverse.

Vortgrupoj kaj pli grandaj unuoj ricevas ĉi tie sian intonacion, t.e. sian karakterizan grupan aŭ frazan melodion. Pri tiu ĉi fenomeno ne multaj esploroj estas faritaj,⁹ kaj en la kadro de tiu ĉi artikolo mi preteratentas la ekziston de iu melodia kurbo, kiu tamen akompanas la fonologian esprimon de (17). Laŭ tio kion mi jam komence diris mi preteratentos ankaŭ la finan artikulacion aŭ individuan prononcon de la fonologia esprimo, kiu falas ekster la kadron de la gramatika sistemo, sed kies skriba reprezento *Ĉu Esperanto estas lingvo?* aperis tuj antaŭ (14). Oni notu ke ĝi malkaŝas kelkajn ekstergramatikajn regulojn: ni komencas la frazon per majuskla litero kaj finas ĝin per aparta signo, kiu nomiĝas demandsigno, por indiki ke la esprimo estas demanda. Krome, la propra nomo *Esperanto* ĉe multaj aŭtoroj komenciĝas per majusklo.

⁹Notu tamen Wells (2010).

Mi provis klarigi ke laŭ FDG la pragmatiko kaj la semantiko kune difinas la morfosintakson kaj ke triope ili difinas la fonologion. La vojo estas unu-direkta, t.e. ene de diskursago oni kontinue subeniras, kaj lingva elemento en iu ajn nivelo prefere estu la daŭrigo de iu elemento sur pli alta nivelo, kiu ĝin pravigas. Se ne, estus truo en la konstruaĵo. Mi poste revenos al tiu ĉi detalo.

En la sekvaj sekcioj 3.2 kaj 3.3 mi volas prilumi du karakterizaĵojn de la Esperanta gramatiko kiujn oni povas nomi malfacilaĵoj (se ne por ĉiuj, tamen por multaj), kion mi provos klarigi laŭ FDG. Unue temas pri la preskribo aldoni la sufikson *-ig* al netransitivaj verboj, se ili estas uzataj en duargumenta predikato (*mi startigas la motoron*), kaj inverse la sufikson *-iĝ* al transitivaj verboj uzataj en unuargumenta predikato (*la pordo fermiĝas*). La dua malfacilaĵo koncernas la pluralakordon de adjektivoj kaj similaj akompanantoj de substantivoj (*aliaj tempoj*, *aliaj moroj*).

3.2. Semantika hipoteko en la leksiko

Lige al (15) mi menciis ke okaze de la formulado, kiu nutras la semantikan nivelon, oni ĉerpas leksikajn elementojn (radikojn kaj stamojn) el la koncerna stokejo. Kiam ni observas la prezenton de tiaj leksikeroj en PIV, ni konstatas fundamentan diferencon inter unuflanke la vortoj kiuj finiĝas per */a* aŭ */o* kaj aliflanke tiuj kiuj finiĝas per */i*.¹⁰

La PIV-a vorto *bon/a* havas la leksikan kernon *bon-*, kiu troviĝas en la leksika stokejo, kaj la gramatikan finaĵon *-a*, kiu troviĝas en la stokejo de gramatikaj morfemoj kaj neniel interagas kun la leksika difino de *bon-*, sed nur indikas ĝian primaran sintaksan aplikon (adjektivan). PIV donas kvin atestitajn signifopriskribojn de *bon-* kun ĉiufoja kromindiko ke *bon/a* akompanas ion aŭ iun.

La PIV-a vorto *abat/o* havas la leksikan kernon *abat-*, kiu troviĝas en la leksika stokejo, kaj la gramatikan finaĵon *-o*, kiu troviĝas en la stokejo de gramatikaj morfemoj kaj indikas la primaran sintaksan aplikon (substantivan) de *abat-*. PIV donas tri atestitajn signifopriskribojn de *abat-*, kiun ĝi aparte klasifikas kiel kristanisman terminon. Aperas neniuj indiko pri genro (kiu ja ne ekzistas en Esperanto) aŭ pri deklinacia klaso (same). Entute mankas gramatike rilevaj rimarkigoj en ambaŭ ekzemploj kaj tiu konstato estas ĝeneraligebla tra la tuta PIV-a stoko de adjektivoj kaj substantivoj.

La PIV-a vorto *komenc/i* havas la leksikan kernon *komenc-*, kiu troviĝas en la leksika stokejo, kaj la gramatikan finaĵon *-i*, kiu troviĝas en la stokejo de gramatikaj morfemoj kaj indikas la primaran sintaksan aplikon (verban)

¹⁰Laŭ la PIV-a prezentmaniero. En Jansen (2013a) mi argumentis ke estas eraraj la terminoj “verba”, “adjektiva” kaj “substantiva” radikoj, kiuj estas kutime uzataj en la esperantologia literaturo.

de *komenc-*. PIV donas tri atestitajn signifopriskribojn de *komenc-* kun unu sola, komuna kromindiko, ke *komenc/i* estas “tr”, t.e. la radiko *komenc-* estas antaŭvidata por uzo en duargumenta predikato kun aganto^o Ag kaj priagato P, eventuale latentă. Ekzemplo estas *mi komencis la lecionon*, kun Ag *mi* kaj P (*la*) *lecionon*. Se oni volas uzi tiun saman leksikeron *komenc-* en unuargumenta predikato kun la nura priagato, oni devas apliki la sufikson *-iĝ*, kiel en *la leciono komenciĝis*. Kontraŭe, la radikon *start-*, kiu estas laŭ sia leksika difino parenca al *komenc-*, akompanas en PIV la rimarkigo “ntr”, kio signifas ke ĝia natura destino estas unuargumenta predikato kun nura P (*la motoro startas*) kaj ke ĝi necesigas la sufikson *-ig* por uzo en duargumenta predikato kun P kaj aldona Ag (*mi startigas la motoron*).¹¹ La ekzisto de la sufiksoparo *-ig/-iĝ* havas konsekvencojn ĉe ĉiu gramatika apliko de ĉiuj leksikeroj de la sama semantika kategorio kiel *komenc-* kaj *start-*. Por decidi ĉu uzi aŭ ne uzi *-ig* aŭ *-iĝ*, necesas unue ke oni konu la koncernan rimarkigon “(n)tr” ĉe la planata leksikero kiu formas la kernon de la predikato (la morfosintaksan verbon). En la momento kiam, ankoraŭ sur la semantika nivelo, oni formas sian predikataĵon kaj estas enmetonta la leksikerojn en la predikaton (kiu realiĝos kiel verbo) kaj en la argumentojn (kiuj poste fariĝos la subjekto kaj eventuala(j) objekto(j)), oni devas esti kapabla korekte analizi la planatan gramatikan strukturon kaj decidi pri la ĝusta apliko aŭ neapliko de la leksikaj sufiksoj *-ig* aŭ *-iĝ* al la praverba leksikero.

La gramatika specifigo “(n)tr” en la leksiko katenas la uzeblon de ĉiu koncerna radiko al semantika kondiĉado kiu estas interpretebla kiel peza hipoteko, kiun la leksikero portas kun si. Ne estas mirige, do, ke ĝi prezentas grandan malfacilaĵon por multaj lingvouzantoj.

3.3. Truo inter la semantika kaj morfosintaksa niveloj

Mi nun proponas reviziti la morfosintaksan nivelon de la gramatiko de Esperanto. La vortformoj, kiuj surbaze de la leksika elemento *lingv-* povas manifesti sin, ne limiĝas al *lingvo*, *lingva*, *lingve*, *lingvi*; ofte inter ni, la diskuto ja temas pri lingvaj problemoj kun po du finaĵoj en ambaŭ vortoj. Ni havas en Esperanto la eblon distingi inter ununombro aŭ singularo kaj multnombro aŭ pluralo. Tiu distingo naskiĝas en la kunteksta komponanto (ĉar iu tie registrita multnombro de partoprenantoj (ĉi tie *problemoj*) necese aktivigas la pluralan operatoron PL, kiu forme esprimiĝas sur la morfosintaksa nivelo (kiu importas la finaĵon *-j* el la stokejo de la gramatikaj morfemoj). La supre menciita plurala vorto *problemoj* estas do analizebla kiel en (18):

¹¹Ambaŭ predikatoj priskribas dinamikan aferstaton, kiun karakterizas la elspezo de energio por efektiviĝi statŝanĝon.

(18)

- problem* la signifohava parto tirita el la radiko *problem-*.
o la finaĵo kiu markas la rolon de *problem-* kiel kapon^o en referencgrupo kiel *lingv-a problem-o* kaj tial difinas la substantivon *problemo*.
j la finaĵo kiu formas la pluralan substantivon *problemoj*.

La koncepto pluraleco esprimiĝas per la finaĵo *-j*, kiun ni principe povas aldoni al ĉiu substantivo kaj kiun ni povas skribi kaj prononci, sed ne ĉiam tiu pluraligo havas sencon: se mi prenas la substantivojn *mono*, *oro* kaj *glacio*, estas malfacile imagi al si, kion povus signifi la pluraloj **monoj*, **oroj* kaj **glacioj*.¹² Montrigas ke ne la substantiveco decidas pri la pluraligeblo, sed iu elemento en la signifo de la substantivo, nome ĝia aljuĝeblo al la kategorio de la nombreblaj entoj. Tial oni povas diri *unu problemo* – *du problemoj*, sed ne *unu oro* – *du *oroj*. Pli bone: oni povus diri ambaŭ, sed la laste nomita estus signife enigma, kion kaŭzas la aparteno de *or-* al la nenombreblaj entoj. Sekve, la nombrebla karaktero de la ento *problem-* permesas ĝian pluraligon. La nenombrebla karaktero de ento kiel *or-* tion malfaciligas; ĝin teorie baras dependa (kvalifika) semantika kategorio, kiu entute ne estas koncernata de la kriterio pri nombrebleco (ekzemple *grand*, *grav* kaj *neglektind*) kaj kiu primare manifestiĝas kiel adjektivo en modifa rolo (*granda*, *grava*, *neglektinda problemo*).¹³

En Esperanto, modifantoj^o en referencgrupo povas aparteni al iu ajn semantika kategorio, kiel *lingv-* en *lingv-a problem-o*: en ĝi, la leksikero *lingv-* estas uzata, nekongrue kun sia enteco (kiu preferus substantivigon), kiel modifanto de alia leksikero *problem-*, kun kiu ĝi difinas la kompleksan enton *lingv-problem-*, kiu siavice enkodiĝas kiel *lingv-a problem-o*. Pluraligo de tiu kompleksa ento eblas dank' al la nombrebleco de la kapo *problem-*, al kiu do nature gluiĝas la markilo *-j* en **lingv-a problem-o-j*. Tamen, la esprimo **lingv-a problem-o-j*, malgraŭ sia sufiĉeco estas kontraŭgramatika (indikita per *). Ĝi prezentus la plej rektan transiron de unu nivelo al la alia, transiron sen perdoj kaj sen aldonoj. Ĝi estus projekcio de unu nivelo al la alia, de PN tra SN al MN, sen ia ajn perdo aŭ aldono de la informenhavo. Estas lingvistoj — via aŭtoro apartenas al tiu skolo — kiuj opinias, ke la perfekta projekcio favoras la

¹²Mi preferas uzi la esprimon 'malfacile' ol 'neeble' ĉar diversaj lingvoj montras diversan trakton de la pluraligo: tiel ekzemple 'rizo' kaj 'viando' estas pluraligeblaj en la itala (*riso* > *risi*, *carne* > *carni*), sed ne en la nederlanda (*rijst*, *vlees*). Mi ne konscias pri absolute homogena uzado en Esperanto.

¹³Tio ne kontraŭdiras la fakton, ke la pluralo *grandoj* ekzistas. En mia artikolo "Radikoj kaj vortoj en esperanto" en EES 6:9–43 mi priskribas la kutimon de la esperantistoj uzi, pro manko de aparta sufikso, la rektan substantivigon de radikoj de tiu ĉi tipo, t.e. *grando*, *belo*, k.t.p. por krei pseŭdoderivaĵojn kiuj difinas la semantikan kategorion de abstraktaj entoj.

lernfacilecon de lingvo kaj ke, kontraŭe, projekcioj kun nekontinuaĵoj (perdoj aŭ aldonoj) ĝenas la lernfacilecon de lingvo.

La uzo de *lingvaj problemoj* anstataŭ **lingva problemoj* estas ekzemplo de misprojekcio. La pluraliga *-j* aldonita al la adjektivo estas postulata de aparta regulo, kiu ne trovas sian pravigon en la semantiko, sed kiu estas regulo ene de la sintakso. Ĝi estas tiel nomata akordiga regulo, kian oni trovas abunde en la lingvoj konataj al Zamenhof, kiel la latina kaj greka lingvoj, la rusa, germana kaj franca. Sed, veturante de Bjalistoko okcidenten tra Eŭropo kaj komparante la rusan kaj polan kun la germana, nederlanda kaj angla, oni konstatas kontinuan malgraviĝon de la pluralakordo. El la angla ĝi tute malaperis.

Kvankam la kompreno pri la diversaj subfakoj en la gramatiko estis nur fragmenta dum la frua periodo de Esperanto, Zamenhof ne nur konsciis pri la bona funkciado de la angla sen pluralakordo, sed intuicie konvinkigis pri la malfacileco de tiu akordo, tiel ke jam en sia reformprojekto de 1894 li proponis, ke adjektivoj ne plu havu deklinacion “ĉar ĝi estas superflua balasto” (vidu ekzemple zamenhof (1989:606)). Simile, ne estas hazardo ke en Ido, la lingvo kiu estis kreita kiel plibonigo de Esperanto, la adjektivoj finiĝas nevarie per *-a* (vidu De Beaufront 1925:27). En tiu ĉi detalo, el la vidpunkto de FDG, Ido estas pli bona ol Esperanto, sed ĉiu scias ke la boneco, pliboneco aŭ malpliboneco de lingvo ne determinas ĝian socian sukceson.

4. Konkludo

Mi resumu en kelkaj linioj kion mi intencis montri. La funkciado de la Esperanta gramatiko ne estas plene komprenebla se ni izolas ĝin de la du komponantoj kiujn mi konatigis al vi sub la nomoj *koncepta* kaj *kunteksta komponantoj*. La kono de la mondo, la medio, la socio kaj ĉiuj sociaj interrilatoj kiuj nin ĉirkaŭas, la kono de la kunteksto kun ĝiaj partoprenantoj kaj la stokado de la ĵus pasinta diskurso, estas ĉiuj nemalhaveblaj por ebligi lingvan kontakton kiu estu komunike senchava kaj socie akceptebla. Mi provis montri ke la pure sintaksa trakto de la refleksivo, senkonsidere la kuntekstan komponanton, fakte ignoras ĝian originon kiu ja fontas en la kunreferencado al unu sola partoprenanto, trovebla ĝuste en tiu komponanto.

Mi kondukis la leganton tra la unua procezo en la gramatika strukturo, tiu de la formulado, kies tasko estas interalie ĉerpi leksikajn elementojn el la leksika stokejo. En la trospecifigo de ago- kaj statindikaj radikoj (‘praverboj’), t.e. en semantika kondiĉado ege limiganta la liberecon de la koncernaj radikoj, mi provis demonstri la originon de unu el la plej grandaj obstakloj kontraŭ la korekta uzado de verboj, t.e. kun aŭ sen apliko de *-ig* aŭ *-iĝ*.

La funkciado de la gramatiko ankaŭ ne estas plene komprenebla, se ni izolas unu ĝian nivelon de la aliaj. Mi provis klarigi la pluralakordon, kiu

fontas en la ekzisto de pure sintaksa kromregulo sen pravigo en la semantiko. Tia sintaks-interna kromregulo, cetere, ankaŭ rolas en la kazo de la refleksivo, kaj kaŭzas ke la poseda refleksivo estas unu el la plej gravaj malfacilaĵoj en nia lingvo.

La gramatiko de ĉiu homa lingvo estas kompleksa sistemo. Tion tre klare demonstras ĝuste Esperanto, en kiu la relative malmultaj malfacilaĵoj tiel akre kontrastas kontraŭ ĝenerala fono libereco, reguleco kaj kontinueco inter la diversaj niveloj de la gramatiko.

Kelkajn finvortojn mi volas dediĉi laŭ la dua PIV-a perspektivo kiun mi menciis en la enkondukita sekcio 1, t.e. niaj plej aŭtoritataj gramatikaj libroj PAG kaj PMEG. Ambaŭ detale traktas la morfologion kaj la sintakson, sed farante tion, ili diskutas nur unu nivelon de nia gramatiko. Tio, ke ili ne dediĉas pli da atento al la fonologio, estas iusence pardonebla pro la fonologieco de nia alfabeto kaj la pli-malpli rekta projekcio de la morfosintakso sur la fonologion. Sed ene de la fonologio ili prisilentas la intonacion, kaj la pragmatikon kaj semantikon ili entute malatentas. Krome ili traktas tion kion ili konsideras gramatiko sen klara rilato al la du ekstergramatikaj komponantoj, kiujn mi priparolis kun vi. Tiel PAG kiel PMEG estas riĉa trezorejo de ekzemploj, sed ilia valoro estas ĉefe tia. Ambaŭ verkoj estas preskribaj gramatikoj tute laŭ la PIV-a difino “por ĝuste paroli aŭ skribi”, sed la bazo de iliaj preskriboj bezonas urĝan revizion kaj pliampleksigon. Science defendebla tiel nomata referencgramatiko de Esperanto daŭre mankas.

Glosoj

Aganto

Tiu argumento^o en predikataĵo^o kiu elspezas la bezonatan energion por kaŭzi statŝanĝon. En Esperanto, la aganto povas agi propravole, kiel *Zamenhof* en *Zamenhof kreis Esperanton*, aŭ ne, kiel *ŝtormo* en *ŝtormo elradikigis la arbon*, sed ĉiukaze ĝi ne estas trafata de la statŝanĝo.

Anstataŭaĵo

Devige aparta formo anstataŭ atendata derivaĵo aŭ fleksiaĵo, ekzemple la angla *went*, kiu breĉas la regulan paradigmon de la preterito en tiu lingvo, kiu konsistas el la verba radiko plus la finaĵo *-ed*. Ne rolas en Esperanto.

Argumento

Dependanto de la predikato. Ekzemple, en *Zamenhof kreis Esperanton* tiel *Zamenhof* kiel *Esperanto* estas argumentoj de la predikato^o *kreis*.

Diskursago

La unuo de interkomunikiĝo sur kiu baziĝas FDG. La diskursago ne estas identigebla al ekzemple vorto, vortgrupo aŭ frazo^o: iu ajn el tiuj povas konsistigi plenan kaj sencohavan mesaĝon analizeblan de FDG. En diskursago rolas i.a. la ilokucio^o kiun la parolanto elektas por sia mesaĝo.

Frazo

En la anglalingva fontliteraturo de FDG, sentence ‘frazo’ ne ludas formalan rolon, kontraste kun *clause*, *main clause* kaj *subclause*, kiuj plej bone respondas al niaj ‘frazo’, ‘ĉeffrazo’ kaj ‘subfrazo’ (sur la morfosintaksa nivelo de la gramatiko).

Fokuso

Pragmatika funkcio per kiu la parolanto elstarigas tiujn informojn kiuj estas novaj por la aŭskultanto. En *mi verkas artikolon* la fokusa elemento *artikolon* estas en sia natura pozicio en Esperanto. En *artikolon mi verkas* aparte enfokusigas *artikolon* en nenormala pozicio.

Framo

Ĝenerala kadro por strukturoj sur la pragmatika aŭ la semantika nivelo. Ekzemplo sur la laste nomita nivelo estas la predikatframoj, kiuj teorie povas ekzisti en iu lingvo. Ekzemple, en Esperanto estas tre komuna la duargumenta predikato^o kun aganto^o kaj priagato^o (*Zamenhof kreis Esperanton*).

Ilokucio

La komunika intenco de la diskursago^o, ofte sen bezono je leksika esprimilo. Ekzemploj estas la aserta (*mi verkas*), demanda (*ĉu vi legas?*) kaj ordona (*legu!*) ilokucioj.

Implica hierarkio

La plej simpla formulo estas $A \subset B$ kaj ĝi signifas: se lingvo havas la proprajn B, ĝi necese havas ankaŭ la proprajn A. Tiu ĉi hierarkio ekskludas la ekziston de lingvoj kun B (+B), sed sen A (−A). La aliaj tri kombinoj povas ekzisti: +A/+B, +A/−B, −A/−B. Unu tia hierarkio estas: ‘eksplozaj konsonantoj $\subset$ implodaj konsonantoj’, t.e. lingvoj kun implodaj konsonantoj necese havas ankaŭ eksplozajn, sed lingvoj kun eksplozaj konsonantoj povas bone ekzisti sen implodaj. Esperanto kongruas kun tiu ĉi hierarkio (+A/−B).

Kapo

La nemalhavebla elemento en referencgrupo^o aŭ vortgrupo; ekzemplo de ĉi-lasta: la substantivo *lingvo* en *bona lingvo*.

Modifanto

La malhavebla elemento en referencgrupo^o aŭ vortgrupo; ekzemplo de ĉi-lasta: la adjektivo *bona* en *bona lingvo*.

Morfosintakso

FDG en sia nuna stato de evoluo traktas la du disciplinojn kiel unu, konsiderante la morfologion la sintakso sur vortnivelo.

Operatoro

Nevaria funkcia elemento.¹⁴ Ekzemploj: *ĉu*, *tiu*, *ĉie*, *iam*, *ne*, *-as*, *-j*.

Predikato

La kerna elemento en predikataĵo^o, kiu alskribas proprajn al unu aŭ pli da argumentoj^o. En Esperanto la predikaton povas okupi leksikeroj de ĉiuj semantikaj kategorioj (*iras*, *faras*, *redaktoras*, *kongresas*, *tagas*, *martelas*, *bonas*, k.t.p.), sed sintakse ĝi estas ĉiam verba.

Predikataĵo

Semantike difinita strukturo kiu konsistas el predikato^o kaj unu aŭ pli da argumentoj^o. Ĉiun lingvon karakterizas certa nombro da framoj^o kiuj difinas la tipojn de predikataĵoj kiuj povas okazi en ĝi.

¹⁴La nevarieco koncernas la originan uzon de ĉi tiuj partikuloj, ne la leksikeciĝintajn formojn kiuj estiĝis el ili, kiel *iamas*, *nei*, k.s.

Priagato

Tiu argumento^o en predikataĵo^o kiun trafas la statŝanĝo aŭ kiu nepropravole submetiĝas al stato, ekzemple *Esperanton* en *Zamenhof kreis Esperanton kaj Amsterdamo* en *Amsterdamo situas en Nederlando*.

Referencgrupo

Semantika strukturo, heredita de la pragmatika referencato, kiu konsistas el kapo^o kaj eventuala(j) modifanto(j)^o kaj kiu sintakse enkodiĝas kiel substantiva vortgrupo, ekzemple *bona lingvo*.

Stamo

Kompleksa leksemo konsistanta el du aŭ pli da leksemoj, ekzemple *skribmaŝin-*, *homplen-*, *ŝipvetur-*, *vaporŝipasoci-*.

Ŝablono

Libreto kun la titolo *Международный языкъ. Предисловіе и полный учебникъ*, aperis en 1887 en la rusa lingvo; ĝi nun estas konata kiel la Unua libro.²

²Estas kelkaj diferencoj inter la vortlistoj en la unua (1887a) kaj dua (1887b) eldonoj de la ruslingva Unua libro. La elementoj *esper*, *kaf*, *propon* mankas en la unua eldono sed aperas en la dua kun la tradukoj надѣяться ‘esperi’, кофе ‘kafo’, предлагать ‘proponi’. Aliaj elementoj iom montras el kiuj fontoj Zamenhof prenis siajn vortojn: kaj *kresk* kaj *vaks* havas la tradukon расти ‘kreski’ en la unua, sed en la dua aperas *kresk* расти ‘kreski’ kaj *vaks* воскъ ‘vakso’. Simile, kaj *stal* kaj *ŝtal* havas la tradukon сталь ‘ŝtalo’ en la unua,

Iom poste aperis versioj en la pola, franca kaj germana. La datoj laŭ la julia kaj gregoria kalendaroj por la permesoj publikigi la manuskriptojn estis jenaj. La fonto estas zamenhof (1991c) kun indikitaj paĝnumeroj.

<i>Eldono</i>	<i>ДОЗВОЛЕНО ЦЕНЗУРОЮ Варшава [julia kalendaro]</i>	<i>Gregoria kalendaro</i>	<i>Paĝ- numero</i>
La unua ruslingva	<i>21 Мая 1887 года</i>	1887-06-02	6
La unua pollingva	<i>9 Июля 1887 года</i>	1887-07-21	58
La unua franclingva	<i>12 Сентября 1887 года</i>	1887-09-24	110
La unua germanlingva	<i>21 Октября 1887 года</i>	1887-11-02	170
La dua ruslingva	<i>31 Декабря 1887 года</i>	1888-01-12	228
La unua anglalingva	<i>12 Января 1888 года</i>	1888-01-24	248
La dua anglalingva	<i>5 Января 1889 года</i>	1889-01-17	296

La permeso ebligis kompostadon de la manuskripto kaj pretigadon de la libro, sed la publikigo povis okazi nur post dua decido de la cenzuro, nomita la permeso ellasi — oni ja devis kontroli ke la presita libro ne deviis disde la aprobita manuskripto. Laŭ Adam (1979:10) la bileto de ellaso havis la daton 1887-07-14, responda al 1887-07-26 (mardo) en la gregoria. Ekde tiu tago Zamenhof rajtis aperigi sian libron. Sed ni ne scias ekzakte kiam li faris tion.

Tipografiaj detaloj: en la ses unuaj eldonoj menciitaj en la tabelo la litero *ĵ*, *ĵ*, estis presita kun tegmento super punktoporta *j*, do tiel: *ĵ*, *ĵ*. En postaj eldonoj, ekzemple en la lasta en la tabelo, tiu litero aperis kun tegmento super *j*, *j*, senpunktigitaj. La minuskla litero *ĥ* (tiel ĝi aperas en sentruka kompostado per L^AT_EX, do kun la tegmento centre sur la litero) en la unuaj eldonoj estis presita kun la tegmento super la ronda parto de *h*: *ĥ*, ne, kiel poste, centre super la stango, *ĥ*. (Sed tiu unua formo travivis: vidu “Tiĥvin” en Ŝtono (2001:174).) Krome, la signo super la literoj *U* kaj *u* en la Азбука estis en la unuaj eldonoj ne lunarko sed turnita *c*.

3.2. Vortelementoj

En la Unua libro de 1887 la vortoj estas difinitaj per vortelementoj, kiujn oni kombinu por krei vortojn.

Mi citas ĉi tie unue la rusan tekston, poste la tradukon en esperanton kiun Zamenhof publikigis en la Fundamenta krestomatio:

Я ввелъ полное *расчлененіе* понятій на самостоятельныя слова, такъ что весь языкъ вмѣсто словъ въ различныхъ грамматическихъ

dum la dua havas *stal* стойло ‘stalo, stalĉelo, fojnotrogo’; *сапай* ‘remizo, tenejo; barako’ kaj *stal* сталь ‘stalo’.

формахъ состоитъ только изъ однихъ неизмѣняемыхъ словъ. [...] Различныя же грамматическія формы, взаимныя отношенія между словами и т. п. выражаются сочетаніемъ неизмѣняемыхъ словъ. (Д^р Эсперанто 1887:11)

Mi aranĝis plenan *dismembrigon* de la ideoj en memstarajn vortojn^[1], tiel ke la tuta lingvo, anstataŭ vortoj en diversaj gramatikaj formoj, konsistas sole nur el *senŝanĝaj* vortoj^[1]. [...] Kaj la diversaj formoj gramatikaj, la reciprokaj rilatoj inter la vortoj k. t. p. estas esprimitaj per la kunigo de senŝanĝaj vortoj^[1]. (Zamenhof 1939:248, 1992:234)

Se vi diras *vortelemento* aŭ *vortoparto* por *vorto* en tri lokoj ĉi tie, markitaj per ^[1], la eldiro fariĝas taŭga priskribo de aglutina lingvo; vidu la ĉapitron 9.

Iom poste la manko de bona termino eĉ pli klare elstaras, kiam li nomas “vortoj” kaj la vorton *fratino* kaj ties konsistigajn elementojn *frat*, *in* kaj *o*:

Такъ, напримѣръ, происхожденіе слова *frat,in,o*, которое въ дѣйствительности состоитъ изъ трехъ словъ: [...] (zamenhof 1991c:16)

Tak np. pochodzenie wyrazu *frat,in,o*, który w rzeczywistości³ składa się z trzech słów: [...] (zamenhof 1991c:67)⁴

Par exemple, l'origine du mot *frat,in,o*, qui en réalité est composé de trois mots: [...] (zamenhof 1991c:121)

Die Abstammung des Wortes *frat,in,o* z. B., welches in Wirklichkeit aus drei Wörtern besteht, nämlich: [...] (zamenhof 1991c:181)

[...] la vorto «*fratino*», kiu en efektiveco konsistas el tri vortoj : *frat* (frato), *in* (virino), *o* (kio estas, ekzistas) [...] (Zamenhof 1939:248, 1992:234)

En la “Интернационально-русский словарь” en la Unua libro la vortelementoj estas listigitaj sen iu signo por indiki la nekompletecon de la radikoj, ekzemple *flor* цвѣтокъ. Same en la “Słownik międzynarodowo-polski” de la pola versio (*flor* kwiatek); en la “Dictionnaire international-français” de la franca versio (*flor* fleur); kaj en la “International-deutsches Wörterbuch” de la germana versio de la Unua libro (*flor* Blume) (Zamenhof 1991c:47, 99, 159 respektive 219).

Kelkaj el la elementoj estas jam pretaj vortoj, ekzemple *da*, *de*, *eĉ*, *el*. Plej multaj ne estas vortoj, sed bezonas kompletigon por fariĝi vortoj, ekzemple *far*, *perd*, kiuj estigas vortojn *fari*, *faro*, *fare*, *perdi*, *perdo*.

Ne eblas kredi ke *frat*, *in*, *o* kaj *fratino* estas kvar egalnivelaj vortoj. La vero aperas, kvankam implice, en la Fundamento, kie la deka regulo de la Fundamenta gramatiko diras en la franca: “L’accent tonique se place toujours

³Tiel. Preseraro por w rzeczywistości.

⁴El la kvin lingvoj nur en la pola versio aperas du malsamaj vortoj, *wyraz* kaj *słowo*, por vorto en la nuntempa signifo kaj por ties partoj. Oni pro tio povus imagi ke *wyraz*, kiu signifas ne nur ‘vorto’ sed ankaŭ ‘esprimo’, estas uzata por la plena vorto *fratino* sed ne por la vortopartoj *frat*, *in*, *o*. Sed iom pli frue li uzas *wyraz* ankaŭ por la vortelementoj (zamenhof 1991c:67).

sur l'avant-dernière syllable" kaj simile en la aliaj lingvoj. "La akcento estas ĉiam sur la antaŭlasta silabo" (Zamenhof 1939:255; 1992:240). La antaŭlasta silabo de kio? Temas pri la antaŭlasta silabo de ĉiu vorto, ne de ĉiu vortelemento. Se la akcento falus sur la antaŭlasta silabo de vortelemento, oni ja metus ĝin sur la *i* en *dimanĉ'* kaj sur la *o* en *rekomend'*. Ĉi tie do klaras ke *fratino* estas vorto de alia speco ol ties partoj *frat*, *in* kaj *o*. Cherpillod (2009a:2, 2009b:103) komparas la situacion kun la kunmetitaj vortoj *chou-fleur* kaj *Blumenkohl* 'florbrasiko', sed tiu komparo ne povas validi ĝenerale, kaj certe ne por *o*, *j* aŭ *n*.

3.3. Facileco en la lernado: "almenaŭ *kvindek* fojojn pli facila"

Zamenhof priskribas en la Unua libro la facilecon kaj ekonomion de sia lingvo:

Mi simpligis ĝis nekredebleco la gramatikon [...] La grandega faciligo, kiun la lingvo ricevas de tia gramatiko, estas klara por ĉiu.

(b) Mi kreis regulojn por *vortfarado* kaj per tio ĉi mi enportis grandegan ekonomion rilate la nombron de la vortoj ellernotaj [...] Tion ĉi mi atingis per la enkonduko de diversaj prefiksoj kaj sufiksoj, per kies helpo ĉiu povas el unu vorto formi diversajn aliajn vortojn, ne bezonante ilin lerni. (Pro oportuneco al tiuj ĉi prefiksoj kaj sufiksoj estas donita la signifo de memstaraj vortoj, kaj kiel tiaj ili estas lokitaj en la vortaro.) (Zamenhof 1939:246; 1992:232–233)

En la versioj de la Unua libro kiuj estis publikigitaj en 1887 aperas similaj, kvankam variaj, esprimoj. En la ruslingva Unua libro li skribas: "Огромное облегчение"; "огромную экономию" (Zamenhof 1991c:13); en la pollingva: "dalece [...] ułatwia naukę języka"; "ogromną ekonomię" (Zamenhof 1991c:65); en la franclingva: "On conçoit, combien une grammaire semblable facilite l'étude de la langue"; "j'ai énormément réduit la quantité des mots nécessaires à apprendre" (Zamenhof 1991c:118); en la germanlingva: "Die ungeheure Erleichterung"; "auf unglaubliche Weise die Zahl der zu erlernenden Wörter abgekürzt" (Zamenhof 1991c:178). Komparu kun la eldiro de Michel Duc Goninaz en subsekcio 9.4.6.

En "Esenco kaj estonteco de la ideo de lingvo internacia", kiun L. de Beaufront legis en la kongreso de l'Académie Française pour l'Avancement des Sciences en Parizo en 1900, do antaŭ la akcepto de la Fundamento, Zamenhof donis kvantan mezuron de la facileco: "Ĝi estas mireginde kaj nekredeble *facila por ellernado*: sen trograndigo oni povas diri, ke ĝi estas almenaŭ *kvindek* fojojn pli facila, ol ĉia lingvo natura." (Zamenhof 1939:287; 1992:270).

4. La Fundamento de 1905

4.1. La Antaŭparolo kaj la Deklaracio pri la esenco de la esperantismo

En la Antaŭparolo al la Fundamento skribis Zamenhof:

La ideoj [...] prezentas dume nur mian *privatan* opinion. Leĝan sankcion ili ricevos nur en tia okazo, se ili estos akceptitaj de la unua internacia⁵ kongreso de esperantistoj, al kiu tiu ĉi verko kun sia antaŭparolo estos prezentita. (Zamenhof 1991a:49; origina paĝnumero XI)

Kaj tiu akcepto realiĝis en Bulonjo ĉe maro en la lasta laborkunsido 1905-08-09 de la kongreso; vidu la Deklaracion pri la esenco de la esperantismo (Zamenhof 1991a:33–37).

Laŭ la Antaŭparolo al la Fundamento (Zamenhof 1905:v–xi; 1991a:43–49), tiu ĉi konsistas el tri partoj (Zamenhof 1905:vi):

- 1.) La 16-regula *gramatiko* (pp. 51–79; originaj paĝnumeroj 1–26);
- 2.) la « *Universala Vortaro* » (pp. 137–233; 83–179); kaj
- 3.) la « *Ekzercaro* » (pp. 81–135; 27–81).

La Ekzercaro venas, kiel la paĝnumeroj indikas, antaŭ la Universala vortaro. Laŭ la antaŭparolo de Gaston Waringhien, datita je 1991-09, en la dekoka eldono de la Fundamenta Krestomatio, Zamenhof (1992:viii), la tri partoj aperis respektive en 1887, 1893 kaj 1894. Laŭ Minnaja & Silber (2015), la Universala vortaro estis surmerkatajita jam en aŭgusto 1893 sed kun indikita aperjaro 1894.

La Antaŭparolo estis datita “Varsovio, Julio 1905.” Laŭ Waringhien (1955:138) la Fundamento aperis libroforme en julio 1905. Ĝi estis havebla en la internacia kongreso en Bulonjo ĉe maro, kiu komenciĝis la 7-a de aŭgusto. Jam tiam la Antaŭparolo estis bindita kune kun la tri supre menciitaj partoj.

Aperis demando ĉu la Antaŭparolo estu konsiderata parto de la Fundamento. Gaston Waringhien formulis demandon en 1955:

Ĉu oni rigardu fundamentaj la radikojn de la Antaŭparolo?
[...]

Persone mi emus rigardi fundamentaj ĉiujn radikojn de la tri fundamentaj verkoj, ekskluzive de la Antaŭparolo. Sed tio estas nur privata opinio, kaj estus tre utile havi definitivan decidon de la Akademio pri ĉiu el la ĉi-supre dekstre numeritaj demandoj.⁶ (Waringhien 1955:140)

Akademio de Esperanto en 1956 decidis ke la radikoj en la Antaŭparolo al la Fundamento havu statuson de Fundamenteco. La demando ĉu la Antaŭparolo estas parto de la Fundamento ne estis respondita. (Minnaja & Silber 2015.)

⁵Li nomis tiun unuan kongreson “internacia”, ne “universala”.

⁶Temas ankaŭ pri la radikoj de la Ekzercaro kaj de la kvin gramatikoj.

4.2. La Fundamento estas deviga

La sola unu fojon por ĉiam deviga por ĉiuj esperantistoj fundamento de la lingvo Esperanto estas la verketo «Fundamento de Esperanto», en kiu neniu havas la rajton fari ŝanĝojn (Deklaracio pri la esenco de la esperantismo; en Zamenhof 1991a:37).

4.3. “alia kongreso havas ja plenan rajton nuligi la Fundamenton”

Kiel ĉiu leĝo, ankaŭ tiu ĉi leĝo povos esti nuligita aŭ ŝanĝita de la leĝdonanto:

[...] la Bulonja Deklaracio ligas ne la tutan esperantistaron, sed nur la apartajn esperantistojn; [...] tiel same kiel unu kongreso donis leĝojn, alia kongreso ja povas kun plena rajto forigi tiujn leĝojn. (Letero 1907-09-19 al majoro Charles Lemaire (1863–1926); Zamenhof 1948b:39)

La «Fundamento» ekzistas nur por apartaj personoj, sed ĝi tute ne ekzistas por la tuta esperantistaro. Tiel same, kiel unu kongreso fiksas la Fundamenton, tiel same alia kongreso havas ja plenan rajton nuligi la Fundamenton, se tio ĉi montriĝos necesa. Neniu malpermesas al Vi diri, ke la esperantistoj povas akcepti reformojn; Vi devis nur diri, ke ili povas tion fari per vojo laŭleĝa, t.e. antaŭe per voĉdonado de la Lingva Komitato kaj poste per sankcio de nova kongreso. (Letero 1907-10-28 al Gaston Moch (1859–1935); Zamenhof 1948b:53)

4.4. Nenio pri facileco kaj ekonomio

En akra kontrasto kontraŭ la Unua libro de 1887 kaj la eldiro en “Esenco kaj estonteco de la ideo de lingvo internacia” de 1900 la Fundamento de 1905 ne parolas pri iu facileco en la lernado, nek pri iu ekonomio en la vortfarado.

4.5. La senŝanĝaj vortelementoj en la Fundamento

Same kiel en la Unua libro la tuta lingvo en la Fundamento konsistas el kunigaĵoj de senŝanĝaj vortelementoj, kiujn Zamenhof (tute kiel en la Unua libro) nomas “vortoj”: la vorto *frat'in'o* konsistas el “tri vortoj”, “trois mots”, “three words”, “drei Wörtern”, “трехъ словъ”, “trzech wyrazów” (Zamenhof 1991a:138; origina paĝnumero 84).

Kalocsay kaj Waringhien klarigas la nocion de memstareco tiel:

La memstareco de la elementoj validas tamen nur pri ilia envorta funkcio, kaj ĝi ne signifas, ke ĉiu elemento povas esti uzata ankaŭ sola kiel aparta, memstara vorto. (Kalocsay & Waringhien 1980: § 277, 1985: § 277)

Ili daŭrigas distingante tri kategoriojn: “Elementoj *kompletigendaj* aŭ *finaj-bezonaj*” (radikoj kaj afiksoj); “Elementoj *solstarivaj*” (*tre, tro, jam, apenaŭ*); “Elementoj *kompletigaj*” (*o, a, i, e*).

Cyril Brosch, kiu en sia universitata diplomlaboraĵo komparas la nociajn sistemojn de vortfarado en la hindeŭropaj lingvoj kaj esperanto (2008:5), unue bazis sian priskribon de la vortfarado sur la radikoj, sed poste opiniis ke vortbazita priskribo “povus esti pli fruktodona” (2008:38). Pri la terminoj en la Fundamento li sen mildigo asertas:

[...] oni devas ĉiam esti konsciaj, ke li uzis antaŭsciencajn kaj nekoherajn terminojn [...] oni do ne rajtas bazigi sian teorion sur laŭvorta interpreto [...] (Brosch 2008:21)

Ni interkonsentu ke historiajn dokumentojn oni interpretu kun prudento, atentigante kaj la tiaman lingvouzon, kaj la modernan lingvouzon, kaj helpe de ĉiuj eblaj konoj provu establi ligon inter ili.

En siaj verkoj Zamenhof kombinas la elementojn por estigi kompletajn vortojn. Nur tre malofte li uzas la kompletigendajn afiksojn memstare; ekzemple laŭ mia scio li maloftege skribis *iĝas*, preskaŭ ĉiam *fariĝas*. En la Ekzercaro aperas nur kelkaj tiaj memstaraj vortoj (tamen kun gramatika finaĵo), ekzemple *indo*, *aro* kaj *eble*: “havas pli grandan indon” (§ 23), “aroj da bellanaj ŝafoj” (§ 34), “eble mi povos helpi al vi” (§ 41). En la Universala vortaro aperas la adverbo *abl’e* sub la radiko *abl’*. Tiu ĉi uzo de sufiksoj do havas siajn limojn.

Vortelementoj kiaj *a*, *as*, *e*, *i*, *is*, *j*, *n*, *o*, *os*, *u*, *us* tute ne aperas kiel memstaraj vortoj, spite al la eldiro en la 11-a artikolo en la Fundamenta gramatiko: “La gramatikaj finiĝoj estas rigardataj ankaŭ kiel memstaraj vortoj.” Ĉi tie oni nepre komprenu la esprimon *memstara vorto* kiel ‘lingvoelemento taŭga je kombinado’. Mi memorigas pri respondo kiun Zamenhof donis al Pierre Corret en *Lingvo internacia* 1907:

Privataj aŭtoroj povus enkonduki tiun ĉi novan formon⁷ nur en tia okazo se „as”, „is” k.t.p. signifus „estas”, „estis”; sed, kvankam pli aŭ malpli frue la verbaj finiĝoj eble ricevos la signifon de la verbo „esti”, tamen ĝis nun ili tiun ĉi signifon ne havas. (Zamenhof 1983:445)

En la projektoj pri neologismoj de 1906-01-18 kaj 1906-11-22 Zamenhof proponis i.a. ke oni povas diri *i*, *as*, *is* por *esti*, *estas*, *estis* (vidu ekzemple Kiselman 2011, sekcioj 11.4 respektive 13.4). Sed tiujn projektojn li neniam realigis.

La serioj *as*, *is*, *os*; *at*, *it*, *ot*; *ant*, *int*, *ont* klare montras ke la elementoj *a*, *i*, *o* ĉi tie estas tempaj aŭ aspektaj indikiloj, kaj ke *n* alportas aktivan signifon al *at*, *it*, *ot*. Pro tio oni povus imagi analizojn *a-t*, *i-t*, *o-t* kaj *a-n-t*, *i-n-t*, *o-n-t*. Sed tion Zamenhof ne faris: li lasis *at*, *it*, *ot* kaj *ant*, *int*, *ont* neanalizitaj. La kaŭzo kredeble estas ke *a*, *i*, *o*, *n* estas jam okupitaj kiel la adjektiva, infinitiva, substantiva kaj akuzativa finaĵoj.

⁷Temas pri *amatas*, *amitas* por *estas amata*, *estas amita*.

4.6. Novaj prepozicioj

Pro la evoluo de la lingvo oni nuntempe vidas ekzemple la Fundamentan “kompletigendan” elementon *far* kiel enkondukon de aganto anstataŭ *de* aŭ *fare de*. Akademio de Esperanto pritraktis en 1986 la tri eblojn indiki la aganton (per *de*, *fare de* kaj *far*; vidu 1992:73).

Li Shijun (1995) forte pledis por la uzo de *far* kaj aliaj novaj prepozicioj: *dank*, *escept*, *koncern*, *rilat*, *flank*, *kontrast*.

4.7. Aliloke uzataj terminoj

La vortelementojn nomitajn *vortoj* en la Unua libro kaj la Fundamento Kalocsay & Waringhien nomas *vortelementoj*, *lingvovortoj* kaj *neŝanĝeblaj lingvovortoj* (PAG 1980: § 276, 1985: § 276).

En *Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko* (PMEG) de Bertilo Wennergren la sekcio 37.1, kiu pritraktas ĝuste tiujn ĉi konstruelementojn, havas la rubrikon “Vortelementoj kaj signifoj”. Li dekomence asertas: “Ĉiu vortelemento havas per si mem ian signifon. Ĝi estas simbolo de ia ideo.”

Janton (1977:58) uzas en sia analizo de esperanto la francan vorton *monème* por *mot indépendant* ‘nedependa vorto’, t.e. por konstruelemento de la Fundamento. Li uzas *morphème* en pli malvasta signifo, nome ‘monème non lexical’ (‘neleksika konstruelemento’).

5. Limigoj en la kombineblo

La konstruludilo *Lego* estas bazita sur la principo de kombineblo: ĝi konsistas el konstrueroj funkciantaj kiel brikoj — aŭ eĉ kiel atomoj aŭ ĉeloj.⁸ Oni povus imagi ke la kombineblo de la pecoj de *Lego* estas bona modelo por aglutina lingvo, sed tiel tute ne estas: la kombineblo de la *Lego*-pecoj estas tre libera, dum la kombineblo de la vortelementoj en esperanto estas forte limigita.

Ni rigardu la kvar lingvovortojn *dom*, *o*, *j*, *n*, el kiuj oni povas formi la vorton *domojn*. Sed kvar elementoj naskas $4 \cdot 3 \cdot 2 \cdot 1 = 24$ permutaĵojn, en alfabeto ordo: *domjno*, *domjon*, *domnjo*, *domnoj*, *domojn*, ..., *onjdom*. El tiuj dudek kvar teorie eblaj formoj nur unu, nome *domojn*, (4,17 %) estas vorto, la aliaj dudek tri malhavas signifon. Se oni rigardas vorton kun pli da elementoj, ni diru *lernejanojn* kun ses elementoj *lern*, *ej*, *an*, *o*, *j*, *n*, oni trovas $6 \cdot 5 \cdot 4 \cdot 3 \cdot 2 \cdot 1 = 720$ permutaĵojn, de *anejjlernno* ĝis *onlernjejan*, el kiuj nur unu, nome *lernejanojn*, (0,14 %) estas akceptebla vorto.

Gramatikoj mencias la finaĵojn *j* kaj *n*, sed neniuj de mi vidita mencias ke eblas nur la ordo *jn*, ne *nj*. Ke la akuzativa finaĵo venas nur post la plurala

⁸Ĝin evoluigis en 1949 Godtfred Kirk Christiansen (1920–1995). La origino de la nomo estas la danlingva admono (plivastiginda) *Leg godt!* ‘Ludu bone!’.

en esperanto estas tro evidenta fakto por esti menciita. En pluraj lingvoj la akuzativa finaĵo sekvas la pluralan: ekzemple ni havas en Lingvo universala de 1881 *ŝtromo*, *ŝtromol*, *ŝtromoĵ*, *ŝtromoĵl* ‘rivero, riveron, riveroj, riverojn’, en la hungara *ház*, *házat*, *házak*, *házakat* ‘domo, domon, domoj, domojn’, en la turka *ev*, *evi*, *evler*, *evleri* ‘domo, domon, domoj, domojn’, en la literatura tamula *puli*, *puliy(in)ai*, *pulikal*, *pulikal(in)ai*⁹ ‘tigro, tigron, tigroj, tigrojn’ (Andronov 1989: § 43). Kiel atentigas Wim Jansen (persona mesaĝo 2014-01-08), tiu ordo estas tiel ofta ke Joseph H. Greenberg (1915–2001) nomis ĝin universalaĵo:

39. Where morphemes of both number and case are present and both follow or both precede the noun base, the expression of number almost always comes between the noun base and the expression of case. (Greenberg 1966:95, 112)
- ⟨T⟩ 39. Kie morfemoj por nombro kaj kazo ambaŭ ekzistas kaj ambaŭ aŭ sekvas aŭ antaŭiras la substantivan bazon, la esprimo por nombro preskaŭ ĉiam estas lokita inter la substantiva bazo kaj la esprimo de kazo.

Evidente la distingo singularo–pluralo estas pli kerna ol la distingo subjekto–objekto. Volapuko estas tiurilate escepto: *dom*, *domi*, *doms*, *domis* ‘domo, domon, domoj, domojn’ (Kerckhoffs 1887:15, Kerckhoffs 1887:3).

Tiuj ekzemploj espereble konvinke montras ke nur eta parto de ĉiuj teorie eblaj kombinaĵoj de elementoj havas signifon.

Ke la kombineblo de la vortelementoj en la Fundamento ne estas sen limigo montriĝas ankaŭ alimaniere, nome per la konfronto al la realo. La prefikso *bo* havas limigitan aplikeblon pro sia signifo: ne ekzistas *boŝtonoj*, *bourboj* aŭ *bodomoj* — krom ĉe poetoj kompreneble. Ekzistas jam la vorto *vaporŝipo*, kaj neniu gramatika regulo malhelpas la kreadon de *ŝipovaporo*, *biciklovaporo* aŭ *vaporbiciklo*; nur ĉar neniu ĝis nun konstruis vaporbiciklon la lasta vorto ne estas uzata.

6. Pri morfemoj

Ĉar ni bezonas paroli pri morfemoj kaj aliaj vortelementoj, mi enmetas kelkajn necesajn difinojn en tiun ĉi ĉapitron.

6.1. La difinoj de Baudouin de Courtenay (1880, 1895)

La noción morfemo (ruse морфема, germane Morphem) enkondukis Jan Niecisław Baudouin de Courtenay (1845–1929) kaj lia skolo (Baudouin de Courtenay 1972:7; Stankiewicz 1976:9).¹⁰

⁹La infikso *-in-* estas nedeviga eŭfona elemento.

¹⁰Li same estis pioniro pri la nocioj fonemo, grafemo kaj sintagmo. Li enkondukis la noción fonemo, kvankam Antoni Dufriche-Desgenettes (1804–1878) uzis la vorton *phonème* pli frue ol Baudouin de Courtenay, sed en alia senco (de Saussure 1989:433, noto 111;

La termino *morfemo* aperis ĉe li la unuan fojon en 1880 en lia *Подробная программа лекций ... в 1877-1878 учебном году* ‘Detala programo por la lekcioj ... en la studjaro 1877-1878’, paĝo 437 (Mugdan 1984:86, 195; Mugdan 1986:30). Tamen la nocion li menciis jam iom pli frue en la sama verko el 1880:

Roots in the broadest sense of the word as *morphological* atoms, units.
(Baudouin de Courtenay 1972:114)

^(T) *Radikoj* en la plej vasta signifo de la vorto kiel *morfologiaj* atomoj, unuoj.

Poste li difinis la terminon jene:

The *morpheme* = that part of a word which is endowed with psychological autonomy and is for the very same reason not further divisible. (Baudouin de Courtenay 1895; ĉi tie citita laŭ 1972:153)

^(T) La *morfemo* = tiu parto de vorto kiu estas dotita per psikologia aŭtonomio kaj estas pro la sama kaŭzo ne plue dividebla.

Verŝajne tiu ĉi — nun tre grava — nocio ne tuj fariĝis vaste konata. Baudouin naskiĝis en Radzymin, situanta proksimume 23 kilometrojn nordoriente de Varsovio, kaj li laboris dum la menciitaj jaroj en Kazano. Zamenhof ne konis lin antaŭ 1907-10-07, sed en tiu ĉi tago Baudouin de Cortenay, traveturante Varsovion, vizitis Zamenhofon (Zamenhof 1948b:57, 59). Kvankam Kazano kaj Varsovio ambaŭ troviĝis en la rusa regno, ne estas klare kiom liaj verkoj estis konataj en Varsovio antaŭ la publikigo de la Fundamento. Ryszard Rokicki (1987:91) skribas: “en la tempo de Zamenhof, la nocio ‘morfemo’ ne estis konata”. Tamen ni konstata ke Zamenhof havis ege bonan intuician komprenon pri la nocioj de morfemo kaj fonemo, kiel ni povas vidi en liaj lingvoj Lingvo universala de 1881 kaj Lingvo internacia de 1887.

6.2. La difinoj de Bloomfield (1926, 1933)

Kvankam la verkoj de Leonard Bloomfield (1887–1949) ne povis influi Zamenhofon, ni menciis ĉi tie iom pri la laboroj de Bloomfield rilate al morfemoj. Laŭ li morfemo estas minimuma formo, kun la klarigo:

Mugdan 2011). Jones (1964:3) skribas “the first linguist to enter this field of enquiry and to point out the distinction between the “phone” (speech-sound, Russian *zvuk*) and the “phoneme” (Russian *fonema*) was almost certainly JAN BAUDOUIN DE COURTENAY” ‘la unua lingvisto eniranta tiun kampon de esploro kaj indikanta la distingon inter la “fono” (lingvo-sono, ruse *zvuk*) kaj la “fonemo” (ruse *fonema*) estis preskaŭ certe Jan Baudouin de Courtenay’. Li aldonas en piednoto (1964:3): “BAUDOUIN DE COURTENAY stated more than once that the word *fonema* was the invention of a student of his named KRUSZEWSKI. The formulation of the theory was, however, the work of BAUDOUIN DE COURTENAY.” ‘Baudouin de Courtenay pli ol unufoje asertis ke la vorto *fonema* estis la invento de studento lia kun la nomo Kruszewski. La formulado de la teorio estis tamen la laboro de Baudouin de Courtenay.’

Thus a morpheme is a recurrent (meaningful) form which cannot in turn be analyzed into smaller recurrent (meaningful) forms. Hence any unanalyzable word or formative is a morpheme. (Bloomfield 1926:155)

⟨^T⟩ Sekve morfemo estas reaperanta (signifohava) formo kiu ne estas analizebla en pli malgrandajn reaperantajn (signifohavajn) formojn. Sekve ĉiu neanalizebla vorto aŭ afikso estas morfemo.

Por tion kompreni oni bezonas difinon de *formo*, kiun li donas antaŭe (sam-paĝe):

The vocal features common to same or partly same utterances are *forms*; [...]

⟨^T⟩ La voĉaj trajtoj komunaj al samaj aŭ parte samaj eldiroj estas *formoj*; [...].

Li pritraktis la nocion ankaŭ en sia libro *Language* (1933:161–169). Tie li esprimas la minimumecon iom alie:

A linguistic form which bears no partial phonetic-semantic resemblance to any other form, is a *simple* form or *morpheme*. (Bloomfield 1933:161)

⟨^T⟩ Lingva formo kiu ne parte similas fonetike-semantike al iu alia estas *simpla* formo aŭ *morfemo*.

Gravas ĉi tie la postulo pri signifohavo: ĝi ne estas facile difinebla, sed klaras ke ĝi dependas de la konoj kiujn iu havas, ekzemple pri aliaj lingvoj kaj pri la origino de la lingva formo. Ekzistas vortelementoj kiuj estas tre produktivaj, kaj aliaj kiuj estas malpli produktivaj. Ne ekzistas ununura kriterio.

Krome oni notu ke morfemo ne estas nur formo, sed kunfandaĵo de formo kaj signifo — tion ilustras tri homonimoj en la angla, *pear* ‘piro’, *pair* ‘paro’, *pare* ‘fortranĉi’, kies simileco estas pure fonetika kaj ne akompanata de la signifoj (Bloomfield 1933:161). Alia ekzemplo estas *writer* ‘verkisto’ kaj *brighter* ‘pli hela’, analizeblaj kiel *writ·er* kaj *bright·er*, kun du malsamaj morfemoj *er* kaj *er*: la unua estas *er* ‘isto’, la dua *er* ‘pli’. Tiajn duoblaĵojn Zamenhof klopodis por eviti. Ni menciu la vorton *teujo* ‘tearbusto’; ‘tepoto’, kie *uj* povas esti konsiderata kiel du morfemoj — almenaŭ estas plej facile, kvankam ja ne necese, kompreni la vorton tiel.

Poste la morfologio estis evoluigita en la 1940-aj jaroj.

6.3. Postaj studoj

Pri la gravo de la nocio morfemo ni citu Frithiof Rundgren (1921–2006):

The study of morphemes gives us, among other things, a deep insight into language as a system of symbols, materialized in linguistic form. For language in the sense of a genetically and socially determined system of symbolic behaviour, regulating the communicative behaviour of man, is throughout *form*, the so-called “substance” being itself nothing but linguistic form. (Rundgren 1976:1)

⟨^T⟩ La studo de morfemoj donas al ni, inter alie, profundan enigardon en lingvon kiel sistemon de simboloj, materiigitan en lingva formo. Ĉar lingvo

en la senco de genetike kaj socie determinita sistemo de simbola kunduto, stiranta la komunikan konduton de la homo, estas tut-solide *formo*; la tiel nomata “substanco” estas en si mem nenio krom lingva formo.

Joachim Mugdan (1986) prezentas detalegan studon pri la multaj nocioj por kiuj oni uzis la terminon *Morphem* — kun polemiko pro tiu fakto, kiu malfaciligas la komprenon ne nur inter sciencistoj kaj neprofesiuloj, sed ankaŭ inter la sciencistoj mem (1986:38). Por la nocio de Baudouin de Courtenay citita en sekcio 6.1 li proponas *Minimalzeichen* ‘minimuma signo’ kaj *Elementarzeichen* ‘elementa signo’ (1986:39). Tamen tiun proponon oni ĝenerale ne sekvas, kaj ekzemple ne en la terminaro de R. L. Trask, kiu donas la nun plej ofte uzatan difinon:

morpheme [...] The minimal grammatical unit; the smallest unit which plays any part in morphology and which cannot be further decomposed except in phonological or semantic terms. (Trask 1993)

^(T) **morfemo** [...] La minimuma gramatika unuo; la plej malgranda unuo kiu ludas rolon en morfologio kaj kiu ne povas esti plue malkomponata krom en fonologiaj aŭ semantikaj konsideroj.

Stephen R. Anderson teorie kaj historie pritraktas la nocian de morfemo. Li finas pensige — kaj pesimisme:

We commonly assume that both the intension and the extension of the term [*morpheme*] are virtually self-evident, but it turns out on closer examination to hold the keys to some of the deep questions we can ask about the nature of language. One of these, indeed, is whether or not there is any such thing as a ‘morpheme’. (Anderson 2015)

^(T) Ni kutime supozas ke kaj la idea enhavo kaj la konkretaj alreferaĵoj de la termino [*morfemo*] estas praktike mem-evidentaj, sed montriĝas dum pli proksima konsidero ke en ĝi kuŝas ŝlosiloj al iuj el la profundaj demandoj kiujn ni povas starigi pri la naturo de lingvo. Unu el ili, efektive, estas ĉu ekzistas aŭ ĉu ne ekzistas iu afero kiel ‘morfemo’.

7. Vortoj, morfemoj kaj konstruelementoj

La demando ĉu iu lingva elemento estas aŭ ne estas konstruelemento en la Fundamento estas tute facile respondebla kun certeco: sufiĉas enrigardi en la libron mem. Male, demando ĉu iu elemento estas morfemo aŭ ne kelkfoje ne estas facile respondebla, i.a. pro tio ke la postulo de signifohavo dependas de ies konoj. Tiel ĝi similas al multaj aliaj demandoj pri lingvoj.

La disdividoj en morfemojn povas esti farataj ĉe pluraj niveloj, ekzemple je la fakte uzata lingvaĵo kun ties multaj kombinaĵoj, kaj je la etimologia nivelo, ne ĉiam aktiva sed tamen ankoraŭ signifoporta kaj potencie grava en estonta evoluigo.

Iuj povus pensi ke la etimologio ne estas grava por la funkcianta lingvaĵo, sed konoj pri ĝi tamen estos necesaj, ekzemple por la evoluigo de la terminologio. En la scienco kaj tekniko ekzistas en iuj lingvoj milionoj da terminoj. Por menciigi nur kelkajn ciferojn mi citas el artikolo de Galinski & Reineke (2011:11). La *Chemical Abstracts Service* (CAS, Servo de kemiaj resumoj) enskribis ĝis septembro 2009 kvindek milionojn da registritaj organikaj kaj neorganikaj substancoj, kaj alvenis en majo 2011 al la sesdekmilionan substancan. Ankaŭ kiam temas pri medicinaj fakvortoj la amplekso estas granda: ekzistas 80 000 nomoj por medikamentoj; 10 000 nomoj por korpopartoj, organoj kaj organpartoj; 20 000 nomoj por indiki organfunkciojn; kaj 60 000 nomoj por malsanoj, esplorprocedoj kaj operacimetoj. La medicina vortprovizo kun konsidero de gravaj nocioj en la limkampoj ampleksas laŭ la aŭtoroj duonan milionon. Multegaj el tiuj terminoj estas formataj per kombinado, iom simile al la kombinado en esperanto, kaj kun grekdevenaj kaj latindevenaj elementoj. Se esperanto estus transprenonta eĉ parteton de tiuj terminoj, la etimologio fariĝus ĉiom aktuala.

Multaj konstruelementoj en la Fundamento estas samtempe morfemoj, ekzemple *dom*, *perd*, *verd*. Sed pluraj konstruelementoj ne estas morfemoj, ĉar ili ne estas minimumaj, ekzemple *konsonant*, analizebla kiel *kon·son·ant*, komparebla kun *kun·son·ant*, kie *son* kaj *ant* estas kaj konstruelementoj kaj morfemoj, dum *kon* en la signifo de ‘kun’, ne estas konstruelemento, sed tamen morfemo. Ĝi aperas en la vortoj *konfirmi*, analizebla kiel *kun·firm·ig·i*; *konkludi*, analizebla kiel *kun·ferm·i*; *konsisti*, analizebla kiel *kun·star·ig·i*; kaj multaj aliaj. La verbo *enkonduki*, kiu laŭ la Fundamento konsistas el tri elementoj *en*, *konduk*, *i*, enhavas kvar morfemojn, *en*, *kon*, *duk*, *i*. Simile *produkt* estas neanalizebla laŭ la Fundamento, sed konsistas el du morfemoj *pro* kaj *dukt*, aŭ eĉ *pro*, *duk* kaj *t*.

La Fundamenta radiko *leŭtenant* estas konstruelemento, sed ne morfemo, ĉar etimologie analizebla kiel *lok·ten·ant*. Do *konfirm*, *konklud* kaj *leŭtenant* estas konstruelementoj sed ne morfemoj, ĉar ne minimumaj.

Alidirekte, multaj morfemoj ne estas konstruelementoj. Ni jam vidis la ekzemplon de *kon* en la signifo de ‘kun’. Aliaj estas *re* en la Fundamentaj

registri, analizebla kiel *re·port·i*,
rekomendi, analizebla kiel *re·kun·man·don·i*,
rekruto, analizebla kiel *re·kresk·ig·ul·o*,
religio, analizebla kiel *re·lig·il·o*,
respekto, analizebla kiel *re·rigard·o*,
respondi, analizebla kiel *re·promes·i* kaj
restoracio, analizebla kiel *re·star·ig·ej·o*.

La analizeblo ĉi tie estas je la etimologia nivelo. Multaj vortoj havas vort-komencon *ri* kun similaj analizoj. Oni devas distingi *re·pet·i* kaj *re·mark·i* disde *ripet·i* kaj *rimark·i*.

La Fundamenta elemento *re* ja estas kaj konstruelemento kaj morfemo en multaj vortoj, ekzemple *rebati*, *rebonigi*, *rebrilo*, *rediri*, *redoni*, *refoje*, *reformi*, *regeneri*, *reĵeti*, *refuri*, *rekoni*, *rekonstrui*, *relegi*, *remaĉi*, *resalti*, *reveni*, *revidi* (ĉiuj en PIV 2005).

Resume:

<i>Vorto</i>	<i>Morfemo</i>	<i>Konstru- elemento</i>	<i>Ekzemploj</i>
jes	jes	jes	<i>de, da, el, eĉ, kun</i>
jes	jes	ne	<i>baf</i>
jes	ne	jes	
jes	ne	ne	<i>domo, vortaro</i>
ne	jes	jes	<i>far,* perd, re en reveni, o, a, as, j, n</i>
ne	jes	ne	<i>kon en la senco de 'kun', re en respondi</i>
ne	ne	jes	<i>konsonant, konsist, konfirm</i>
ne	ne	ne	<i>?, !, &, +</i>

Noto. * Kiel jam menciite kelkaj uzas *far* kiel vorton.

8. Signetoj internaj kaj la apostrofo

Zamenhof uzis kvin malsamajn simbolojn por indiki la limon inter du vortelementoj:

, La simbolo , , metita je la nivelo de komo, sed distingenda disde komo. Mi nomos ĝin *UL-streko*.

' La simbolo ', metita je la nivelo de apostrofo, sed distingenda disde apostrofo. Mi nomos ĝin *UV-streko*. Ĝi estas la sama signo kiun oni uzas en matematiko por la derivaĵo de funkcio: *f'*.

- Mallonga ligstreko.

| Vertikala streko.

/ Oblikva streko.

Ni rigardu en kiuj publikigaĵoj ili estis uzataj.

8.1. Signetoj internaj en la Unua libro: la UL-streko

La konstruelementoj de la Unua libro el 1887 aperas sen aparta signo por la nekompletaj vortopartoj, ekzemple en la unua eldono de la ruslingva libro *kaj*, *kajer*, *kaldron*, *kaleŝ*; kaj en la dua eldono *kaf*, *kaj*, *kajer*, *kaldron*, *kaleŝ*. Sed, kiel ni vidis en sekcio 3.2, Zamenhof tie uzis specialan signon por indiki la limon inter du vortelementoj, ekzemple en *frat,in,o*. Foje ĝi estas inversigita tiel ke la maldika parto estas direktita supren.

8.2. Signetoj internaj en la Dua libro: tri permesataj simboloj

En la Aldono al la *Dua Libro de l' lingvo Internacia* verkita en 1888 Zamenhof avertas ke oni ne presu la UL-strekon kiel komon:

Se oni bezonas presi ion kun signetoj internaj (,), oni devas ĝin fari garde, ke la leganto ne prenu ilin por komoj (,). Anstataŭ la signeto (,) oni povas ankaŭ presadi (') aŭ (-). Ekzemple: *sign,et,o* — *sign'et'o* — *sign-et-o*. (Zamenhof 1983:32)

8.3. En la Fundamento aperas la UV-streko, la vertikala streko kaj la oblikva streko

En la Universala vortaro la nekompletaj konstruelementoj estas markitaj per la simbolo ',¹¹ ekzemple *kaĉ'*, *kadr'*, *kaduk'*, *kaf'*, *kaĝ'*, *kahel'*, *kaj*.¹² Ĝi estas uzata ankaŭ por marki la limon inter du vortelementoj en la Universala vortaro kaj en la franclingva, anglalingva kaj germanlingva gramatikoj — oni distingu *volont'e* disde *vol'ont'e*. Kiel ni vidis li jam en 1888 akceptis tiun signon por indiki la limojn inter vortelementoj. En la ruslingva gramatiko tiun funkcion plenumas vertikala streko (**far|ont|a**) kaj en la pollingva oblikva streko (**far/ont/a**).¹³

En la Ekzercaro, male, aperas nur plenaj vortoj sen indiko de la internaj limoj. (La ligstrekoj en § 2 kaj § 3 disigas silabojn, ne kontruelelementojn.)

Post la Unua libro la UL-streko kaj la UV-streko estas evidente celataj nur por lernolibroj kaj vortaroj, kaj neniel por ordinara skribo.

8.4. La apostrofo

Kontraste al la kvin supre menciitaj signetoj la apostrofo estas parto de la ordinara skribo, sed kun strikte limigita rolo, menciita en la deksesa regulo:

¹¹Mi ne vidis averton kontraŭ la risko ke la leganto prenu la simbolon ' por apostrofo.

¹²Eblaj problemoj aperas ĉe *etaĝ* kaj *rest*.

¹³PIV (1977) kaj la sekvantaj NPIV (2002) kaj PIV 2005 (2005) adoptis la metodon de la pollingva gramatiko, ekzemple en **★redakci/o**, sed por la oficialigitaj vortoj tiuj vortaroj uzas superan indekson, ekzemple en **redakt¹i**, kie mi skribas *redakt^{OA1}i*.

ĝi povas anstataŭi la substantivan finaĵon *o* kaj la literon *a* en la artikolo, sed nur post prepozicioj finiĝantaj per vokalo. Mi citu

el la franclingva gramatiko:

Ŝiller' (Schiller) au lieu de *Ŝiller'o*; *de l'mond'o* au lieu de *de la mond'o*;

el la anglalingva gramatiko:

de l' mond'o for *de la mond'o*; *Ŝiller'* for *Ŝiller'o*;

el la germanlingva gramatiko:

Ŝiller', statt *Ŝiller'o*; *de l'mond'o*, statt *de la mond'o*;

el la ruslingva gramatiko:

dom', BM. **dom|o**; **de l'mond|o** BM. **de la mond|o**;

el la pollingva gramatiko:

Ŝiller' zam. **Ŝiller/o**; **de l'mond/o** zamiast **de la mond/o**.

Ni vidas ke en la anglalingva gramatiko estas vortinterspaco post *l'*, en la aliaj kvar ne.

La malsameco de la apostrofo ' disde la UV-streko ' kaj la aliaj samfunkciaj simboloj | kaj / estas ĉie respektata en la Fundamento.

9. Morfologie bazita tipologio de lingvoj

9.1. Tri tipoj

Frua morfologie bazita tipologio de lingvoj aperis en 1808 fare de Karl Wilhelm Friedrich von Schlegel (1772–1829). Li distingas unue du klasojn:

Entweder werden die Nebenbestimmungen der Bedeutung durch innre Veränderung des Wurzellautes angezeigt, durch Flexion; oder aber jedesmal durch ein eignes hinzugefügtes Wort, was schon an und für sich Mehrheit, Vergangenheit, ein zukünftiges Sollen oder andre Verhältnißbegriffe der Art bedeutet; und diese beiden einfachsten Fälle bezeichnen auch die beiden Hauptgattungen aller Sprache. (von Schlegel 1808:45)

^(T) Aŭ la flankaj difinoj de la signifo estas montrataj per interna ŝanĝiĝo de la radiko, per fleksio; aŭ ĉiun fojon per propra aldonita vort[ement]o, kio per si mem signifas 'pluralo', 'pasinteco', 'estonta devigo' aŭ signalas aliajn tiuspecajn rilatnociojn; kaj tiuj du plej simplaj okazoj ankaŭ karakterizas la du ĉefajn lingvospecojn.

Li do celas la fleksiajn kaj la aglutinajn lingvojn ĉi tie. Tuj poste li mencias la ĉinan lingvon, kiu estas unusilaba kaj ekzemplo de izola lingvo.

August Wilhelm von Schlegel (1767–1845), pli aĝa frato de Friedrich von Schlegel, distingas en 1818 tri klasojn de lingvoj bazitajn sur morfologiaj kriterioj — estis sistemo kiun oni poste dum longa tempo uzadis. Li atribuas tiun ĉi disdividon al sia frato Karl Wilhelm Friedrich von Schlegel ĵus citita (de Schlegel 1818:85, noto 6).

[...] les langues sans aucune structure grammaticale, les langues qui emploient des affixes, et les langues à inflexion. (de Schlegel 1818:14; vidu ankaŭ Seuren 1998:81)

^(T) [...] la lingvoj sen ajna gramatika strukturo, la lingvoj kiuj uzas afiksojn, kaj la lingvoj kun fleksio.

La unuajn oni nun nomas *izolaj*, la duajn *aglutinaj* kaj la triajn *fleksiaj*. John Wells (1978:27) nomas la lastajn *fandaj lingvoj*, ĉar ĉe ili la morfemoj estas “kunfanditaj, neapartigeblaj”. Similkaŭze Jansen (2010:282) nomas ilin *fuziaj*.

Wilhelm von Humboldt skribas tute simile pri “Isolirung der Wörter, Flexion und Agglutination” (1836:CXXXV).

August Schleicher (1821–1868) publikigis en 1859 tre detalan studon pri morfologia disdivido de la lingvoj. Li parolas pri kvar klasoj:

I. classe. [...] nennen wir diese classe die isolierende. [...]

II. classe. [...] Diese classe nennen wir die zusammen fùgende. [...]

III. classe. [...] Diese Art der wurzelveränderung nennen wir flexion. [...]

IV. classe. [...] Beides kann aber auch zugleich statt finden [...]

(Schleicher 1859:3–4)

^(T) Unua klaso. [...] ni nomas tiun ĉi klason la *izolanta*. [...]

Dua klaso. [...] Tiun ĉi klason ni nomas la *kuniganta*. [...]

Tria klaso. [...] Tiun specon de radikŝanĝigo ni nomas *fleksio*. [...]

Kvara klaso. [...] Ambaŭ [t.e. kaj II kaj III] povas tamen samtempe okazi [...]

Mi ĉi tie menciis nur la teoriojn pri lingvotipoj kiuj estus povintaj influi Zamenhofon. Pri pli postaj teorioj vidu ekzemple Malmkjær (Red., 1991:272–276). Mi tamen donu la nunajn difinojn:

isolating language [...] A language whose words are invariable in form, with each word typically consisting of a single morpheme. (Trask 1993)

^(T) **izola lingvo** [...] Lingvo kies vortoj estas forme nevariaj, kun ĉiu vorto tipe konsistanta el unu sola morfemo.

isolating language A type of language in which the words are uninflected, and syntactic relationships are primarily shown by word order; [...] (Crystal 1992:4:309)

^(T) **izola lingvo** Tipo de lingvo en kiu la vortoj estas ne-fleksitaj, kaj sintaksaj rilatoj estas unuavice montritaj per vortordo; [...]

agglutination [...] A type of morphological structure in which words can be readily divided into a linear sequence of distinct morphemes, each of which typically has a fairly consistent shape and a single consistent meaning or function. (Trask 1993)

^(T) **aglutinado** [...] Tipo de morfologia strukturo en kiu vortoj povas esti facile divideblaj en linia vico de distingaj morfemoj, ĉiu el kiuj tipe havas sufiĉe konstantan formon kaj unu solan signifon aŭ funkcion.

agglutinative language A type of language in which words are typically contain a linear sequence of morphs showing relatively little morphophonemic fusion; [...] (Crystal 1992:275)

^(T) **aglutina lingvo** Tipo de lingvo en kiu vortoj tipe enhavas linian vicon da morfoj montrante relative malmulte da morfofonemika fuzio; [...]

inflection [...] 1. The variation in form of a single lexical item as required by its various grammatical roles in particular sentences. (Trask 1993)

^(T) **fleksio** [...] 1. La forma variado de unuopa leksika unuo postulata de ĝiaj diversaj roloj en specifaj frazoj.

inflection 1 A morphological process, typically expressed by an affix which does not change the word class of the stem to which it is attached, and whose function is to signal grammatical relationships [...] (Crystal 1992:307)

^(T) **fleksio** 1 Morfologia procezo, tipe esprimita per afikso kiu ne ŝanĝas la vortklason de la stamo al kiu ĝi estas kunigita, kaj kies funkcio estas signali gramatikajn rilatojn [...]

Verŝajne ne necesas mencii ke la limoj inter la klasoj ne estas akraj: ekzistas gradoj de aglutineco. Comrie (1983:47–48; 1989:50–51) mencias la ekzemplon de la finna kaj estona, du proksime parencaj lingvoj, kie la finna elmontras pli da segmentigeblo ĉe la vortoj kaj pli da nevario ĉe la vortelementoj ol la estona. Aliaj ekzemploj, pli proksimaj al la nuna temo, aperas en la libro (1982) de Detlev Blanke: li kontrastige esploras la vortestigon en esperanto kaj la germana, plej notinde en la tria ĉapitro, “Die Morpheme und ihre Kombinierbarkeit” (1982:27–42) ‘La morfemoj kaj ilia kombineblo’ kaj trovas tie diferencojn — sed ankaŭ multajn similaĵojn — inter aglutina kaj fleksia lingvo.

La Lingvo internacia de 1887 estas aglutina, same kiel ĝiaj antaŭirintoj Lingwe uniwersala de 1878 kaj Lingvo universala de 1881.¹⁴

9.2. Doni malsamajn valorojn al la lingvotipoj:

“von jedem Verdachte der Agglutination gerettet”

Aperis jam en la verko de de Schlegel (1818) klara skalo de valoroj de la lingvoj. Li skribas:

De telles langues doivent présenter de grands obstacles au développement des facultés intellectuelles; leur donner une culture littéraire ou scientifique quelconque, semble être un tour de force. (de Schlegel 1818:14)

^(T) Tiaj lingvoj [la izolaj] devas prezenti grandajn obstaklojn por la evoluigo de la intelektaĵoj kapabloj; doni al ili ajnan literaturan aŭ sciencan kulturon ŝajnas postuli grandajn fortojn.

La izolaj lingvoj estas maltaŭgaj por kultura evoluigo; la aglutinaj iom malpli:

¹⁴Oni kutime mencias la sufiksojn *-ĉjo* kaj *-njo* (*Miĥaelo* $\mapsto$ *Miĉjo*; *Henrieto* ‘Henrietta’ $\mapsto$ *Henriĉjo*, *Henjo* ‘Hetty’) kiel neaglutinajn trajtojn, ekzemple ĉe Wells (1978:33, piednoto 6). Tamen tiaj etaj esceptoj verŝajne ekzistas en ĉiuj aglutinaj lingvoj. En la turka la plurala finaĵo estas *lar* aŭ *ler* pro la vokalharmonio: *ağaç*, *ağaçlar* ‘arbo, arboj’; *el*, *eller* ‘mano, manoj’.

Les langues, dont le système grammatical est fondé sur les affixes, peuvent avoir de certains avantages, malgré leurs imperfections. Je pense, cependant, qu'il faut assigner le premier rang aux langues à inflexion. On pourrait les appeler les langues organiques, parce qu'elles renferment un principe vivant de développement et d'accroissement, et qu'elles ont seules, si je puis m'exprimer ainsi, une végétation abondante et féconde. (de Schlegel 1818:15)

⟨^T⟩ La lingvoj kies gramatika sistemo estas fondita sur la afiksoj povas havi certajn avantaĝojn, malgraŭ siaj malperfektaĵoj. Mi pensas, tamen, ke necesas doni la unuan rangon al la fleksiaj lingvoj. Oni povas nomi ilin la organikaj lingvoj, ĉar ili enhavas vivan principon de evoluo kaj kresko, kaj ke ili solaj havas, se mi povas tiel esprimi min, kreskajaron abundan kaj fruktodonan.

Da sie [die Flexionsmethode] jedes Element der Rede in seiner zweifachen Geltung, seiner objectiven Bedeutung und seiner subjectiven Beziehung auf den Gedanken und die Sprache, nimmt, und dies Doppelte in seinem verhältnißmäßigen Gewichte durch danach zugerichtete Lautformen bezeichnet, so steigert sie das ursprünglichste Wesen der Sprache, die Articulation und die Symbolisirung, zu ihren höchsten Graden.

[...]

in den ersteren die Flexion durch die Festigkeit der Worteinheit von jedem Verdachte der Agglutination gerettet [...] (von Humboldt 1836:CCIV)

⟨^T⟩ Ĉar ĝi [la fleksia metodo] prenas ĉiun elementon de la parolo en ties duflanka valoro, nome ties objektiva signifo kaj ties subjektiva rilato al la penso kaj la lingvo, kaj ĉar ĝi nomas tiun duoblaĵon laŭ ties relativa gravo pere de al ĝi adaptitaj sonformoj, ĝi altigas la originan esencon de la lingvo, la artikuladon kaj la simboligon, ĝis la plej altaj niveloj.

[...]

en la unua [temas pri sanskrito] la fleksio per la firmeco de la vortunueco savas ĝin de ĉiu suspekto de aglutineco [...]

La ideo pri malsupereco de certaj lingvoj estis vaste disvastiĝinta dum la deknaŭa jarcento. Tion montras ekzemple verko pri ĝenerala kultura historio de la homaro verkita de ne-specialisto pri lingvoj, Anton Nyström (1842–1931), kuracisto, lekciisto, popolklerigisto kaj verkisto. Li skribas ke la aglutinaj lingvoj ne plene kunfandas la vortopartojn, kio por li evidente estas malbona trajto:

Det sålunda erhållna sammansatta uttrycket ernår dock aldrig fullständig enhet; hufvudroten förblir alltid stel och oförändrad i form och mening, och ändelsen uppfattas ej såsom något med den förra organiskt förenadt, utom som något särskildt. (Nyström 1886:233)

⟨^T⟩ La tiel ricevita kunigita esprimo tamen neniam atingas plenan unuecon; la kapradiko restas ĉiam rigida kaj neŝanĝita laŭ formo kaj signifo, kaj la finaĵo ne estas komprenata kiel io kun la unue menciita organike unuiĝinta, sed kiel io aparta.

Male, la fleksiaj lingvoj atingas plenan unuiĝon:

I böjningsspråken uppnås fullständig enhet mellan ordens båda element: begreppsdel (roten) och formdelen (ändelsen m.m.), hvilka sammanblandas till ett helt såväl med afseende på värkan som form- och ljudförändringar, hvarigenom mestadels spåren af sammansättningen försvinna. (Nyström 1886: 237)

^(T) En la fleksiaj lingvoj kompleta unuiĝo estas atingita inter la du elementoj de la vortoj: la nokia parto (la radiko) kaj la forma parto (la finaĵo k. a.), kiuj kuniĝas al integra unuo same rilate al la funkcio kiel rilate al formaj kaj sonaj ŝanĝiĝoj, per kio plejparte la spuroj de la kunigo malaperas.

Per tiuj ĉi citaĵoj mi ja ne volas pretendi ke Zamenhof konis tiujn verkojn, nur montri ke la penso pri malsamaj valoroj de la lingvoj estis vaste disvastigita. Kaj spite al tiuj indikoj de malsamaj valoroj Zamenhof elektis aglutinan karakteron de sia lingvo.

Ni notu ke Baudouin de Courtenay laŭ Mugdan en 1910 klare distancigis sin de tiu skalo de valoroj:

Die Theorie, daß sich die Sprache im übergang von Isolation über Agglutination zu Flexion vervollkommne, brandmarkte er als Zeugnis des "indogermanischen Größenwahns" (1910b:54). (Mugdan 1984:101)

^(T) La teorion ke la lingvo en la transiro de izolado tra aglutinado al fleksio sin perfektigis, li brulstampis kiel ateston de la "hindĝermana megalomanio" (1910b:54).

Cetere ni notu ke Baudouin de Cortenay en 1907 forte laŭdis la Universalan vortaron:

Dieses Wörterbuch ist großartig verfaßt. Alle wirklich lebenden sprachlichen Bestandteile werden darin berücksichtigt: nicht nur alle semasiologisch gefärbten Wortbasen („Wurzeln“), sondern auch alle formativen Elemente (Morpheme), d.h. Präfixe, Suffixe, Endungen. [...] Das esperantische Wörterbuch sollte als Muster für alle anderen Wörterbücher dienen. (1907a:418/94) (Mugdan 1984:94)

^(T) Tiu ĉi vortaro estas grandioze verkita. Ĉiuj reale vivantaj lingvaj elementoj estas tie konsiderataj: ne nur ĉiuj semantike farbitaj vortbazoj ("radikoj"), sed ankaŭ ĉiuj formantaj elementoj (morfemoj), t.e. prefiksoj, sufiksoj, finaĵoj. [...] La esperanta vortaro devus servi kiel modelo por ĉiuj aliaj vortaroj.

Alia fakto estas ke la franca sistemo de unuoj de grandoj, enkondukita en 1795, uzis nomojn formitajn per prefiksoj, kaj tiuj nomoj estis konataj jam de multaj jaroj antaŭ 1878. Vidu sekcion 15.2.

9.3. Ĉu laŭtempa evoluo?

August Wilhelm von Schlegel ne eniris en la demandon pri evoluo:

Une question fort ardue, et que je n'entamerai pas ici, c'est de savoir si les langues peuvent, ou non, graduellement changer de nature, et passer de la première classe à la seconde et de la seconde à la troisième. S'il étoit possible de répondre à cette question par des faits d'une certaine évidence, une foule de

problèmes relatifs aux origines de la civilisation se trouveroient par-là même résolus. (de Schlegel 1818:86, noto 6)

⟨^T⟩ Demando ardega, kaj kiun mi ne ekkonsideros ĉi tie, estas ĉu la lingvoj povas, aŭ ne povas, grade ŝanĝi sian naturon kaj pasi de la unua klaso [la izolaj] al la dua [la aglutinaj] kaj de la dua al la tria [la fleksiaj]. Se estus eble respondi al tiu demando per iom evidentaj faktoj, amaso da problemoj pri la origino de la civilizo estus solvitaj.

Schleicher eksplice skribas en sia studo de 1859 ke li ne eniras en la historion de la lingvoj: “Auf die geschichtliche seite sind wir in unserm versuche für diß mal nicht ein gegangen.” (1859:36) ‘En la historian flankon ni en nia provo tiun ĉi fojon ne eniris.’ Kaj pri la parenceco de la lingvoj li aldonis: “Die morphologie ist also für die ermittelung von sprachverwantschaft nicht maß gebend” (1859:38) ‘La morfologio do ne donas mezuron por lingva parenceco.’

Kvankam August Wilhelm von Schlegel lasis la demandon de laŭtempa evoluo nerespondita, ofte aperis dum la deknaŭa jarcento la ideo de laŭtempa evoluo: la izolaj lingvoj evoluis al aglutinaj kaj tiuj ĉi al fleksiaj:

Det lider dock intet tvifvel, att dessa språk börjat med ett enkelt rot-stadium eller såsom enstafviga och sedan genomgått det agglutinativa stadiet. (Nyström 1886:237)

⟨^T⟩ Tamen ne ekzistas dubo ke tiuj lingvoj [la fleksiaj] komenciĝis per simpla radik-stadio aŭ kiel unusilabaj kaj poste trairis la aglutinan stadion.

9.4. Kiel do tipologie priskribi esperanton?

La leksiko de esperanto estas de hindeŭropa origino kun malmultaj esceptoj, ekzemple la hebredevenaj *amen*, *raben*^{UV}*o*, *satano*, *torao*.¹⁵

Ernest Drezen (1931:15) atentigas pri la fakto ke fare de Zamenhof estis “konservita en la lingvo la plene aglutina unuformeco de la lingvo-elementoj esperantaj.”

9.4.1. Piron: eŭropa – azia

Claude Piron (1931–2008) emfazis ne-hindeŭropajn trajtojn de la lingvo. Li demandis ĉu esperanto estas “eŭropa” aŭ “azia” lingvo, kie la du adjektivoj estas kodoj por *fleksia* respektive *aglutina* aŭ *izola*. Li konkludas: “Esperanto estas fundamente lingvo izola” kaj “Esperanto multetrajte najbaras al la aglutina grupo” (Piron 1977:31).

¹⁵En Lingvo universala de 1881 ekzistis pliaj, ekzemple *bu* ‘inter’, *jerko* ‘malantaŭo’, *semmo* ‘suno’; vidu Waringhien (1989) kaj Kiselman (2011:97).

9.4.2. Cherpillod kaj Caraco: aglutina – izola

André Cherpillod daŭrigas la strebon for de hindeŭropeco konstatante ke

“1. Jes, Esperanto estas la tipo mem de aglutina lingvo.” (1988:19); ke

“2. Esperanto estas eĉ pli aglutina ol la aglutinaj lingvoj.” (1988:21); kaj finfine ke

“3. Esperanto ne estas aglutina.” (1988:21).

Jean-Claude Caraco verkis franclingvan tekston (2003), poste publikigita du-lingve kun la titolo *Ĉu esperanto estas aglutina lingvo? L’espéranto est-il une langue agglutinante?* (2011). Li prudente skribas:

Miaflanke, mi opinias, ke mi montris, ke oni devas uzi tiun tipologion kun singardo, tio estas, post precizigo de la difino de aglutino. Tamen aperas kun evidento, ke Esperanto estas la frukto de la celo al lingvo kun travidebla diserigblo de la morfemoj, konstruita el la eŭropa vortaro, kiu tre malmulte posedas tiun econ. Tio kondukis al lingvo kvazaŭ aglutina, eĉ izolanta, sub la trompa aspekto kaj kun la sintakso de kunfandiĝa lingvo. (Caraco 2011:18)

Cherpillod verkis tekston (2009a) en la franca kaj esperanto kun la titolo *La intima naturo de Esperanto; La nature intime de l’espéranto; Esperanto Eŭropa?; Tute ne! L’espéranto européen? Pas du tout!*, el kiu la esperantlingva parto estas publikigita (2009b). Li konkludas: “Fakte, Esperanto estas *pli izola ol aglutina*, male de tio ofte dirata (eĉ de mi mem)” (Cherpillod 2009a:10, 2009b:105).

9.4.3. Koutny: esperanto en la kadroj de morfologia tipologio kaj de sintaksa tipologio

Ilona Koutny komparas esperanton kun aliaj lingvoj kaj el morfologia vidpunkto, kaj el sintaksa vidpunkto. Ŝi konkludas:

Die Agglutination ist in der Wortbildung durchgängig (obwohl noch nicht immer voll genutzt). Syntaktische Verhältnisse werden durch Präpositionen und Pronomen ausgedrückt.

Zusammenfassend kann man sagen: Esperanto ist eine agglutinierende Sprache mit isolierenden Merkmalen. (Koutny 2009:127)

^(T) La aglutineco estas en la vortfarado praktike senescepta (kvankam ankoraŭ ne ĉiam plene utiligata). Sintaksaj rilatoj esprimiĝas per prepozicioj kaj pronomoj.

Resume oni povas diri: esperanto estas aglutina lingvo kun notindaj izolaj trajtoj.

Ŝia esprimo “noch nicht immer voll genutzt” indikas eblon de evoluo.

9.4.4. Jansen: ĉies lingvo – nenies lingvo

En sia artikolo (2010) Wim Jansen pritraktas la eŭropecon de esperanto kaj sisteme trairas la Universalan gramatikon de la Fundamento rilate al pluraj

kriterioj, inter ili la kvalitoj “eŭropa” kaj “ekstereŭropa”. Li komparas esperanton kun la kvin referenclingvoj de la Fundamento, do al la franca, angla, germana, rusa kaj pola, kaj notas kongruojn kaj malkongruojn.

Al du kvalitoj tute mankas kongruo: la “Morfologio” “(ĝeneralaj aspektoj de la morfologio, kiu ŝajnas esti unikajo, retrovebla nek en Eŭropo, nek ekster Eŭropo.)” kaj “Personmarkado en la verboj” “(kiu asertas, ke la Esperanta manko de personmarkado estas komuna nur ekster Eŭropo).” (Jansen 2010:282). Oni ja diras ke esperanto estas ĉies lingvo, sed ankaŭ nenies lingvo (kio ne estas la malo de ĉies lingvo). Wim finas: “[...] la ĉiesecon de Esperanto stampas ĝuste la nenieseco de ĝia morfologio, pli ol multaj rekoneblaĵoj.” (Jansen 2010:282).

9.4.5. Parkvall: mezuro de eŭropeco

Mikael Parkvall (2010) faris kvantan studon por mezuri kiom (se entute) esperanto estas eŭro-centra lingvo. Li uzis *World Atlas of Language Structure*, WALS, ‘Monda atlaso de lingvaj strukturoj’, kiu listigis 142 lingvaj trajtojn (nuntempe ofte pli), ĉiu kun du ĝis naŭ valoroj. WALS enhavas informojn pri 2500 lingvoj, sed ne ĉiuj el ili ricevas detalan pritrakton. El la 142 trajtoj, li uzis 137, kaj, ĉar esperanto ne aperas en WALS, li mem elektis la valorojn por esperanto. La dek lingvoj plej similaj al esperanto estas laŭorde la rusa, angla, franca, albana, pola, germana, moderna greka, latva, hispana kaj finna (Parkvall 2010:66). La simileco laŭdifine estas la frakcio de trajtoj kiuj samas en du komparataj lingvoj. Por la rusa la frakcio estas 69,9 % el 133 trajtoj (do 93 trajtoj); por la angla 67,2 % el 137 trajtoj (do 92 trajtoj); por la franca same 67,2 % sed el 134 trajtoj (do 90 trajtoj); k.t.p. ĝis la deka lingvo en la ordo, la finna kun 58,6 % el 133 trajtoj (do 78 trajtoj).

La jida ja estas grava fontolingvo por esperanto (vidu ekzemple miajn artikolojn 1992 kaj 2008), sed Parkvall ne mencias ĝin en sia artikolo. La kaŭzo sendube estas ke WALS listigas multegajn trajtojn de la rusa, angla, franca k.t.p., sed tre malmultajn de la jida. Estus interese havi komparon inter esperanto kaj la jida pri la samaj trajtoj kiuj estis studitaj en la komparo kun la germana — por tiu ĉi, la sesa en la ordo, la frakcio estas 64,6 % el 127 trajtoj (do 82 trajtoj).

Parkvall konkludas:

It is concluded that Esperanto is indeed somewhat European in character, but considerably less so than the European languages themselves. (Parkvall 2010:63)

^(T) Konklude esperanto estas efektive iom eŭropa en sia karaktero, sed konsiderinde malpli tia ol la eŭropaj lingvoj mem.

Li atentigas pri la influo de la parolantoj:

As the language is created by its speakers, a possible shift in speaker demographics could perhaps lead to a drift away from European-influenced norms. (Parkvall 2010:73)

^(T) Ĉar la lingvon kreas ties parolantoj, ebla movo en la konsisto de la parolantaro povus sekviĝi drivon for de eŭrope influitaj normoj.

9.4.6. Duc Goninaz: imito, sistemigo, plivastigo de regulaĵoj

Michel Duc Goninaz skribas pri la reguleco de esperanto:

La skemismo de E-o, ofte emfazata de la propagandistoj, signifas nur, ke por iuj vortserioj nia lingvo imitis, sistemigis kaj plivastigis regulaĵojn, ekzistantajn en iuj aliaj lingvoj. Tiu reguleco evidentiĝas per la vasta uzado de derivaĵoj kaj kunmetaĵoj. Ne necesas substreki krome la grandan avantaĝon de la senŝanĝeco de la morfemoj. Sed tio ne signifas, ke la kunmetitaj elementoj liveras la sencon de kunmetaĵo, kiu estas tre ofte arbitra kaj konvencia. (Duc Goninaz 2011:14–15)

9.4.7. Abundaj indikoj de pluralo kaj objekteco

Ni komparu la indikojn de pluralo kaj objekteco en kelkaj lingvoj, tradukinte la frazon *Mi renkontos miajn fidelajn amikojn*. Ĉi tie esperanto trifoje indikas ke temas pri pluralo kaj same trifoje indikas ke temas pri objekto. En la suba tabelo la kolono markita *P* donas la nombron de indikoj pri pluralo kaj tiu markita *O* la nombron de indikoj pri objekteco per aliaj rimedoj ol la vortordo.

<i>Lingvo</i>	<i>P</i>	<i>O</i>
Esperanto	3	3
Franca	3	0
Angla	1	0
Germana	3	0
Rusa	3	3
Pola	3	3
Jida	3	0
Sveda	3	0
Persa	1	1
Hungara	1	1*
Turka	1	1*
Korea	1	1
Vjetnama	1**	0
Ĉina	0	0
La reformprojekto de 1894	1	0
La reformprojekto de 1906-11-22	1	1
Ido	1	0

Notoj. * La hungara kaj turka esprimas la renkonton per nereкта objekto, analoga al *Mi renkontiĝos kun miaj fidelaj amikoj*.

** La vjetnama esprimas pluralon ne per finaĵo, sed per memstara vorto, aŭ per *những* ‘multaj’ aŭ per *mấy* ‘iuj, pluraj’.

El la menciitaj lingvoj nur la fleksiaj rusa kaj pola plene kongruas kun esperanto, indikante trifoje pluralon kaj same trifoje objektecon. La franca, germana, jida kaj sveda ne indikas objektecon, sed trifoje pluralon. La angla indikas pluralon nur unufoje. Aliaj lingvoj limigas la nombron de indikoj.

Klaras ke esperanto ĉi-rilate malsamas disde la aglutinaj lingvoj hungara, turka kaj korea, kaj same malsamas disde la izolaj lingvoj vjetnama kaj ĉina.

En la nerealigita reformprojekto de 1894 Zamenhof forigis indikojn pri objekteco kaj nur unufoje indikis pluralon; same faras la lingvo ido. En la reformprojekto de 1906-11-22, ankaŭ nerealigita, li indikis objektecon nur unufoje kaj pluralon unufoje. Interese estas ke la du nerealigitaj reformprojektoj de esperanto ĵus menciitaj, same kiel ido,¹⁶ proksimiĝas al la angla kaj al la aglutinaj kaj izolaj lingvoj. Sed esperanto restas kun siaj abundaj indikoj de gramatikaj rilatoj, kaj faras tion multe pli ol la tri menciitaj aziaj lingvoj.

9.4.8. Ĉu aglutina aŭ izola?

Dum la aglutina karaktero de esperanto estas por mi evidenta, mi opinias ke ne eblas meti ĝin inter la izolaj lingvoj. En sekcio 9.1 ni vidis la nuntempajn difinojn de la tri lingvotipoj, kaj klaras ke esperanto ne plenumas la difinojn de izola lingvo:

(1) Izola lingvo estas “Lingvo kies vortoj estas forme nevariaj, kun ĉiu vorto tipe konsistanta el unu sola morfemo” (Trask 1983). — Male, la vortoj de esperanto oftege konsistas el pluraj morfemoj.

(2) Izola lingvo estas “Tipo de lingvo en kiu la vortoj estas ne-fleksitaj, kaj sintaksaj rilatoj estas ĉefe montritaj per vortordo” (Crystal 1992:4:309). — Male, sintaksaj rilatoj en esperanto estas montritaj per la akuzativa finaĵo *n* kaj per prepozicioj, dum la vortordo signalas emfazon, ne sintaksan rilaton: *Mi donas al vi la libron; La libron mi donas al vi; Al vi mi donas la libron*.

Eble ni rajtas fini, kongrue kun la citaĵoj de Caraco en subsekcio 9.4.2, de Koutny en subsekcio 9.4.3 kaj Duc Goninaz en subsekcio 9.4.6, per la konstato ke esperanto estiĝis el pluraj fleksiaj lingvoj per sistemigo kaj plivastigo de ties regulaĵoj kaj per imitado de la neŝanĝeco de vortelementoj en la aglutinaj lingvoj, kvankam ni ne scias kiel okazis tiu imitado — se entute temas pri imitado. La nenieseco de Jansen, citita en subsekcio 9.4.4, restos kiel unusola klarigo.

¹⁶Otto Jespersen (1924:208, piednoto) skribas ke “inconsistently” ‘nekoherede’ la artikolo en esperanto estas nevaria, dum ido estas “strictly logical” ‘strikte logika’, menciante la ekzemplon *la bona amiki*, kie nek la artikolo nek la adjektivo portas indikilon de pluralo.

10. Genealogio kaj kopiado

10.1. Genealogiaj rilatoj inter lingvoj

Por ion diri pri nuntempaj opinioj pri tipologio ni notu tute unue ke Bernard Comrie volas limigi la rolon de la morfologio:

Our over-all conclusion is, thus, that morphological typology has a secure, but restricted, place in language typology, and it is to be hoped that general linguistics textbooks will not continue indefinitely to give the impression that this is the only, or most insightful, way of classifying languages typologically. (Comrie 1983:49, 1989:52)

^(T) Nia ĝenerala konkludo estas, do, ke morfologie bazita tipologio havas sekuran, sed limigitan, lokon en la tipologio de lingvoj, kaj espereble lernolibroj pri ĝenerala lingvistiko ne senfine daŭrigos transdoni la impreson ke tiu ĉi estas la sola, aŭ plej lumiga, vojo por tipologie klasi lingvojn.

Pri la klasado de lingvoj en la nuna tempo gravas la genealogia klasado; vidu ekzemple Ruhlen (1987). Alia artikolo de Ruhlen (2001) prezentas gravajn tezojn pri la rilatoj inter lingvoj kaj la luktojn kiuj okazis pri ili.

Kiuj do estus la genealogiaj (aŭ genetikaj) rilatoj de esperanto? Leksike ili estas al la hindeŭropaj lingvoj, ĉefe al la franca (*ĉemizo*, *ĉevalo*, *etapo*, *kaŝi*), al latino (*akvo*, *prujno*), al la klasika greka (*kaj*, *ek-*, *id-*, *zono*), al la jida aŭ germana (*fajli*, *hejmo*, *ŝajni*) kaj al la rusa (*nepre*); strukture la lingvo estas ligita al la jida kaj la rusa; vidu ekzemple Duc Goninaz (1974). Kion pri la aglutineco? Zamenhof ja ne uzis iun aglutinan lingvon kiel modelon: la aglutineco estas orfa; ĝi aperis tute sen gepatroj. Genealogia klasado rilate al aglutineco estus malfacila.

La genealogia aspekto signifas ke homoj kopias la kodon¹⁷ de antaŭaj generacioj: infanoj lernas de siaj gepatroj, sed ili ja ne kopias tute ekzakte. Post du generacioj la du variantoj restas interkompreneblaj; post kvindek aŭ cent ne plu. Pro tio lingvoj evoluas: el la latina estiĝis la itala, rumana, franca, hispana kaj portugala laŭ vojoj bone studitaj. Same pri vivaj estaĵoj: infano similas al siaj gepatroj, sed post du milionoj da generacioj la aspekto de plej multaj estaĵoj estas tute alia.

Charles Darwin asertis en *The Descent of Man* ‘La deveno de la homo’ ke estas forta simileco inter la evoluo de lingvoj kaj la evoluo de specioj de vivaj estaĵoj:

The formation of different languages and of different species, and the proofs that both have been developed through a gradual process, are curiously the same. (Darwin 1871:57)

^(T) La formiĝo de malsamaj lingvoj kaj de malsamaj specioj, kaj la pruvoj ke ambaŭ evoluis per laŭgrada procezo, estas, kurioze, samaj.

¹⁷Ĉi tie mi uzas la terminon *kodo* kiel hipernimon de *lingvo*, *varianto*, *dialekto* (spaca kaj socia) laŭ la enkonduko de Johanson (2005:3).

The survival or preservation of certain favoured words in the struggle for existence is natural selection. (Darwin 1871:58–59)

⟨^T⟩ La pluvivado aŭ konservado de certaj favoraj vortoj en la lukto por ekzistado estas natura selekto.

10.2. Kopiado

Sed spite al tiuj similaĵoj ekzistas grandaj diferencoj. La kopiado de lingvaĵo okazas ne nur inter gepatroj kaj infanoj, sed ankaŭ inter lingvoj en alispeca kontakto. Tiu fenomeno estas nun tre studata en lingvistiko.

Lars Johanson en (2008) establis ampleksan modelon por la studo de plej diversaj tipoj de kopiado. Kopiado povas esti aŭ ĉioma (plena) aŭ selekta, t.e. nur kelkaj ecoj estas kopiitaj, ekzemple materiaj, semantikaj, kombinaĵaj aŭ oftecaj ecoj. Estus interese enmeti esperanton en tiun modelon.

La libro de Csató k. a. (Red., 2005) enhavas multajn artikolojn pri la kontaktoj kaj la area difuzo inter iranaj, ŝemidaj kaj tjurkaj lingvoj. Similan enhavon havas la libro redaktita de Besters-Dilger k. a. (Red., 2014), kie i.a. Jouko Lindstedt (2014) studas la kontaktojn inter lingvoj parolataj en Balkanio. Jouko jam en (2000) kaj (2005) pritraktis la demandon; temas en la laste menciita studo pri la greka, albana, balkanslavaj lingvoj, balkanlatinidaj lingvoj kaj la romaa.

Lars Johanson (2014) pritraktas kod-kopiadon inter tjurkaj lingvoj.

Ne ĉiam estas klare ĉu simileco dependas de genealogia rilato aŭ kopiado inter ne proksime parencaj lingvoj en kontakto:

More generally, the problem of whether or not shared typological properties can be taken as evidence for a genetic relationship between languages remains controversial. (Svantesson 2005:365)

⟨^T⟩ Pli ĝenerale la problemo ĉu komunaj tipologiaj ecoj povas esti akceptitaj aŭ ne kiel atestoj por genetika rilato inter lingvoj daŭre restas debatebla.

10.3. Miksitaj lingvoj

Peter Auer difinas *mixed languages* ‘miksitaĵ lingvoj’ kiel lingvoj kun *split ancestry* ‘dividita antaŭularo’ (Auer 2014:294).

Ĝuste rilate al tiu demando estas klarige citi el la libro de Sarah Grey Thomason kaj Terrence Kaufman pri lingvokontaktoj kaj genetika lingvistiko:

Our major conclusions are these: there are indeed mixed languages, and they include pidgins and creoles but are not confined to them: **mixed languages do not fit within the genetic model and therefore cannot be classified genetically at all; but most languages are not mixed**, and the traditional family tree model of diversification and genetic relationship remains the main reference point of comparative-historical linguistics owing to the fact that it is usually possible (except in relatively rare borderline cases) to distinguish

mixed languages, whose origins are nongeneric, from languages whose development has followed the much more common genetic line. (Thomason & Kaufman 1988:3)

(^T) Nia ĉefaj konkludoj estas jenaj: vere ekzistas miksitaĵ lingvoj, kaj ili inkludas piĝinojn kaj kreolajn lingvojn sed ne estas limigitaj al tiuj ĉi: **miksitaĵ lingvoj** ne eniras la genetikan modelon kaj tial **tute ne povas esti genetike klasitaĵ; sed plej multaj lingvoj ne estas miksitaĵ**, kaj la tradicia familia arbomodelo de diversigo kaj genetika rilato estas la ĉefa referencpunkto de kompara-historia lingvistiko pro la fakto ke kutime eblas (escepte en relative maloftaj apudlimaj kazoj) distingi miksitaĵ lingvojn, kies originoj estas negeneologiaj, disde lingvoj kies evoluo sekvis la multe pli ofta genetika linio.

Esperanto havas dividitan antaŭularon kaj estas ekzemplo kie la kopiado inter lingvoj en kontakto estas la ĉefa kaŭzo de simileco.

Estas ankaŭ klarige legi sekcion 1.2 en la libro de Thomason & Kaufman (1988:9–12), kiu havas la rubrikon “What “genetic relationship” means” ‘La signifo de «genetika rilato»’.

11. Difinaj vortelementoj kaj observataj morfemoj

Ni emfazu ke la vortelementoj de la Fundamento kaj ties kombineblo estas difinaj, preskribaj: la prezento difinas la estiĝon de la vortoj.

Tute malsame estas pri la observoj kiujn oni povas fari en ekzistanta lingvo. Tiaj observoj estas normala labormetodo en la lingvoscienco: oni observas kaj analizas kiel funkcias la lingvo, tute sendepende de ties origino. Ekzemple, per observado de la konservitaj tekstoj en la malnovtamula oni facile konstatas ke la sufiksoj estas multe pli oftaj ol la prefiksoj (Bloch 1946:99; Steever 2008:54). Same oni povas analizi nun parolatan lingvon. Oni tiel malkovras la morfemojn de la lingvo. La analizo de esperanto kaj ties eblaj konkludoj do estas io tute alia ol la preskribita kombineblo en la Fundamento, sed tamen estas gravaj por la kompreno de la mekanismoj de la lingvo. Klarigan komparon inter la sufiksoj en kelkaj etnolingvoj kaj en esperanto faris Otto Prytz (2010). Li i.a. prilumas la kontraston inter leksikeciĝo de derivitaj vortoj kaj la produktivo de la deriviloj, kiuj kontraŭstaras unu al la alia. La unua fenomeno limigas aŭ eĉ malhelpas la duan.

Eble estas plej facile konsideri ekzemplojn el la scienca kaj teknika vortprovizo, ĉar ili estas similaj en multaj lingvoj. La vortoj *mikrofono*, *mikrokoko*, *mikrolito*, *mikrometro*, *mikroskopo*, *mikrosporo*, *mikrotomo* sendube montras ke ekzistas signifohava vortoparto *mikro*.

Same la vortoj *mikroskopo*, *stetoskopo*, *teleskopo* montras ke ekzistas signifohava elemento *skop*.

Ni ankaŭ havas *litografi*, *litologio*, *litosfero*, *litoskopo*, *litotomio*, *litotricio*, kiuj montras la ekziston de morfemo *lito* ‘ŝton’.

La konkludoj ne dependas de eventuala rekono de prefikso *mikro*/ aŭ *lito*/ aŭ sufikso *-skop*/ en PIV 2005 aŭ iu alia vortaro. Temas simple pri observo de la ekzistanta lingvo.

Ne estas probleme rekoni morfemojn en ekzemple

- *litosfero*, analizebla kiel *lito·sfer·o* kun origino en la grekaj λίθος ‘ŝtono’ kaj σφαῖρα ‘sfero, globo’ (la responda vorto en la angla, *lithosphere*, estas atestita ekde 1887, en la sveda, *litosfär*, ekde 1911);
- *litotricio*, analizebla kiel *lito·trici·o* ‘ŝtonfrakasado’ kun origino en λίθος ‘ŝtono’ kaj τριψίς ‘frotado, trivado’;
- *mikrolito*, analizebla kiel *mikro·lit·o* kun origino en μικρός ‘malgranda’ kaj λίθος ‘ŝtono’ (*microlith* estas atestita en la angla ekde 1908).

Multaj tiaj kombinaĵoj aperis pli frue ol esperanto. Ni rigardu ekzemple kiam aperis kelkaj vortoj kunmetitaj kun *mikro* kaj *skop*. Mi donas la jaron de unua atesto de responda vorto en la angla (**en**), la rusa (**ru**) kaj la sveda (**sv**).

Vortoj kun komenco <i>mikro</i> , kies origino estas la greka μικρός ‘malgranda’.				
Vorto	Origino de la dua parto	en ^a	ru	sv ^d
mikrokosmo	κόσμος ‘ordo’; ‘ornamo’; ‘universo’	13-a jarc.	1713 ^b	1648
mikroskopo	σκοπός ‘observisto’, ‘gvatisto’; σκοπεῖν ‘gvati’	1656	1739 ^{b, c}	1682
mikrometro (mezurilo)	μέτρον ‘mezuro’	1711	1717 ^c	1670
mikrotomo	τόμος ‘fortranĉita peco’; τέμνειν ‘tranĉi’	1856	1938 ^e	1867
mikrofono	φωνή ‘sono, voĉo’	proks. 1875	1804 ^c	1828

Vortoj kun fino <i>skopo</i> , kies origino estas la greka σκοπός ‘observisto’, ‘gvatisto’ aŭ σκοπεῖν ‘gvati’.				
Vorto	Origino de la unua parto	en ^a	ru	sv ^d
teleskopo	τῆλε ‘fore’	1648	1794 ^c	1711
mikroskopo	μικρός ‘malgranda’	1656	1739 ^b	1682
kalejdoskopio	καλός ‘bela’, εἶδος ‘formo’	1817	1845 ^c	1818
stetoskopo	στήθος ‘brusto’	1820	1847 ^c	1832

Fontoj:

^a Webster (1983).

^b *Словарь русского языка XVIII века*, volumo 12 (2001).

^c *Словарь современного русского литературного языка* (1948–1965).

^e Ушаков (1938).

^d Svensk ordbok (2009).

Ni konkludu ke tiuj kombinitaj vortoj estis konataj en pluraj fleksiaj lingvoj jam multe pli frue ol 1878 kaj 1887.

12. La tabelvortoj

La tabelvortoj, la juvelo de esperanto, konsistas el $5 \times 9 = 45$ vortoj, kiuj estas kombinaĵoj de $5 + 9 = 14$ elementoj. Jam en Lingvo universala de 1881 Zamenhof enkondukis similaĵajn kombinaĵojn (vidu Waringhien 1989:24–35 kaj la tabelon sur paĝo 42 kun 21 atestitaj formoj; Kiselman 2011, tabelon 17).

<i>ia</i>	<i>ial</i>	<i>iam</i>	<i>ie</i>	<i>iel</i>	<i>ies</i>	<i>io</i>	<i>iom</i>	<i>iu</i>
<i>kia</i>	<i>kial</i>	<i>kiam</i>	<i>kie</i>	<i>kiel</i>	<i>kies</i>	<i>kio</i>	<i>kio</i>	<i>kiu</i>
<i>tia</i>	<i>tial</i>	<i>tiam</i>	<i>tie</i>	<i>tiel</i>	<i>ties</i>	<i>tio</i>	<i>tiom</i>	<i>tiu</i>
<i>ĉia</i>	<i>ĉial</i>	<i>ĉiam</i>	<i>ĉie</i>	<i>ĉiel</i>	<i>ĉies</i>	<i>ĉio</i>	<i>ĉiom</i>	<i>ĉiu</i>
<i>nenia</i>	<i>nenial</i>	<i>neniam</i>	<i>nenie</i>	<i>neniel</i>	<i>nenies</i>	<i>nenio</i>	<i>neniom</i>	<i>neniu</i>
<i>alia</i>	<i>alial</i>	<i>aliam</i>	<i>alie</i>	<i>aliel</i>	<i>alies</i>	<i>alio</i>	<i>aliom</i>	<i>aliu</i>

Laŭ Naokazu Kawasaki (1902–1991) mankas en la Unua libro la sep vortoj *ĉial*, *nenial*, *ĉiel*, *ĉiom*, *neniom*, *ties*, *ĉies* (1975:119–120) — sed estis kompreneble facile konstrui ilin dismetante la aliajn 38 kaj rekombinante la pecojn.

La etimologion de la vortoj pritraktas Vilborg (2001:142–148). Vidu ankaŭ Mattos (1987:55–63) por Lingvo internacia kaj (1987:32–35) por Lingvo universala.

La tabelvortoj havas, kiel montras Barandovská-Frank (2009), apogon en pluraj hindeŭropaj lingvoj kaj do ne estas tiel artefaritaj kiel iuj evidente opiniis.

12.1. La tabelvortoj en la Fundamento

En la artikolo 30 de la Ekzercaro Zamenhof sisteme prezentas la tabelvortojn, komencante per la naŭ *ia*, *ial*, *iam*, *ie*, *iel*, *ies*, *io*, *iom*, *iu* kaj daŭrigante ke “el ili ĉiu povas jam fari al si grandan serion da aliaj pronomoj kaj adverboj.” Li aldonas al tiuj naŭ laŭvice “la literon „k””, “la literon „t””, “la literon „ĉ”” kaj “la prefikson „nen””. Tiel ĉiuj 45 aperas. Tamen, nur la naŭ unuaj, de *ia* ĝis *iu*, estas listigitaj en la Ekzercaro kun tradukoj. La artikolo fine mencias la derivitajn vortojn *tiama*, *ĉiama*, *kioma*, *tiea*, *ĉi-tiea*, *tieulo*, *tiamulo*.

En la Universala vortaro tridek naŭ tabelvortoj estas menciitaj kaj havas tradukojn en la kvin lingvojn, sed ne la ses *ties*, *ĉial*, *ĉies*, *ĉiom*, *nenial*, *neniom*. Ĉar mankas tradukoj ankaŭ en la Ekzercaro, ili ne havas tradukojn aŭ difinojn en la Fundamento.

Kawasaki mencias ke Leopold Einstein (1834–1890) kiel la unua enordigis tiujn vortojn en rektangulan tabelon (1888:10), kiu tamen ne enhavas la vortojn finiĝantajn per *es*. Krome Einstein metis strekojn por la vortoj mankantaj en la Unua libro kiuj ne finiĝas per *es*.

Kvankam oni povas klare vidi la tabelvortojn kiel kombinaĵojn, ili ne eniras, kaj ne povus eniri, kiel parto de la ĝenerala kombinata sistemo de la lingvo, ekzemple pro tio ke la tabela vortfino *e* indikas lokon, ekzemple en *ie* ‘en iu loko’, dum en la ĝenerala sistemo ĝi estas la adverba finaĵo. Ankaŭ la aliaj komponantoj ne estas libere kombineblaj: temas pri fermita sistemo. Dum la evoluo de la lingvo oni tamen komencis uzi vortojn kiajn *alies* ‘posedata de alia persono’ kaj *mies* ‘mia, posedata de mi’, formitaj per la tabelvorta vortfino *es*: “Kies libro estas?” — “Mies!”.¹⁸ Tio do estas ekster la origina tabelo de 5 oble 9 vortoj. Inter ili *alie*, *aliel* ne funkcias, ĉar kiel novaj tabelvortoj *alie* kaj *aliel* signifus ‘en alia loko’ respektive ‘en alia maniero’, dum la jama signifo de *alie* estas ‘en alia maniero’. Ni povas diri ke estus bele se Zamenhof estus doninta al la vortfino *el* la signifon de loko kaj konservi por *e* la kutiman adverbajn signifon.¹⁹

12.2. La interrilata tabelo en *Lingvaj respondoj*

En respondo 105 en *Lingvaj respondoj*, publikigita en 1907, Zamenhof analizas la tabelvortojn, ekzemple *ki-al*, *ki-o*, *neni-u*, *neni-a*, kaj nomas la unuan parton “radiko”, la duan “karakteriza finiĝo” (Zamenhof 1962:88). Sed li aldonas ke tiu analizo ne povas doni finiĝojn sendependajn kaj ĝeneralajn: “(ekzemple mi estis devigita preni la finiĝojn « e » kaj « u », kiuj kiel sendependaj finiĝoj havis jam alian sencon), tial mi devis alkroĉi ilin *nedisigeble* al la radiko”. Escepto estas la vortoj finiĝantaj per *a* kaj *o*, ĉar tie la finaĵoj *a* kaj *o* havas siajn kutimajn rolojn adjektivan respektive substantivan. La analizo *ki-a*, *ki-o* do validas ĝenerale, kaj oni povas formi la verbojn *neni-igi* kaj *neni-iĝi* el *neni-o* kaj *igi* respektive *iĝi*. Male, la formoj *ali-u*, *ali-es*, *kelk-om* estas kontraŭregulaj.

¹⁸Wim Jansen rimarkigas (persona mesaĝo 2014-01-08) ke *es* havas alian funkcion ol la aliaj vortfinoj, ĉar ĝi estas la sola kiu difinas semantikan funkcion inter du argumentoj.

¹⁹La tabelvortoj por maniero, kiuj nun finiĝas per *-el*, en Lingvo universala de 1881 finiĝis per *-e*, do kiel la normalaj adverboj: *kve* ‘kiel’, *fe* ‘tiel’. La tri vortoj respondaj al *iel*, *ĉiel*, *neniel* ne estas atestitaj.

12.3. Detruo de la juvelo

En sia reformprojekto de 1894 Zamenhof komplete detruis sian juvelon, anstataŭigante ĉiun unuopan tabelvorton per ellatine devenantaj esprimoj, ekzemple *ĉiam* per *semper*, *neniam* per *nunkvam*,²⁰ *ĉiel* per *omnemaniere* k.t.p. El la 45 formoj mankas 6. Vidu la 39 konatajn formojn en (Kiselman 2011:141). La reformprojekto ne estis realigita: voĉdonado en la Ligo Esperantista montris ke plimulto kontraŭas ĉiujn reformojn (Zamenhof 1983:198).

Otto Back skribas ke sen tiu ĉi latinigo tute alia reformpaŝo estus ebla en 1894, nome la tabelon aliformigi (kaj vastigi!), tiel ke ĝi estus pli bone integrita en la ĝeneralajn kampojn de adjektivoj, pronomoj kaj adverboj ol bedaŭrinde estas la okazo en 1887 kaj hodiaŭ (Back 2011:268). Eble la ekstertabelajn vortojn *aliel*, *alie* li celas.

13. La morfemo *i*

La morfemo *i* en esperanto, aŭ, se vi preferas, pluraj morfemoj *i*, havas longan historion, parte ligitan al tiu de *uj*. Ĝi bone ilustras la problemojn de kombiniĝo.

Jam en Lingvo universala de 1881 Zamenhof uzis *verbio* por ‘vortaro’ aŭ eble ‘vortujo’ (Waringhien 1989:23, 447) kaj *rudzio* por ‘rozujo’ (Waringhien 1989:33). Aliloke li skribis *verbozo* por ‘vortaro’ (Waringhien 1989:27).

En la Lingvo internacia de 1887 aperis la sufikso *uj*, kun tri signifoj, donitaj per la ekzemploj *cigarujo*, *pomujo* kaj *Turkujo*. En la Fundamento 1905 la sufikso *uj* aperas kun la ekzemploj *pomujo*, *cigarujo*, *inkujo*, *Turkujo* kun iom da varioj inter la kvin lingvoj. La finaĵo por verboj en infinitivo estis *i*. Ŝajnas ke tiu fakto malhelpis la uzon de *i* kiel sufikso.

Vilborg (2001:163–164) nomas *-uj/* “sufikso” kun tri signifoj kaj prezentas detalan historion pri ĝi. Male, li listigas *-i/* kiel kvar malsamajn “pseŭdo-sufiksojn” (2001:174–175). La vortaroj PIV (1977), NPIV (2002) kaj PIV 2005 (2005) ĉiuj listigas *-i/* kiel unu sufikson kun pluraj signifoj.

Mi citas la prezenton fare de Vilborg de la kvar pseŭdosufiksoj kune kun kelkaj aldonoj kaj notoj de mi:

1. Grekdevena sufikso. Elstaras jenaj kategorioj:

- 1a. Nomoj de sciencaj disciplinoj kaj artoj formitaj el la nomo de la koncerna fakulo: *anatomio*, *arkeologio*, *astronomio*, *biologio*, *ekonomio*, *filologio*, *geografio*, *kartografio*, *kirurgio*, *ortopedio*, *strategio*, *topologio*. **Noto:** Ĉar en ĉiuj okazoj ekzistas responda nomo de fakulo, *anatomo*, *astronomo*, ..., *topologo*, *i* ĉi tie funkcias kiel sufikso. La derivado estas *astronomo* $\mapsto$ *astronom* $\mapsto$ *astronomi* $\mapsto$ *astronomio*, aŭ, se vi preferas, pli rekte *astronomo* $\mapsto$ *astronomio*, do kun *i* kiel infikso.

²⁰Ne **malsemper*. Ja **malĉiam* ne estas uzata por *neniam*.

- 1b.** Nomoj de statoj, ofte medicinaj terminoj: *disenterio*, *empirio*, *hidrofobio*; *anomalio*, *harmonio*, *simetrio*. **Noto:** Ĉi tie temas ĝenerale pri sufikso nur en la senco de la malantaŭa etimologio, ĉar ne ekzistas radikoj **disenter*, **empir*, **anomal*, **simetr*. Tamen kaj *hidrofoba* kaj *hidrofobio* aperas en PIV 2005.
- 1c.** Nomoj de regadsistemoj aŭ sociaj sistemoj, ekzemple *aristokratio* (ἀριστοκρατία), *aŭtonomio*, *burokratio*, *demokratio* (δημοκρατία), *diplomatio*, *direktorio*, *monarkio* (μοναρχία), *monogamio* (μονογαμία), *oligarĥio*, *teokratio*. **Noto:** Ĉi tie *i* ĝenerale funkcias sufikse: ni ja havas vortojn *aristokrato*, *aŭtonoma*, *burokrato*, *demokrato*, *diplomato*, *direktoro*, *monarko*, *oligarko*, *teokrato*.
- 1ĉ.** “Agonomoj” de grekaj verboj: *alegorio* (ἀλληγορία), *antologio*, *fantazio*, *krestomatia*, *manio*, *simfonio*.
En kelkaj okazoj la greka sufikso estas -eia aŭ -eía, sed la diferenco ne estas rimarkebla en la modernaj formoj: *antipatio* (ἀντιπάθεια), *enciklopedio* (ἐν κύκλῳ παιδεία), *energio* (ἐνέργεια), *epifanio* (ἐπιφάνεια), *farmacio* (φαρμακεία), *ironio* (εἰρωνεία), *litano* (λιτανεία), *magio* (μαγεία), *simpatio* (συμπάθεια), *terapi* (θεραπεία). Kelkaj radikoj kun tiu ĉi abstrakta sufikso estas de negreka origino: *garantio*, *kolonio*, *kompanio*. **Noto:** Ĉi tie temas ĝenerale pri sufikso nur en etimologia senco.
- 1d.** Strukturo aŭ sistemo laŭ la nomo de karakteriza eco aŭ procezo: *analogio*, *difeomorfio*, *harmonio*,²¹ *holomorfio*, *homeomorfio*, *homologio*, *homomorfio*, *homotetio*, *homotopio*, *izometrio*, *izomorfio*, *meromorfio*, *progresio*, *topologio*,²² *toponimio*. **Noto:** Ĉi tie temas pri sufikso, ofte aplikata al adjektivo: ni ja havas *analog*a, *difeomorfa*, *holomorfa*, *homeomorfa*, *homolog*a, *homomorfa*, *homotet*a, *homotop*a, *izomet*a, *izomorfa*, *meromorfa* kaj, en aliaj vortoklasoj, *harmono*, *progresi*, *topologo*, *toponimo*.
- 2.** Sufikso kun origino en la latina sufikso -ium, signifanta kemiajn elementojn aŭ kombinaĵojn: *aluminio*, *kalio*, *kolodio*, *natrio*, *opio*. **Noto:** Ekzistas vortoj *alumino* kaj *natro*; por la aliaj temas pri sufikso nur en etimologia senco.
- 3.** Sufikso por landnomoj. La nomoj povas esti formitaj
- 3a.** laŭ la nomo de la ĉefurbo: *Alĝeri*^{OA8}*o* (Zamenhof 1962:15, n-ro 18 B), *Kebekio*, *Meksikio* (Zamenhof 1962:15, n-ro 18 B), *Tunizio* (Zamenhof 1962:15, n-ro 18 B), *Tunizi*^{OA8}*o*;
- 3b.** laŭ la nomo de rivero: *Senegalio*.
- 3c.** laŭ la nomo de popolano: *Baŝkirio*, *Ĉuvaŝio*, *Japanio*, *Koreio*, *Rusio*, *Vjetnamio*.
- 3ĉ.** laŭ aliaj cirkonstancoj: *Balkanio*, *Baltio*, *Kaukazio*, *Nordio*, *Vaŝingtonio*.
Noto: En 3a, 3b, 3c, 3ĉ temas pri derivaĵo el nomo de urbo, rivero, popolano, montaro, maro aŭ io alia. En 3c *i* estas sinonimo de *uj*, sed ne en 3a, 3b aŭ 3ĉ. La sufikso en tiu ĉi funkcio aperis en la propono de Zamenhof de 1894 (Zamenhof 1989:644)²³ kaj denove en la propono de li de 1906-11-22: *Anglio* estu uzebla

²¹Harmonio estas kaj stato de la animo (1b) kaj eco de matematikaj funkcioj (1d).

²²Topologio estas kaj branĉo de scienco (1a) kaj matematika strukturo (1d).

²³Priskribo de lia propono de 1894 troveblas en mia studo (2011:109-122). Inter la ŝanĝoj menciindas ke *i* estu finaĵo por pluralo (*domoj* fariĝu *domi*) kaj samtempe sufikso por landnomoj; ke la adjektiva finaĵo estu *e* (la sama kiel la adverba, kiu restu *e*); kaj ke

paralele kun *Anglujo* (Zamenhof 1948a:314, 316). Ĝi ne estas menciita en la Fundamento (krom kiel markilo por la infinitivo), sed poste revenis plurajn fojojn, inter alie pro la prefero de Lanti (Eugène Adam, 1879–1947) kaj la sennaciistoj.

4. Latina adjektivsufikso, substantivigite formanta nomojn de plantgenroj derivitaj de personaj nomoj: *dalio*, *gardenio*, *hortensio*, *kamelio*. **Noto:** Ĉi tie temas pri etimologia rilato.

PIV (1977) nomas *-i/* “internacia sufikso” kaj akceptas plej multajn el 1a, 1c, 1d kaj 3 ĉi-supre. NPIV kaj PIV 2005 akceptas en la artikolo *-i/* plejparte la menciitajn ekzemplojn, kvankam grupigitaj iom malsame kaj menciita sub unu “sufikso”.

En la Unua Oficiala Aldono al la Universala vortaro de 1909 *astronom* kaj *astronomi* estas du malsamaj radikoj; male, en PIV (1977) kaj ĝiaj posteuloj, *astronom/i/o* estas derivaĵo de *astronom/o*. Sed ĉe PIV (1977), NPIV (2002) kaj PIV 2005 (2005) *harmon* kaj *harmon*i estas du malsamaj radikoj: *harmonio* tie ne estas derivaĵo de *harmono*, kvankam estus nature fari tiel, kiel ĉe *anatomo* kaj *anatomio*.

Mi ne mencias ĉi tie la multajn cerbumaĵojn de Akademio de Esperanto: ŝajnas ke ili ne forte influis la lingvouzon, speciale ne kiam temas pri la elekto inter *Anglujo* kaj *Anglio*.

14. Evolukapablo de lingvoj

14.1. Transiro de projekto al vivanta lingvo

Kiam lingvoprojekto estas akceptita de multaj parolantoj, ĝi estas submetita al tute malsamaj kondiĉoj:

Celui qui en crée une la tient en main tant qu'elle n'est pas en circulation; mais dès l'instant qu'elle remplit sa mission et devient la chose de tout le monde, le contrôle échappe. L'esperanto²⁴ est un essai de ce genre; s'il réussit, échappera-t-il à la loi fatale? (de Saussure 1916:113)

^(T) Tiu kiu kreas [lingvon artefaritan] tenas ĝin en la mano dum ĝi ne estas cirkulanta; sed ekde la momento kiam ĝi plenumas sian mision, la eblo je stirado malaperas. Esperanto estas provo de tiu speco; se ĝi sukcesas, ĉu ĝi eskapos el la fatala leĝo?

Iel paradokse, sed nur ŝajne paradokse, la problemo de la normo ne ekzistus, se Esperanto estus fiksita, senŝanĝa kodo. (Duc Goninaz 1985:57)

Sed, ĉar esperanto estas vivanta, parola lingvo, la problemo de normo daŭre aperadas.

la infinitiva finaĵo estu *a* (*havi*, *danci* fariĝu *hava*, *danza*).

²⁴En posta eldono, (1989:111), la nomo estas skribita *espéranto*.

14.2. Libero – stirado

La Fundamento ne estas kompleta, finkonstruita domo, sed la bazo sur kiu la lingvo konstruiĝas kaj sur kiu la parolantoj de esperanto evoluigas ĝin:

[...] la lingvo ricevas la eblon disvolviĝadi eterne ĉiam pli kaj pli, sen ia dependo de la aŭtoro aŭ de ia Akademio. (“Esenco kaj estonteco de la ideo de lingvo internacia” legita de L. de Beaufront en Parizo 1900; Zamenhof 1939:304, 1992:285)

André Albault skribis:

[...] li ja sentis, ke ne utilis plene elfari projekton, sed ke multe pli gravas krei el ĝi plene vivantan lingvon, kaj tion atingi ebligis nur per kolektiva laborado de multaj disĉiploj, kiuj sentas — ĝuste pro la propra laboro —, ke la rezulto estas ankaŭ ilia! (Albault 1963:20)

François Lo Jacomo pritraktas en sia disertaĵo (1981), kun multaj ekzemploj, la streĉitecon inter libero kaj stirado. Eble mi povas plej koncize resumi lian sintenon per:

L’espéranto, c’est ce qu’on en fait.” (Lo Jacomo 1981:361)

^(T) Esperanto estas tio kion oni faras de ĝi.

14.3. Esperanto kaj volapuko

Zamenhof skribis 1888 en la Aldono al la *Dua Libro de l’ lingvo Internacia*:

Sed mi ne havis la intencon eldoni aŭtore plenam vortaron kaj krei laŭ mia persona plaĉo la tutan lingvon de l’ kapo ĝis la piedoj. Ĉar unue — la kreado de tute plena vortaro estas laboro ne ebla por unu homo, ĉar la nombro de l’ vortoj en lingvo de l’ homoj estas senfina, kaj se kun ĉiu vorto oni devus atendi, ĝis mi ĝin kreos, tiam la lingvo neniam estus finita kaj ĉiam estus en dependo de mia persono; due — en tia grava afero, kiel lingvo tutmonda, la persona juĝo kaj decidoj de unu homo devas havi rolon eble plej malgrandan, ĉar unu homo sur ĉiu paŝo eraras. (Zamenhof 1983:32–33)

Willem Manders (1910–1998) skribis, komparante esperanton kun volapuko:

Schleyer estis analizema, akurata, detala; li pensis pri ĉiaj eventualoj kaj lasis nenion al la hazardo. [...] Kontraŭe Zamenhof prezentis al la mondo ne kompletan lingvon, sed nur nudan framon kun apartenaĵoj, invitante la estimatan publikon en komuna laboro munti el tiuj apartaj eroj lingvon vivantan. (Manders 1950:14)

Ĉu oni rajtas konkludi ke la principo de senŝanĝaj vortelementoj taŭgaj je kombinado validas ne nur por la konstruelementoj en la Unua libro kaj la Fundamento, sed ankaŭ por poste enkondukotaj vortelementoj? En tiu ĉi kunteksto estas grave memori pri averto kiun Zamenhof esprimis:

Volapük pereis ĉefe pro *unu* grava eraro, kiun ĝi bedaŭrinde enhavis: *absoluta manko de natura evoluipovo*; kun ĉiu nova vorto aŭ formo la lingvo devis konstante dependi de la decidoj de unu persono aŭ de facile inter si malpaconta

personaro. Kiel sur bastono plantita en teron, novaj branĉoj kaj folioj ne povis nature kreski sur ĝi, sed devis esti konstante skulptataj kaj algluataj. (Zamenhof en sia parolado en la sepa kongreso en Antverpeno 1911-08-21; citita laŭ Zamenhof 1991b:2488)

Se oni sukcesos haltigi esperanton ĉe ĝia stato en la jaro 1905, ĝi estos en situacio simila al tiu de volapuko — spite al la tre malsamaj sintenoj de Zamenhof kaj Schleyer kiel gvidantoj.

15. Vortelementoj en scienco kaj tekniko

La observita kombineblo estas ne nur teoria studo de iu lingva fenomeno, sed povas servi al la normigo en la terminologio, precipe de la scienca kaj teknika vortprovizo. NPIV kaj PIV 2005 faras ĝuste tion.

Tiuj du vortaroj listigas ekzemple jenajn afiksojn. Ĉiuj tiuj afiksoj kaj multaj aliaj estas markitaj per vinjetoj, kiuj estas grafikaj simboloj, ĉi tie redonitaj per la klarigoj listigitaj en NPIV (2002:36–37) kaj PIV 2005 (2005:36–37).

bio/ [sciencoj] Pref.

eko/ [ekologio kaj ekologiismo] Pref.

ekto/ [sciencoj] Pref.

(2) **-gen**/ **1** [sciencoj] Suf. [...] **2** [biologio kaj fiziologio (inkl. genetikon, ĉelbiologion, embriologion)] [kemio kaj biokemio] Suf.

homo/ [kemio kaj biokemio] Pref.

infra/ [sciencoj] Pref.

(2) **-it**/ [medicino kaj kirurgio] Suf.

(3) **-it**/ [kemio kaj biokemio] Suf.

-iz/ [teknikoj] Suf.

mikro/ [sciencoj] Pref.

mono/ **1** [kemio kaj biokemio] Pref. **2** = unu/

(2) **-oz**/ [kemio kaj biokemio] Suf. (ekzemplo: *feroza sulfato*)

-skop/ [sciencoj] Suf.

tele/ [teknikoj] Pref.

ultra/ [sciencoj] Pref.

Ni komparu ilin kun kelkaj afiksoj listigitaj sen vinjeto:

★ **-ej**/ **I** - Suf.

★ **ek**/ **I** - Pref.

★ **-id**/ **I** - Suf. [...] **A** [...] **B** [...] **C** [...] **Ĉ**

★ **-ig**/ Suf.

(1) ★ **-it**/ **1** Suf. (En NPIV kun la cifero **1**, ne sekvata de iu **2**.)²⁵

(1) ★ **-it**/ Suf. (En PIV 2005 sen la cifero **1**.)

²⁵Jen la ununura diferenco inter NPIV (2002) kaj PIV 2005 (2005).

(1) **-oz/**. Suf. (ekzemple *tuberkulozo*).

(3) **-oz/**. Suf. (ekzemple *ŝtonoza*).

Evidente vinjeto indikas apartenon al speciala lingvaĵo. Sed ne nur. Ĝi ankaŭ signalas, laŭ mia opinio (kvankam NPIV aŭ PIV 2005 mem ne skribas pri tio), limigon en la kombineblo de la elementoj.

La duoblaj signifoj ĉe la elementoj *fil*, *lit*, *log* kaj aliaj permesas multajn ŝercojn. Gaston Waringhien (1987:35) montras tion, parolante pri profesoro pri lingvoj, do filologo, kies filon logas knabino — ankaŭ ŝi sekve estas filologo. Kaj monolito ne estas lito el mono, sed ŝtono en unu peco. Inter alie pro tio estas bone eviti kunmetadon de sciencaj vortelementoj (*tele*, *mikro*, *logo* k.t.p.) kun elementoj el la ĉiutaga lingvaĵo. Tiaj miksaĵoj pliigus ne nur la nombron de ŝercoj sed ankaŭ la nombron de miskomprenoj — por ne paroli pri bona stilo.

Ni povas observi ke la uzo de konstruelementoj estas iom varia. En PIV 2005 aperas, kun elmonro de la limoj inter la konstruelementoj, la vortoj *mikrofon*^{OA2}*o*, *mikrokok*/*o*, *mikrolit*/*o*, *mikrometr*^{OA2}*o*, *mikro/skop*^{OA2}*o*, *mikrospor*/*o*, *mikrotom*/*o*. En la vortoj *mikro/skop*^{OA2}*o* kaj *tele/skop*^{OA2}*o* la morfemo *skop* estas montrita kiel konstruelemento, dum en *stetoskop*/*o* ne. Klarigo estas ke, se oni forprenas la morfemojn *skop*/*o*, restas *tele* respektive *mikro*, kiuj jam havas sencojn kaj estas uzataj prefiksoj, dum la morfemo *steto* ‘brusto’, ne estas uzata. Kaj jen ni renkontas oftan problemon: en kombinaĵo de du morfemoj, unu povas esti uzata en aliaj vortoj, kaj alia ne. Kion do fari? La problemo estas mallonge traktata de D. J. Allerton (1990:76), kiu nomas ilin ‘*unique morphemes*’ ‘unikaj morfemoj’ aŭ ‘*single context*’ *morphemes* ‘morfemoj de unusola kunteksto’.

15.1. Nomoj de mezurunuoj en la Fundamento

15.1.1. Longo

En la Universala vortaro, kiu estas parto de la Fundamento, aperas jenaj radikoj por unuoj de longo: *col*^{UV}*o*, *fut*^{UV}*o*, *uln*^{UV}*o*, *klaft*^{UV}*o*, *verst*^{UV}*o*, *mejl*^{UV}*o*. Al ili aldoniĝas *lineo*, neoficiala, kaj *arŝino*^Z.

En la Universala vortaro mankas *metro* kaj *kilo*/, same kiel *kilometro*. Sed *metro* kaj *kilometro* estas tamen Fundamentaj vortoj, ĉar ili aperas en la Ekzercaro, kiu ankaŭ estas parto de la Fundamento: “Alportu al mi metron da nigra drapo”; “Tiu ĉi rivero havas ducent kilometrojn da longo.” (§ 32). Sed la prefikso **kilo*/ mankas: la Fundamento ne rekonas la kombineblojn en la metra sistemo.

La unuoj por longoj en la metra sistemo do tute ne estas menciitaj en la Universala vortaro, kaj ili estas nur malbone reprezentitaj en la Ekzercaro. Tio estas rimarkinda fakto, ĉar la Fundamento estis akceptita per la *Deklara-*

cio pri la esenco de la Esperantismo fare de la Bulonja kongreso 1905-08-09, cent dek jarojn post la apero de la metra sistemo en la sama lando (vidu sekcion 15.2). Ni konkludu ke rilate al la unuoj de longo la Fundamento postrestas je cent dek jaroj.²⁶

15.1.2. Areo

Mi ne trovis iun areounuon en la Universala vortaro. On ne povas formi unuon kian *kvadrata mejlo*, ĉar *kvadrato* ne estas Fundamenta vorto (ĝi oficialiĝis per OA1 en 1909).

Notindas la unuonomoj *aro*^z (= 100 m²), *arpeno* (neoficiala), *akreo* (neoficiala), *hektar*^{OA1}o (= *hektoaro* = 10 000 m²) kaj *hubo*^z.

15.1.3. Volumeno

En la Fundamento aperas la radikoj *kvar*t' kaj *stof*' kun la tradukoj

quarte | quart | Quart | кварта | kwarta;

stofe (measure) | stofe (measure) | Stof (Hohlmass) | штофъ | sztof (miara).

Temas pri unuoj por volumeno, ĉi-okaze precipe por likvoj. Oni povas formi aliajn unuojn el la unuoj de longo, ekzemple *kuba futo*.

La radiko *barel*' havas la tradukojn

tonneau | keg, barrel | Fass, Tonne | бочка | beczka,

el kiuj almenaŭ barrel, Faß, Tonne, бочка kaj beczka estas samtempe nomoj de volumenunuoj, sed tiu signifo ne estas menciita en la Fundamento.

En la Fundamento mankas *litro*, oficialigita en 1919 per OA2.

15.1.4. Tempo

En la Universala vortaro aperas radikoj por tempounuoj: *sekund*' , *minut*' , *hor*' , *tag*' , *semajn*' , *monat*' , *jar*' .

15.1.5. Maso

La Universala vortaro listigas *lod*' , *unc*' kaj *funt*' , kaj mencias la lastan en la Ekzercaro (§ 31). Ĝi ankaŭ aperas, kune kun *kilogram*'o, sub la vorto *da*: “funt'o da viand'o”; “kilogram'o da viand'o”. Notu ke estas *kilogram*'o, ne

²⁶ Ĉi tie akriĝas la diferenco inter du malsamaj rigardoj al la Fundamento. Se oni rigardas ĝin kiel historian dokumenton, kies radikoj troviĝas en la deknaŭjarcenta cara imperio, pli precize en Bjalistoko 1878, Moskvo 1881 kaj Varsovio 1887, kaj kiel frukton de la tieaj konoj pri tekniko kaj scienco, tiu ĉi postrestado estas atendata kaj ĉiome komprenebla. Sed se la Fundamento estas rigardata kiel ĉiam deviga leĝo por ĉiuj esperantoparolantoj, donita en la dudeka jarcento en Bulonjo ĉe maro, oni rajtas ĝin prijuĝi kiel ajnan leĝon.

**kilo'gram'o*, kio montras ke la dokumento ne akceptas la prefikson **kilo/*, nek la radikon **gram'*.

15.2. Prefiksoj por dekumaj obloj

Laŭ dekreto de 1795-04-07²⁷ la *Convention nationale* en Francio enkondukis la metran sistemon por certaj grandoj, kiaj metro por longo kaj gramo por maso. La nomojn de pli grandaj aŭ pli malgrandaj unuoj oni formis per aldono de prefiksoj. Mi indikas en la sekva tabelo la jaron de unua atesto de la vortoj respondaj al *kilogramo*, *milimetro*, *kilometro*, *mililitro*, *miligramo* en la angla, rusa kaj sveda.

Vorto	en ^a	ru	sv
<i>kilogramo</i>	1797	1804 ^c	1800 ^{d, e}
<i>milimetro</i>	1807	1804 ^c	1818 ^{d, e}
<i>kilometro</i>	1810	1804 ^c	1837 ^{d, e}
<i>mililitro</i>	1810	^{b, c} *	1837 ^{d, e}
<i>miligramo</i>	1810	1804 ^c	1818 ^e

Noto. * Mi ne trovis la jaron de la unua apero de *миллиграмм*. Sed *грамм* aperis laŭ ^b en 1804, kaj ^c listigas *милли...* kun tri punktoj, imagigante ke multaj kombinaĵoj kun tiu prefikso estis uzataj.

Fontoj:

^a Webster (1983).

^b *Словарь русского языка XVIII века*, volumo 11 (2000).

^c *Словарь современного русского литературного языка* (1948–1965).

^d Svensk ordbok (2009).

^e *Svenska Akademiens ordbok*, SAOB.

Tre verŝajne plej multaj parolantoj de la menciitaj lingvoj komprenis ke *mili* kaj *kilo* estas prefiksoj, kombineblaj kun nomoj de unuoj. Tio estis novaĵo kompare al la malnova sistemo de *lineo*, *colo*, *futo*, *arŝino*, *ulno*, *klafto*, *versto*, *mejlo* k. a., kie la rilatoj ne estas videblaj. Temas pri frua ekzemplo de kombineblo uzata en pluraj lingvoj — en fleksiaj lingvoj, ne nur en aglutinaj lingvoj.

SI, *Le Système international d'Unités* 'La sistemo internacia de unuoj', kiu estas pluevoluigaĵo de la metra sistemo, rekomendas ke oni uzu jenajn prefiksojn por dekumaj obloj. Ĉar en esperanto mankas la literoj *x* kaj *y*, aperas ĉi tie anstatue *ks* kaj *j*, krom en la mallongigoj *y*, *Y*.

²⁷Laŭ la revolucia kalendaro estis la 18-a tago en la monato germinal de la jaro III.

15.2.1. Prefiksoj por dekumaj obloj kun negativaj eksponentoj

<i>Nomo Simbolo</i>	<i>Difino Potenco de dek; de mil</i>	<i>Ekzemplo Origino de la nomo</i>
jokto- y	kvarilionono $10^{-24} = 1\,000^{-8}$	Protono pezas 1,67 yg. La greka ὀκτώ 'ok'; la latina <i>octo</i> 'ok'.
zepto- z	mil kvariliononoj $10^{-21} = 1\,000^{-7}$	La latina <i>sept-</i> 'sep'
ato- a	triilionono 10^{-18}	La dana <i>atten</i> 'dek ok'.
femto- f	mil triiliononoj 10^{-15}	1 fs = 10^{-15} sekundoj. La dana <i>femten</i> 'dek kvin'.
piko- p	duilionono 10^{-12}	1 pF = 10^{-12} faradoj. La itala <i>piccolo</i> 'malgranda', eble kun apogo de la finna <i>pikku</i> 'malgranda'.
nano- n	0,000 000 001, miliardono 10^{-9}	1 ns = 10^{-9} sekundoj. La greka νάνος 'nano'.
mikro- μ	0,000 001, milionono 10^{-6}	1 μ m = 10^{-6} metroj. La greka μικρός 'malgranda'.
mili- m	0,001, milono 10^{-3}	1 mm = 0,001 metroj. La latina <i>mille</i> 'mil'.
centi- c	0,01, centono 10^{-2}	1 cm = 0,01 metroj. La latina <i>centum</i> 'cent'.
deci- d	0,1, dekono 10^{-1}	1 dl = 0,1 litroj. La latina <i>decem</i> 'dek'.

15.2.2. Prefiksoj por dekumaj obloj kun pozitivaj eksponentoj

<i>Nomo Simbolo</i>	<i>Difino Potenco de dek; de mil</i>	<i>Ekzemplo Origino de la nomo</i>
deka- da	10, dekoblo 10^1	1 dam = 10 metroj. La greka δέκα 'dek'.
hekto- h	100, centoblo 10^2	1 hg = 0,1 kilogramoj. La greka ἑκατόν 'cent'.
kilo- k	1 000, miloblo 10^3	1 kg = 1 000 gramoj. La greka χίλιοι 'mil'.
mega- M	1 000 000, milionoblo 10^6	1 MW = 10^6 vatoj. La greka μέγας 'granda'.
giga- G	miliardoblo 10^9	1 GW = 10^9 vatoj. La greka γίγας 'giganto'.
tera- T	duilionoblo	1 TWh = 10^{12} vat-horoj = 3,6 PJ. La greka τέρας 'mirindaĵo, monstro'.
peta- P	mil duilionobloj	La universo aĝas laŭ iuj 13,8 miliardoj da jaroj, proksimume egale al 413 Ps. Laŭ Albert Einstein 1 kg da materio respondas al 90 PJ. La greka πέντε 'kvin'.
eksa- E	triilionoblo $10^{18} = 1\,000^6$	La distanco al Betelĝuzo estas proksimume 4 Em. La greka ἑξ 'ses'.
zeta- Z	mil triilionobloj $10^{21} = 1\,000^7$	La galaksio kie ni vivas havas diametron de 1 Zm. La fosiliaj rezervoj de energio sur la tero estas konsiderataj respondi al 36 ZJ. La itala sette 'sep'.
jota- Y	kvarilionoblo $10^{24} = 1\,000^8$	La diametro de la konata universo estas proksimume 200 Ym. La suno elradias 385 YW. La itala otto 'ok'.

15.3. Prefiksoj por duumaj obloj

Informo kaj kapacito de memoro estas mezurataj per bitoj kaj bajtoj. Ĉar la komputiloj laboras duume, la prefiksoj *kilo-*, *mega-* k.t.p. por dekumaj obloj ne taŭgas. Anstataŭe oni uzas potencojn de 2, kiel $2^{10} = 1\,024 \approx 10^3$, nomita *kibi-*, kaj $2^{20} = 1\,048\,576 \approx 10^6$, nomita *mebi-*. Tiuj estas iom pli grandaj ol kilo- kaj mega-, kaj la responda relativa eraro fariĝas pli kaj pli granda des pli alten oni iras. Ekzistas internacia normo (IEC 80000-13:2008), kie tiuj

prefiksoj por duumaj obloj ricevis nomojn kaj simbolojn laŭ la sekva tabelo; ĉi tie modifita pro la malekzisto de x kaj y , krom en la mallongigo Yi.

<i>Nomo</i>	<i>Simbolo</i>	<i>Potenco de $1024 = 2^{10}$</i>
kibi-	Ki	1024
mebi-	Mi	$1024^2 = 1,048\,576 \cdot 10^6$
gibi-	Gi	$1024^3 \approx 1,074 \cdot 10^9$
tebi-	Ti	$1024^4 \approx 1,100 \cdot 10^{12}$
pebi-	Pi	$1024^5 \approx 1,126 \cdot 10^{15}$
eksbi-	Ei	$1024^6 \approx 1,153 \cdot 10^{18}$
zebi-	Zi	$1024^7 \approx 1,181 \cdot 10^{21}$
jobi-	Yi	$1024^8 \approx 1,209 \cdot 10^{24}$

15.4. La grandega faciligo, la grandega ekonomio

Por ĉiu nomo de unuo de fizika grandeco oni do povas formi 21 vortojn, nome unu el la 20 prefiksoj sekvata de la unuonomo kaj krome la unuonomon mem (alivorte kun la malplena prefikso). Ekzemploj de unuonomoj (ĉiuj en la SI-sistemo kaj menciitaj en PIV 2005) estas la sep bazaj unuoj, nome *metro* por longo, *kilogramo*²⁸ por maso, *sekundo* por tempo, *ampero* por kurento, *kelvino* por temperaturo, *molo* por substanco kaj *kandelo* por lumintenso. Krome ni havas du unuojn por anguloj: *radiano* por ebenaj anguloj kaj *steradiano* por spacaj anguloj. Sekvas almenaŭ dek naŭ derivitaj unuoj: *herco* por frekvenco, *neŭtono* por forto, *paskalo* por premo, *ĵulo* por energio, *vato* por povo, *kulombo* por elektra kvanto, *volto* por tensio, *farado* por kapacitanco, *omo* por rezistanco, *simenso* por konduktanco, *vebero* por magneta flukso, *teslo* por magneta fluksdenso, *henro* por induktanco, *lumen* por lumflukso, *lukso* por lumiga intenso, *bekerelo* por radioaktivo, *grajo* por sorbita radia kvanto, *siverto* por radiokvanta ekvivalento.

Temas do pri almenaŭ 21 oble $28 = 588$ kombinaĵoj, faritaj el 20 plus $28 = 48$ vortelementoj.

Evidente ne ĉiuj kombinaĵoj aperas en la praktiko. Ekzemple ni havas la masunuon *tuno* kaj la volumenunuon *litro*. Oni ja uzas *kilotuno*, *megatuno* sed ne **mikrotuno* por gramo; *hektolitro* sed ne **kilolitro* por kuba metro.

Laŭ la 15-a regulo de la Fundamenta gramatiko esperanto povas uzi ĉiujn 588 vortojn, ĉar ili estas internaciaj (tiel nomataj “fremdaj”) vortoj, “kiujn

²⁸Tiu nomo estas escepto. Ĝi ja estas baza unuo el fizika vidpunkto, sed el lingva vidpunkto *gramo* funkcias kiel elira nomo: oni ja ne diras **milikilogramo* por *gramo*, nek **kilokilogramo* por *tuno*.

la plimulto de la lingvoj prenis el unu fonto”. Sed ni notu ke ankaŭ la prefiksoj estas “vortoj” laŭ la Unua libro 1887 (sekcio 3.2) kaj la Fundamento 1905 (sekcio 4.5). Argumentante tiel oni rajtas uzi ankaŭ la prefiksojn laŭ la 15-a regulo, kaj akcepti la analizon *femto·sekund·o* ene de esperanto. La “grandegan ekonomion” menciitan en subsekcio 3.3 oni povas en tiu ĉi okazo mezuri precize: ĝi estas

$$(21 \times 28)/(20 + 28) = 588/48 > 12,$$

kiu ne estas “unglaublich” granda nombro, sed tamen konsiderinda. Sed ial la Fundamento ne sekvas tiun vojon.

En la Universala vortaro ne aperas *gram'* (oficiala laŭ OA1), nek *kilo/* (neoficiala) aŭ *mili/* (neoficiala), kvankam la metra sistemo estas 110 jarojn pli aĝa ol la Fundamento. La radikoj *kilogram'*, *kilometr'* kaj *metr'* estas Fundamentaj, sed la Fundamento ne akceptas la vortopartojn *kilo* aŭ *gram*, kaj sekve ne la kombineblon de tiuj partoj.

Ĉu ni estu maltrankvilaj pro la fakto ke la Fundamento ne akceptas la kombineblon de la mezurunuoj? Laŭ mi ne, ĉar nun dekmiloble pli da personoj konas tiun ideon pri mezurunuoj kompare al la kombineblo de la vortelementoj de esperanto.

Kiel kutime ni substreku ke la kombineblo havas limigon: oni ne parolas pri *femtocoloj*, nek pri *gigaklaftoj* aŭ *miliverstoj* — sed kompreneble poetoj ĉiam povos eksperimenti per tiaj vortoj, nur por forpuŝi la limojn de la lingvo. Megaurboj ja ekzistas, kaj eble ni iam havos gigaurbojn.

15.5. Vortfarado en la kemio

Kemiaj terminoj estas ofte formataj per kombinado. Sed temas ĉi tie ne pri senŝanĝaj vortelementoj: oni ofte uzas unu formon en la nomo de elemento aŭ baza substanco, kaj alian en kombinitaj terminoj. Tiu ŝanĝiĝemo, kiu ekzistas en multaj lingvoj, aperas ankaŭ en esperantaj terminoj.

Kelkaj ekzemploj sufiĉu por ilustru la fenomenon. Plej ofte, kvankam ne ĉiam, oni uzas malsamajn nomojn por la elemento ${}^6\text{C}$ karbono kaj la nigra mineralo karbo trovebla en la naturo, kaj kiu konsistas ĉefe el karbono. Sed en kombinitaj nomoj la formoj *karb* kaj *karbo* tamen aperas kiel vortelementoj, ekzemple en *karb·id·o*, *karbo·cikl·a*. Pri aliaj ekzemploj, enmetitaj en la sekva tabelo, atentigas Sergio Pokrovskij (2013:10). Ni notu ke ĉiuj menciitaj nomoj kaj vortelementoj aperas en PIV 2005.

Tiaj duoblaj formoj apenaŭ povas ekzisti kiam la origina nomo estas mallonga, kiel ĉe ${}_{17}\text{Cl}$ *klor*^{OA4}*o*; ${}^{29}_{26}\text{Fe}$ *fer*^{UV}*o*; ${}_{29}\text{Cu}$ *kupr*^{UV}*o*; ${}_{30}\text{Zn}$ *zink*^{UV}*o*; ${}_{50}\text{Sn}$

²⁹De la greka $\chi\lambda\omega\rho\acute{o}\varsigma$; sekve **ĥloro* estus pli fidela al la origino. Pri la litero *ĥ* en nomoj de mineraloj vidu Kavka (1997).

stan^{UVo}, ⁵³I *jod*^{OA1}*o*; ⁸²Pb *plumb*^{UVo}. La du nomvicoj *klorato*, *klorido*, *klorito*; *nitrato*, *nitrido*, *nitrito* estas tute paralelaj, sed la dua enhavas la mallongan formon *nitr*, ne *nitrogen*.

<i>Simbolo</i>	<i>Nomo</i>	<i>Vortelemento por kombinado</i>	<i>Nomoj de kombinaĵoj</i>
¹ H	<i>hidrogen</i> ^{UVo}	<i>hidr</i>	<i>hidrido</i>
⁶ C	<i>karbono</i>	<i>karb</i> ^{UV} , <i>karbon</i>	<i>karbido</i> ; <i>karbonato</i>
⁷ N	<i>nitrogeno</i>	<i>nitr</i>	<i>nitrato</i> , <i>nitrido</i> , <i>nitrito</i>
⁸ O	<i>oksigen</i> ^{UVo}	<i>oks</i> , <i>oksi</i>	<i>oksido</i> , <i>oksitetraciklino</i>
¹⁵ P	<i>fosfor</i> ^{UVo}	<i>fosf</i>	<i>fosfato</i> , <i>fosfido</i>
¹⁶ S	<i>sulfur</i> ^{UVo}	<i>sulf</i>	<i>sulfato</i>

En kemio ja temas pri kombineblo, sed de ŝanĝiĝemaj elementoj, kio akre kontraŭas al la baza esperanta principo de kombinado de senŝanĝaj vortelementoj. Ne estas klare kiel la esperantlingvaj kemiistoj pritraktos tiujn terminologiajn problemojn.³⁰

16. Konkludo

La principo de kombinado de senŝanĝaj vortelementoj estas ĉe la vera bazo de esperanto kaj faras ĝin strikte aglutina — spite al la dominanta ideo dum la deknaŭa jarcento ke aglutinaj lingvoj estas malpli valoraj kaj malpli taŭgaj ol la fleksiaj. Tamen en pluraj fleksiaj lingvoj kombinitaj vortoj estis uzataj longe antaŭ 1878 kaj 1887.

Ĉar la Fundamento de 1905 ne estas finkonstruita domo sed bazo de lingvo, sur kiuj la parolantoj daŭre evoluigu ĝin, estas nature iel daŭrigi la kombineblon kiam temas pri novaj vortoj. En la artikolo mi menciis ekzemplojn, ĉefe el la scienca kaj teknika lingvaĵo, kie kombineblo ekster la Fundamento jam funkcias. Kiom longe oni iru laŭ tiu vojo estas interesa demando, ne klare respondita, sed certe atentinda.

La kombineblo havas fortajn limigojn. Ekzemple la kvar finaĵoj *o*, *a*, *j*, *n* povas aperi en la sep kombinaĵoj *on*, *an*, *oj*, *aj*, *jn*, *ojn*, *ajn* sed ne en ekzemple **jna*, **noj*; la prefiksoj *femto* kaj *peta* kombineblas nur kun nomoj de unuoj, sed ne kun ĉiuj — *femtoarŝino* kaj *petaklafto* ne eblas en normala lingvaĵo.

³⁰Pokrovskij (2013:10) skribas pri “la Aŭgiaj ĉevalstaloj de la kemia terminaro”. Laŭ iu fonto Aŭgio (Αὐγείας, Αὐγέας) havis stalon kun tri mil gebovoj ne purigitan dum tridek jaroj. Heraklo (Ἡρακλῆς) dum unu tago purigis ĝin trafluigante unu aŭ du el la tri riveroj Alfeió (Αλφειός), Pēneiós (Πηνειός), Ménios (Μήνιος). Ĉu iu disponos je tiaj riveroj por la kemia vortfarado?

Ĉiu vortelemento, malnova same kiel nova, havas limigitan kampon de apliko. Tiun kampon de apliko oni devas studi aparte por ĉiu vortelemento aŭ ĉiu klaso de vortelemento, ĉar ĝi tre varias.

La demando pri kombineblo de lingvaj elementoj certe ne havas simplan respondon. La ĉapitroj 14 ĝis 16 estu ricevotaj kiel invito al diskuto, malfermita al ĉiuj kiuj interesiĝas pri la estonteco de esperanto.

Sincera dankon

Mi direktas miajn plej sincerajn dankojn al Ingrid Maier, Wim Jansen, Detlev Blanke, Jean-Claude Caraco, Renato Corsetti kaj José Antonio Vergara (ĉi tie laŭtempe menciitaj), kiuj ĉiuj per kritiko, komentoj kaj konsiloj helpis al la plibonigo de la teksto, kaj al Gerrit Berveling kaj Ilona Koutny pro helpo pri referencoj. Krome Sergio Pokrovskij sendis rimarkigojn pri la lingvaĵo, kaj Johan Derks donis al mi komentojn; ĉiuj estas kun danko ricevotaj. Pro helpo pri modelaj frazoj en la pola, rusa, vjetnama, jida, ĉina, persa, hungara kaj turka lingvoj mi dankas al Hania Uscka-Wehlou, Ingrid Maier, Lê Hải Khôi, Tsvi Sadan, Joakim Enwall, Shiva Samieinia kaj Éva Ágnes Csátó Johanson. Pro helpo pri latina etimologio mi dankas al Erik Bohlin. Pro atentigo pri la maniero presi ĵ kaj ĥ en la unuaj eldonoj mi dankas al Carlo Minnaja.

Referencoj

- Adam, Z. 1979. (Pseŭdonimo de Zakrzewski, Adam.) *Historio de Esperanto 1887 – 1912*. Varsovio: Pola Esperanto-Asocio. (Represo de la eldono de 1913.)
- Akademio de Esperanto. 1992. *Aktoj de la Akademio de Esperanto, III (1975–1991)*. Roterdamo: Universala Esperanto-Asocio; Parizo: Sennacieca Asocio Tutmonda.
- Albault, André. 1963. Ĝenerala enkonduka notico. **En:** Zamenhof (1991a:7–30).
- Allerton, D. J. 1990. Language as form and pattern: Grammar and its categories. **En:** Collinge, N. E. (Red., 1990). *An Encyclopedia of Language*, pp. 68–111. Londono; Nov-Jorko: Routledge.
- Anderson, Stephen R. 2015. The morpheme: Its nature and use. **En:** Baerman, Matthew (red.), *The Oxford Handbook of Inflection*. Publikigota.
- Andronov, Michail S[ergeeviĉ]. 1989. *A Grammar of Modern and Classical Tamil*. Dua eldono. Madraso: New Century Book House. 376 pp.
- Auer, Peter. 2104. Language mixing and language fusion: when bilingual talk becomes monolingual. **En:** Besters-Dilger k. a. (2014:294–333).
- Back, Otto. 2011. Bemerkungen zu Zamenhofs reformiertem Esperanto von 1894. **En:** Brosch, Cyril; Fiedler, Sabine (Red., 2011). *Florilegium Interlinguisticum. Festschrift für Detlev Blanke zum 70. Geburtstag*, pp. 263–269. Frankfurt am Main et al.: Peter Lang.
- Barandovská-Frank, Věra. 2009. Korrelative in Esperanto und in einigen indogermanischen Sprachen. **En:** Fiedler, Sabine (Red., 2009:99–115).

- Baudouin de Courtenay, Jan. 1895. *Versuch einer Theorie phonetischer Alternationen. Ein Capitel aus der Psychophonetik*. Strasburgo; Krakovo. 130 pp.
- Baudouin de Courtenay, Jan. 1972. *A Baudouin de Courtenay Anthology: The Beginnings of Structural Linguistics*. Translated and edited with an introduction by Edward Stankiewicz. Bloomington, IN; Londono: Indiana University Press.
- Besters-Dilger, Juliane; Dermarkar, Cynthia; Pfänder, Stefan; Rabus, Achim. Red., 2014. *Congruence in Contact-induced Language Change: Language Families, Typological Resemblance, and Perceived Similarity*. Berlino; Bostono: de Gruyter.
- Blanke, Detlev. 1982. *Plansprache und Nationalsprache. Einige Probleme der Wortbildung des Esperanto und des Deutschen in konfrontativer Darstellung*. Linguistische Studien, Reihe A, Arbeitsberichte 85. Berlino: Akademie der Wissenschaften der DDR, Zentralinstitut für Sprachwissenschaft.
- Blanke, Detlev; Lins, Ulrich. Red., 2010. *La arto labori kune. Festlibro por Humphrey Tonkin*. Roterdamo: Universala Esperanto-Asocio. 901 pp.
- Bloch, Jules. 1946. *Structure grammaticale des Langues dravidiennes*. Parizo: Adrien-Maisonneuve. XV + 101 pp.
- Bloomfield, Leonard. 1926. A set of postulates for a science of language. *Language* **2**, 153–164.
- Bloomfield, Leonard. 1933. *Language*. Londono: George Allen & Unwin Ltd. [Nova eldono 1969.]
- Brosch, Cyril. 2008. Vortfarado el la vidpunkto de la hindeŭropista lingvoscienco kaj de esperantologio. Universitata diplomlaboraĵo. Poznań: Uniwersytet im. Adama Mickiewicza w Poznaniu. 48 pp.
- Caraco, Jean-Claude. Manuskripto, 2003-04. *L'Espéranto est-il une langue agglutinante ?*. 9 pp.
- Caraco, Jean-Claude. 2011. *Ĉu esperanto estas aglutina lingvo? L'espéranto, est-il une langue agglutinante ?*. 19 pp. Courgenard, La Blanchetière.
- Cherpillod, André. 1988. *La aglutinaj lingvoj kaj Esperanto*. Courgenard: la aŭtoro. 24 pp. ISBN 2-906134-06-6.
- Cherpillod, André. 2009a. *La intima naturo de Esperanto; La nature intime de l'espéranto; Esperanto Eŭropa? Tute ne!; L'espéranto européen? Pas du tout!* Courgenard, La Blanchetière: la aŭtoro. 11 pp.
- Cherpillod, André. 2009b. La genio Zamenhof kreis lingvon ne-Eŭropan, kaŝitan sub Eŭropa masko. *Esperanto*, majo, 103–105.
- Comrie, Bernard. 1983. *Language Universals and Linguistic Typology. Syntax and Morphology*. Oksfordo: Basil Blackwell.
- Comrie, Bernard. 1989. *Language Universals and Linguistic Typology. Syntax and Morphology*. Oksfordo: Basil Blackwell. Dua eldono.
- Crystal, David. 1992. Glossary. **En:** Bright, William (ĉefredaktoro). *International Encyclopedia of Linguistics*, pp. 273–348. Nov-Jorko; Oksfordo: Oxford University Press.
- Csató, Éva Ágnes; Isaksson, Bo; Jahani, Carina. Red., 2005. *Linguistic Convergence and Areal Diffusion. Case studies from Iranian, Semitic and Turkic*. Londono; Nov-Jorko: Routledge Curzon.
- Darwin, Charles. 1871. *The Descent of Man, and Selection in Relation to Sex*. Volumo I. Nov-Jorko: D. Appleton and Company.

- Drezen, E[řnest Karlovič]. 1931. *Skizoj pri teorio de Esperanto. Очерки теории Эсперанто*. Ŝtata Histori-Lingvistika Instituto de RSFSR. Lepsiko: Ekrelo.
- Д^{Р^б} Эсперанто [Dr'' Èsperanto; pseŭdonimo de Д^{Р^б} Л. Заменгофъ]. 1887a. *Международный языкъ. Предисловіе и полный учебникъ*. Varsovio: Kelter. 42 pp + faldfolio. Unua eldono. Represita en *zamenhof* (1991c:1–49).
- Д^{Р^б} Эсперанто [Dr'' Èsperanto; pseŭdonimo de Д^{Р^б} Л. Заменгофъ]. 1887b. *Международный языкъ. Предисловіе и полный учебникъ*. Varsovio: Kelter. 42 pp + faldfolio. Dua eldono. Parte represita en *zamenhof* (1991c:225–243).
- Dr. Esperanto [Pseŭdonimo de Dr. L. Zamenhof]. 1887c. *Język międzynarodowy. Przedmowa i podręcznik kompletny*. Warsaw: Kelter.
- Dr. Esperanto [Pseŭdonimo de Docteur L. Samenhof]. 1887d. *Langue internationale. Préface et Manuel complet*. Warsaw: Kelter. 48 pp + faldfolio.
- Dr. Esperanto [Pseŭdonimo de D^r. L. Samenhof]. 1887e. *Internationale Sprache. Vorrede und vollständiges Lehrbuch*. Warsaw: Kelter.
- Д^{Р^б} Эсперанто [Dr'' Èsperanto; pseŭdonimo de Д^{Р^б} Л. Заменгофъ]. 1992. *Международный языкъ. Предисловіе и полный учебникъ*. Moskvo: ДО “Глаголь”. 42 pp + faldfolio. Represo. [Ŝajnas ke la titola paĝo venas de la unua eldono (1887a) kaj la vortlisto de la dua eldono (1887b).]
- Duc Goninaz, Michel. 1974. Les influences slaves en espéranto. *Cahiers de linguistique, d'orientalisme et de slavistique* **3–4**, 31–53.
- Duc Goninaz, Michel. 1985. La problemo de la normo en Esperanto. **En:** Rokicki, Ryszard (Red., 1985), *12-a Scienca Interlingvistika Simpozio 1984*, pp. 57–65. Varsovio: Akademickie Centrum Interlingwistyczne.
- Duc Goninaz, Michel. 2011. Pri la leksika sistemo de Esperanto. *Internacia Pedagogia Revuo* **11**, n-ro 1, 14–18.
- Einstein, Leopold. 1888. *La lingvo internacia als beste Lösung des internationalen Welt-sprache-Problems: Vorwort, Grammatik und Styl nebst Stammwörter-Verzeichniß nach dem Entwurf des Pseudonymen Dr. Esperanto — Zum ersten Male methodisch geordnet und ausgearbeitet*. 78 pp. Nürnberg: J. A. Stein's Buch- & Kunsthandlung.
- The Encyclopedia of Language and Linguistics*. 1994. Ĉefredaktoro R. E. Asher; kunordiganta redaktoro J. M. Y. Simpson. Oksfordo k. a.: Pergamon Press.
- Fiedler, Sabine. Red., 2009. *Esperanto und andere Sprachen im Vergleich. Beiträge der 18. Jahrestagung der Gesellschaft für Interlinguistik e.V., 21.–23. November 2008* (Beiheft 16). Berlino: Gesellschaft für Interlinguistik e.V. (GIL).
- Galinski, Christian; Reineke, Detlef. 2011. Vor uns die Terminologieflut. *eDITION* **7**, n-ro 2, pp. 8–12.
- Greenberg, Joseph H. 1966. Some universals of grammar with particular reference to the order of meaningful elements. **En:** Greenberg, Joseph H. (Red., 1966). *Universals of Language*. Dua eldono. Cambridge, MA; Londono: Massachusetts Institute of Technology.
- von Humboldt, Wilhelm. 1836. *Über die Verschiedenheit des menschlichen Sprachbaues und ihren Einfluß auf die geistige Entwicklung des Menschengeschlechts*. Berlino: Königliche Akademie der Wissenschaften. (Dua represo 1967.)
- International Encyclopedia of Linguistics*. 2003. Dua eldono. Ĉefredaktoro William J. Frawley. Oksfordo: Oxford University Press.
- Jansen, Wim. 2010. La Fundamenta Esperanto: nekontestebla eŭropa, sed ... **En:** Blanke & Lins (Red., 2010:271–284).

- Jespersen, Otto. 1924. *The Philosophy of Grammar*. London: George Allen & Unwin Ltd.; Nov-Jorko: Henry Holt and Company.
- Johanson, Lars. 2005. Converging codes in Iranian, Semitic and Turkic. **En:** Csátó k. a. (2005:3–31).
- Johanson, Lars. 2008. Remodeling grammar: Copying, conventionalization, grammaticalization. **En:** Siemund, Peter; Kintana, Noemi (Red., 2008). *Language Contact and Contact Languages*, pp. 61–79. Amsterdamo; Filadelfio: John Benjamins Publishing Company.
- Johanson, Lars. 2014. Intimate family reunions: code-copying between Turkic relatives. **En:** Besters-Dilger k. a. (Red., 2014:137–145).
- Jones, Daniel. 1964. *The history and meaning of the term “phoneme”*. Londono: University College, Department of Phonetics, International Phonetic Association. 20 pp.
- Kalocsay, K.; Waringhien, G. 1980. *Plena analiza gramatiko de Esperanto*, PAG. Kvara, tralaborita, eldono. Roterdamo: Universala Esperanto-Asocio.
- Kalocsay, K.; Waringhien, G. 1985. *Plena analiza gramatiko de Esperanto*, PAG. Kvina korektita eldono. Roterdamo: Universala Esperanto-Asocio.
- Kavka, Josef. 1997. Ĥ en mineralnomoj. *Scienca Revuo* **48**, N-ro 170, 44–51.
- Kawasaki, Naokazu. 1975. Origino de la korelativa tabelo. *Oomoto*, septembro–decembro, 118–120.
- Kerckhoffs, Aug[uste]. 1887. *Dictionnaire Volapük–Français et Français–Volapük précédé d’une grammaire complète de la langue*. Volumo I. Parizo: Librairie H. Le Soudier.
- Kerkhoffs, Aug. [Kerckhoffs, Auguste]. 1887. *Fullständig lärokurs i Volapük*. Dua eldono. Stokholmo: Albert Bonniers Förlag.
- Kiselman, Christer. 1992. Kial ni hejtas la hejmon sed ŝajnas fajfi pri la fajlado? *Literatura Foiro* **138**, 213–216.
- Kiselman, Christer. 2008. Esperanto: its origins and early history. **En:** Prace Komisji Spraw Europejskich PAU. Tom II, pp. 39–56. Red. Andrzej Pelczar. Krakovo: Polska Akademia Umiejętności, 79 pp.
- Kiselman, Christer. 2011. Variantoj de esperanto iniciatitaj de Zamenhof. *Esperantologio / Esperanto Studies* **5**, 79–149.
- Koutny, Ilona. 2009. Esperanto im Rahmen der Sprachtypologie. **En:** Fiedler, Sabine (Red., 2009:117–130).
- Li Shijun [Laülum]. 1995. De fare de al far. **En:** *Printempa kampo. Jara revuo pri esperantologio, E-a faklingviko k interlingviko*. Nova serio II, n-ro 6, pp. 1–3. Dalian: Universitato de Scienco kaj Teknologio.
- Lindstedt, Jouko. 2000. Linguistic Balkanization: Contact-induced change by mutual reinforcement. *Studies in Slavic and General Linguistics* **28**, Languages in Contact (2000), pp. 231–246. Amsterdamo; Atlanta: Rodopi.
- Lindstedt, Jouko. 2005. Interlingva komunikado sen interlingvo: la balkania modelo. **En:** Kiselman, Christer (Red., 2005), *Symposium on Communication Across Cultural Boundaries; Simpozio pri interkultura komunikado 2003-08-02—03*, pp. 16–24.
- Lindstedt, Jouko. 2014. Balkan Slavic and Balkan Romance: from congruence to convergence. **En:** Besters-Dilger k. a. (Red., 2014:168–183).
- Lo Jacomo, François. 1981. *Liberté ou autorité dans l’évolution de l’espéranto*. Thèse pour le doctorat de troisième cycle sous la direction de M. le Professeur André Martinet. Parizo: Université Paris 5, René Descartes.

- Malmkjær, Kirsten. Red. 1991. *The Linguistics Encyclopedia*. Londono; Nov-Jorko: Routledge.
- Manders, W[ilhelmus Johannes Arnoldus]. 1950. *Interlingvistiko kaj esperantologio*. Purmerend: J. Muusses.
- Mattos, Geraldo. 1987. *La deveno de Esperanto*. Chapecó, SC: Fonto.
- Minnaja, Carlo; Silfer, Giorgio. 2015. *Historio de la esperanta literaturo*. La Chaux-de-Fonds: Kooperativo de Literatura Foiro. Aperonta.
- Mugdan, Joachim. 1984. *Jan Baudouin de Courtenay (1845–1929): Leben und Werk*. Munkeno: Wilhelm Fink Verlag.
- Mugdan, Joachim. 1986. Was ist eigentlich ein Morphem? *Zeitschrift für Phonetik, Sprachwissenschaft und Kommunikationsforschung* **39**, 29–43.
- Mugdan, Joachim. 2011. On the origin of the term *phoneme*. *Historiographica Linguistica* **38**, 1/2, 85–110.
- La nova plena ilustrita vortaro de Esperanto* (NPV). 2002. Parizo: Sennacieca Asocio Tutmonda.
- Nyström, Anton. 1886. *Allmän kulturhistoria eller det mänskliga lifvet i dess utveckling*. Unua parto. Stokholmo: Looström & Komp.
- Parkvall, Mikael. 2010. How European is Esperanto? A typological study. *Language Problems & Language Planning* **34**, n-ro 1, 63–79.
- Piron, Claude. 1977. *Esperanto: ĉu eŭropa aŭ azia lingvo?* Esperanto-Dokumentoj, nova serio, n-ro 10. 32 pp. Roterdamo: Universala Esperanto-Asocio.
- Plena ilustrita vortaro de Esperanto* (PIV). Dua eldono per “offset”. 1977. Parizo: Sennacieca Asocio Tutmonda.
- Plena ilustrita vortaro de Esperanto 2005* (PIV 2005). 2005. Parizo: Sennacieca Asocio Tutmonda.
- Pokrovskij, Sergio. 2013. La nomoj de la elementoj ĥemiaj. Studaĵo, versio de 2013-12-06, 20 pp.
- Prytz, Otto. 2010. Sistema de sufiksoj en etnolingvoj kaj en Esperanto. Similaĵoj kaj diferencoj. **En:** Blanke & Lins (Red., 2010), pp. 386–394.
- Rokicki, Ryszard. 1987. La leksemstrukturaj aspektoj klasifiki la esperantan morfemaron. **En:** Duc Goninaz, Michel (Red., 1987). *Studoj pri la internacia lingvo. Etudes sur la langue internationale. Studies on international Language*, pp. 91–108. Gent: AIMAV.
- Ruhlen, Merritt. 1987. *A Guide to the World's Languages. Volume 1: Classification*. Stanford, CA: Stanford University Press.
- Ruhlen, Merritt. 2001. Taxonomic controversies in the twentieth century. **En:** Trabant, Jürgen; Ward, Sean. Red. 2001. *New Essays on the Origin of Language*, pp. 197–214. Berlino; Nov-Jorko: Mouton de Gruyter.
- Rundgren, Frithiof. 1976. *Integrated Morphemics. A Short Outline of a Theory of Morphemes*. Acta Universitatis Upsaliensis; Acta Societas Linguisticae Upsaliensis, Nova Series, 3:1. Stokholmo: Almqvist & Wiksell International.
- de Saussure, Ferdinand. 1916. *Cours de linguistique générale*. Lausanne; Parizo: Librairie Payot & C^{ie}.
- de Saussure, Ferdinand. 1989. *Cours de linguistique générale*. Parizo: Édition Payot.
- de Schlegel, A. W. [von Schlegel, August Wilhelm]. 1818. *Observations sur la langue et la littérature provençales*. Parizo: Librairie grecque-latine-allemande.

- [von] Schlegel, Friedrich. 1808. *Ueber die Sprache und Weisheit der Indier. Ein Beitrag zur Begründung der Alterthumskunde*. Heidelberg: Mohr und Zimmer.
- Schleicher, August. 1859. *Zur morphologie der sprache*. Mémoires de l'Académie impériale des Sciences de St.-Petersbourg, 7-a serio, volumo 1, n-ro 7. 38 pp.
- Seuren, Pieter A. M. 1998. *Western Linguistics. An Historical Introduction*. Oksfordo; Malden, MA: Blackwell.
- Словарь русского языка XVIII века*, Российская Академия Наук. Volumo 11 (2000); volumo 12 (2001). Sankt-Peterburgo: Наука.
- Словарь современного русского литературного языка*. 1948–1965. Moskvo; Leningrado: Издательство Академии Наук СССР.
- Stankiewicz, Edward. 1976. *Baudouin de Courtenay and the Foundations of Structural Linguistics*. Lisse: The Peter de Ridder Press.
- Steever, Sanford B. Red., 1998. *The Dravidian Languages*. Londono; Nov-Jorko: Routledge.
- Svantesson, Jan-Olof. 2005. Vowel harmony – areal or genetic? **En**: Csátó k. a. (Red., 2005:365–373).
- Svenska Akademiens ordbok* (SAOB). Rete alirebla; kontrolita 2015-04-26.
- Svensk ordbok utgiven av Svenska Akademien*. 2009. Stokholmo: Svenska Akademien.
- Ŝtono, Bruna [pseŭdonimo de Моисей Палевич Бронштейн]. 2001. *Du lingvoj. Kantoj kaj poemoj*. Moskvo: Impeto.
- Thomason, Sarah Grey; Kaufman, Terrence. 1988. *Language Contact, Creolization, and Genetic Linguistics*. Berkeley k. a.: University of California Press.
- Trask, R. L. 1993. *A Dictionary of Grammatical Terms in Linguistics*. Londono; Nov-Jorko: Routledge.
- Ушаков, Д. Н. 1938. *Толковый словарь русского языка*. Volumo II. Moskvo: Гос. издательство иностранных и национальных словарей.
- Vilborg, Ebbe. 2001. *Etimologia vortaro de Esperanto. Volumo 5: S–Z*. Stokholmo: Eldona Societo Esperanto.
- Waringhien, G[aston]. 1955. Inventaro de la Fundamenta kaj Oficiala Vortrezoro. *Scienca Revuo* 7, nr-o 28, 137–143.
- Waringhien, Gaston. 1987. *Beletro, sed ne el katedro*. Dua eldono reviziita kaj ampleksigita. Antverpeno: Flandra Esperanto-Ligo.
- Waringhien, Gaston. 1989. *Lingvo kaj vivo. Esperantologiaj eseoj*. Dua eldono kun apendico. Roterdamo: Universala Esperanto-Asocio. (Unua eldono 1959, La Laguna: J[uan] Régulo.)
- Webster's Ninth New Collegiate Dictionary*. 1983. Springfield, MA: Mariam-Webster Inc.
- Wells, J[ohn] C[hristopher]. 1978. *Lingvistikaj aspektoj de Esperanto*. Roterdamo: Universala Esperanto-Asocio; Centro de esploro kaj dokumentado pri la monda lingvo-problemo.
- Wennergren, Bertilo. *Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko*, PMEG. Rete havigebla ĉe <http://bertilow.com/pmeg/index.html>. Ligo kontrolita 2015-04-26.
- Zamenhof, L.-L. 1905. *Fundamento de Esperanto*. GRAMATIKO, EKZERCARO, UNIVERSALA VORTARO. Parizo: Hachette et Cie.
- Zamenhof, L. L. 1939. *Fundamenta krestomatio de la lingvo Esperanto*. Deksesa eldono. Parizo: Esperantista Centra Librejo.

- Zamenhof, L.-L. 1948a. *Leteroj de L.-L. Zamenhof*. Presentado k[aj] komentado de Prof. G[aston] Waringhien. I. 1901–1906. Parizo: S[ennacieca] A[socio] T[utmonda].
- Zamenhof, L.-L. 1948b. *Leteroj de L.-L. Zamenhof*. Presentado k[aj] komentado de Prof. G[aston] Waringhien. II. 1907–1914. Parizo: S[ennacieca] A[socio] T[utmonda].
- Zamenhof, L. L. 1962. *Lingvaj respondoj. Konsiloj kaj opinioj pri Esperanto*. Editoris G. Waringhien. Sesa eldono. Marmande: Esperantaj Francaj Eldonoj.
- Zamenhof, L. L. 1983. *Originala verkaro. Antaŭparoloj — Gazetartikoloj — Traktaĵoj — Paroladoj — Leteroj — Poemoj*. Kolektitaj kaj ordigitaj de Joh[annes] Dietterle. Osaka: Oriental-Libro. (Fotorepreso de la eldono publikigita de Hirt en Lepsiko en 1929.)
- zamenhof l. l. 1989. *iom reviziita plena verkaro de l.l. zamenhof. originalaro 1. unua etapo de esperanto. 1878–1895*. Kioto: eldonejo ludovikito.
- Zamenhof, L. L. 1991a. *Fundamento de Esperanto*. Deko eldono. Pizo: Edistudio.
- zamenhof, l. l. 1991b. *iom reviziita plena verkaro de l.l. zamenhof. originalaro 3. destino de ludovika dinastio. 1907–1917*. Tokio: eldonejo ludovikito.
- zamenhof, l. l. 1991c. *eble neniam kompletigotaj necesaj aldonoj al la pvz. kolekto 1. ludovikologia dokumentaro, I: unuaj libroj*. Tokio: eldonejo ludovikito.
- Zamenhof, L. 1992. *Fundamenta krestomatio de la lingvo Esperanto*. Dekoka eldono prinotita de G. Waringhien. Roterdamo: Universala Esperanto-Asocio.

Christer Kiselman esploras pri matematiko, komencinte pri partaj diferencialaj ekvacioj kaj daŭriginte pri kompleksa analitiko kaj geometrio, ankaŭ en nefiniaj dimensioj. Nuntempe li esploras ĉefe pri digita geometrio, matematika morfologio kaj diskreta optimumado. Li gvidis dek sep personojn al doktoreco.

Ekde 2014 li estas gastprofesoro ĉe Upsala universitato (Instituto por informadika teknologio, Sekcio por vida informo kaj interagado, Komputila bildanalizo kaj interagado homa-komputila).

Li verkis pri la gramatiko de esperanto kaj la frua historio de la lingvo. Li kunlaboris pri matematiko kaj statistiko en la nova PIV (2002).

Christer estas kunaŭtoro de svedlinga libro pri matematikaj terminoj (2008).

Paperpoŝta adreso: Poŝtkesto 337, SE-751 05 Uppsala

Sukcenaj adresoj: kiselman@it.uu.se, christer@kiselman.eu

URL: www.cb.uu.se/~kiselman

Geraldo Mattos (1931–2014)

Christer Kiselman

Geraldo Mattos naskiĝis 1931-06-28 kaj mortis 2014-03-23. Li estis membro de la Redakta komitato de *Esperantologio / Esperanto Studies* ekde la komenco en 1999 kaj ĝis la sesa kajero en 2013. En la unua kajero aperis lia artikolo “Esenco kaj estonteco de la *Fundamento de Esperanto*” (1999:21–37). Mi estas danka pro lia multjara kunlaboro en la revuo. Li mankas al mi.

Geraldo estis poeto, tre grava en la esperanta kulturo. Inter liaj multaj verkoj mi volas aparte mencii lian libron *La deveno de Esperanto* (1987).

Li estis elektita al Akademio de Esperanto en 1970 kaj restis membro dum 44 jaroj ĝis sia morto. Dum la periodo 1998 ĝis 2007 li estis prezidanto. Dum la unua parto de tiu periodo mi estis unu el la du vicprezidantoj. En 2000 ni havis belan tempon kune en Tel-Avivo, kaj ni bone kunlaboris i.a. pri la konferenco en Zagrebo 2001-07-28—30, *Internacia Simpozio pri Lingva Planado kaj Leksikologio*.

Inter multaj memoroj mi menciu ke li diris ke li malŝatas la nazalajn sonojn de la portugala, dum por mi *Atenção!* estas tre ĉarma ekkrio.

Pri la revuo *Esperantologio / Esperanto Studies* 1999–2015

Kun la nuna sepa kajero de la revuo ni publikigis tridek kvin originalajn studojn kaj sep recenzojn. En la sekva tabelo esprimo de la formo $s + r$ indikas s originalajn studojn kaj r recenzojn.

With the present seventh issue of the journal, we have published 35 original studies and 7 reviews. In the following table, an expression of the form $s + r$ indicates s original studies and r reviews.

<i>N-ro</i> <i>No.</i>	<i>Jaro</i> <i>Year</i>	<i>Paĝoj</i> <i>Pages</i>	<i>Esperante</i> <i>Esperanto</i>	<i>Angle</i> <i>English</i>	<i>France</i> <i>French</i>	<i>Germane</i> <i>German</i>	Σ
1	1999	80	6 + 0	1 + 0			7 + 0
2	2001	64	1 + 2	1 + 1	1 + 0	0 + 1	3 + 4
3	2005	68	3 + 0			1 + 0	4 + 0
4	2009	102	4 + 1	1 + 0			5 + 1
5	2011	150	5 + 1				5 + 1
6	2013	132	3 + 0	3 + 0			6 + 0
7	2015	127	2 + 1	2 + 0		1 + 0	5 + 1
Σ		723	24 + 5	8 + 1	1 + 0	2 + 1	35 + 7